

KRITIKAJ STUDIOJ

DEFENDE DE ESPERANTO



Foto: Torben Kehlet

Seppewitz

IVO LAPENNA

KRITIKAJ STUDIOJ

DEFENDE DE ESPERANTO

Nefermita Letero al J.V. Stalin

Kelkaj Lingvistikaj Demandoj

Socipolitikaj Aspektoj de la Esperanto-Movado

Eraroj kaj Absurdaĵoj en Doktoreca Tezo

Eldonita de

INTERNACIA CENTRO DE LA NEŬTRALA ESPERANTO-MOVADO (ICNEM)

KOPENHAGO

1987



Presejo "Perspektivo"

Nørregårdsvej 91, DK-2610 Rødovre, Kopenhago, Danio

1.	PLU AKTUALA HISTORIA DOKUMENTO:	
	NEFERMITA LETERO AL J. V. STALIN.....	11
1.1	Enkonduka Rimarko	11
1.2	Teksto	12
2.	KELKAJ LINGVISTIKAJ DEMANDOJ	
	OKAZE DE LA POLITIKA BURLESKAĴO KAJ	
	LINGVOSCIENCA ĈARLATANAĴO DE D-RO W. SOLZBACHER.....	15
2.1	Ĉasado al Sorĉistinoj kaj Fantomoj.....	15
2.2	Solaktoro de la Tragikomedio	15
2.3	Misuzo de Preseraroj	16
2.4	Iom, sed Vere nur iom da Nova Logiko	17
2.5	Lingvo kiel Socia Fenomeno	19
2.6	La Lingvoevoluo	22
2.7	Individuo aŭ Kolektivo?.....	25
2.8	Helpa aŭ Universala Lingvo?	27
2.9	La Geniaj Infanoj	29
2.10	La Nefermita Letero	31
2.11	Lingvistiko kaj Biblio	33
2.12	Konfeso	33
3.	"MARKSISMA-LENINISMA" LIBRO PRI	
	SOCIAJ ASPEKTOJ DE LA ESPERANTO-MOVADO AŬ	
	PSEŬDOSCIENCA PARTIPOLITIKA KONCEPTO DE	
	LA INTERNACIA LINGVO	35
3.1	Enhavo	35
3.2	Por ke Verko Estu Scienca ne Sufiĉas Nomi ĝin tia;.....	36
3.3	Prisilentoj Lige kun Neŭtraleco	38
3.4	Kion Fakte Instruas la Historio?.....	39
3.5	Lingvistika Fetiĉismo	41
3.6	Fundamente Erara Koncepto.....	42
3.7	Blinkenberg kaj Krupskaja Samopinias	43
3.8	Science Malĝusta kaj Taktike Malutila Pluralo.....	44
3.9	Senideigo de Esperanto: Kial?.....	46

4.2	Iom pri la Fontmaterialoj	50
4.3	Fundamenta Eraro kaj Ĝiaj Sekvoj	51
4.4	Kelkaj el Multaj Aliaj Malĝustajoj	53
4.5	Aparte iom pri Hamburgo (1974)	55
4.6	Konkluda Rimarko	56
	PERSONA INDEKSO	57

ANTAŬPAROLO

Eĉ la plej valora artikolo aŭ studo publikigita en iu periodaĵo rapide forgesiĝas. Male, libroj havas multe pli longan vivon. Ili restas sur la librobretaj en privataj hejmoj, troviĝas katalogitaj en bibliotekoj kaj povas esti ĉiumomente konsultitaj. Tial mi decidiĝis publikigi libroforme kvar tekstojn, kiujn miaj geamikoj en la neŭtala kaj sendependa Esperanto-Movado kaj mi mem rigardas speciale gravaj el historia kaj aktuala vidpunktoj en la Jubilea Jaro.

Ĉiuj kvar estis verkitaj defende de Esperanto kontraŭ misprezentojn de faktoj, rektajn falsadojn, erarajn interpretojn, pseŭdosciencajn argumentojn kaj diversspecajn aliajn malĝustaĵojn. Tio necese implicis defendon per analizoj kaj eksplikoj de la nedisigebla kunligiteco inter la lingvo Esperanto kaj la idearo konsistiganta la koncepton de humaneca internaciismo, kiun Zamenhof, science iom neadekvate, nomis "interna ideo". Ĉar mi mem estis kaj plu restas la defendanto, plej ofte viktimo de samtempaj preskaŭ nekredablaj atakoj, la defendo grandparte rilatas ankaŭ al mi persone.

Por la neinformita leganto utilas doni kelkajn koncizajn klarigojn pri la cirkonstancoj de la kvar kritikoj, reciproke kunligitaj malgraŭ la tempa distanco de tri jardekoj, kaj plu aktualaj.

La *Nefermita Letero al J. V. Stalin* estis reago al liaj artikoloj pri lingvistiko publikigitaj meze de 1950; en kiuj li neis eĉ la eblecon de internacia lingvo. Lia kondamno signis la finon de la Esperanto-Movado en Orienta Eŭropo, kie ĝi estis reviviĝinta, same kiel en aliaj mondopartoj, post la Dua Mondmilito (v. ĉap. 2.4.4 de *Esperanto en Perspektivo*). Nur post la morto de Stalin, precipe post la principe grava Rezolucio de Unesko favore al Esperanto de la 10-a de decembro 1954, Esperanto estis denove allasita en la landoj sub la rego de Moskvo, sed ĉi-foje komplete "senideigita". La partipolitikaj kaŭzoj de la "senideigo" estas analizitaj en la kritika studo pri *Socipolitikaj Aspektoj de la Esperanto-Movado*, redaktita de D-ro Detlev Blanke. Tiu kritika studo, publikigita kiel la tria parto de tiu ĉi libro, kaj la *Nefermita Letero* estas reagoj al la t.n. "marksisma-leninisma-stalinisma" (nuntempe sen "stalinisma"), fakte sovietiisma pozicio rilate Esperanton en la kvindekaj kaj nuntempe.

Kelkaj Lingvistikaj Demandoj estis reago je la histeriaj atakoj de la alia ekstremo, nome la usona makartismo, kiun meze de la kvindekaj en la Esperanto-Movado reprezentis G. A. Connor, helpata de D-ro W. Solzbacher, pere de *Amerika Esperantisto* kaj alimaniere. Tiu hontinda periodaĵo publikigadis en unu numero post la alia la plej fiajn politikajn falsaĵojn, apogitajn de monstraj karikaturoj, kun la celo prezenti min nek pli, nek malpli, ol kiel agenton de tiu sama "marksismo-leninismo-stalinismo", kiu troviĝas en la fono de la hamburgaj eventoj (1974) kaj de la atakoj fare de la nuntempaj sovetiistoj! *Amerika Esperantisto*, riĉe subvenciata, estis senpage sendata ankaŭ al usonaj ambasadorejoj kaj konsulejoj, kaj troviĝis en ties atendejoj kaj legejoj. Eĉ pli, aldone al tiu publika makartisma kampanjo, mi estis false denunciata rekte al ĉiuj politikaj policoj en la Okcidento - en Britio konspire kun kelkaj britaj esperantistoj - kiel subversa politika individuo, danĝera por la sekureco de la ŝtato! Tiutempe mi estis sen ŝtataneco kaj tial ege vundebla je tiaj denuncioj. Mi devis perdi amason da tempo dum pluraj jaroj por purigi mian nomon ĉe unu politika polico post la alia kun la grandega helpo de Harry Holmes, E. Malmgren, Prof. G. Canuto, D-ro W. Hermann kaj aliaj konataj kaj honestaj esperantistoj. En tiu sama periodo necesis dediĉi multe da energio unue por organizi la multflankajn agadojn cele al sukcesigo de nia afero antaŭ Unesko, kaj poste por maksimume ekspluati la favoran Rezolucion de 1954. Alivorte: per la brusto kaj unu mano lukti por Esperanto, per la alia eligadi venenigajn ponardojn el la dorso. Ne tre enviinda situacio! Tiom por lokigi la kritikan studon *Kelkaj Lingvistikaj Demandoj*. Pliaj detaloj pri tiu tuta fiafero kaj prezento de multaj aliaj similkarakteraj, pri kiuj ekzistas abunda dokumenta materialo en mia posedo, aperos en libro sub la titolo "Mia Finkalkulo kun Ili", publikigota post 1987.

Meze inter la du politikaj ekstretoj troviĝas *The Esperanto Movement* (La Esperanto-Movado) de Peter G. Forster. Diference de la tri aliaj kritike analizitaj tekstoj, la libro de Forster ne estas inspirita de politikaj motivoj. En UEA kaj parte ekster tiu medio ĝi estis kaj plu estas laŭdata kiel la plej objektiva nacilingva prezento de la Esperanto-Movado kaj kiel scienca priskribo de la Internacia Lingvo. Bedaŭrinde, pro la kaŭzoj analizitaj en la kritika studo publikigita kiel la kvara parto de tiu ĉi kolekto, *The Esperanto Movement* estas nek objektiva, nek scienca. Ĝi donas falsan bildon kaj pri la Internacia Lingvo kaj pri la tutmonda Esperanto-Movado.

* * *

Mi anticipe akceptas la eventualan riproĉon, ke miaj kritikoj havas polemikan karakteron. En multaj lokoj ili ja havas kaj en tiuj kunteksto ne povas ne havi tian karakteron. En ĉiu okazo, mi mem rigardas polemikon kiel unu el la plej interesaj kaj viglaj literaturaj formoj. La polemika *Anti-Dühring* de F. Engels faris pli por diskonigi kaj popularigi marksismon tra la mondo, ol *La Kapitalo* de Karl Marx. Mi estos feliĉa, se miaj *Kritikaj Studoj Defende de Esperanto* havos similan efikon por diskonigi kaj popularigi la ĝustan komprenon de Esperanto el lingvistika kaj sociologia vidpunktoj en la Esperanto-Movado kaj ekster ĝiaj vicoj. Se tiel, la libro estos plia kontribuaĵo de ICNEM kaj de mi mem ne nur al la Jubilea Esperanto-Jaro, sed ankaŭ al la estonteco de la Internacia Lingvo.

Kopenhago, la 1-an de januaro 1987

I.L.

NEFERMITA LETERO AL J. V. STALIN(*)

1.1 Enkonduka Rimarko

En majo 1952 la Estraro de UEA kaj la Plenumkomitato de SAT decidis samtempe publikigi en siaj respektivaj organoj Nefermitan Leteron al J.V. Stalin. La Letero estis iniciatita kaj verkita de la subskribinto, tiama estrarano de UEA pri informado kaj honorofica direktoro de la ĵus fondita Centro de Esploro kaj Dokumentado (CED). Ĝi aperis en la juniaj numeroj (1952) de *Esperanto* kaj *Sennaciulo*, kaj estis publikigita ankaŭ kiel dokumento A/VI/3 en la Internacia, franca kaj angla lingvoj. El tiu dokumento ĝi estis represita, ĉu komplete, ĉu parte, en pluraj anglaj kaj francaj gazetoj, interalie en la internacie tre prestiĝa *Le Monde* (Parizo), dum aliaj nacilingvaj gazetoj publikigis tradukojn aŭ favorajn komentojn. La enhavo elvokis grandan interesiĝon kun multaj pozitivaj eĥoj. Ĝi estis unu el la tute komencaj atingoj de CED, fondita la 1-an de januaro 1952 ne por ludadi "interlingvistikismon" kaj "planlingvismon", sed por pledadi klare kaj senkompromise, surbaze de faktoj kaj sciencaj argumentoj, por la solvo de la lingva problemo en internaciaj rilatoj per la Internacia Lingvo (Esperanto), laŭ siaj strukturo, celo kaj konsisto de la parolantoj la sola vere internacia vivanta lingvo.

En *Esperanto en Perspektivo: Faktoj kaj Analizoj pri la Internacia Lingvo* U. Lins skribis en ligo kun la sovetisma-stalinisma kampanjo kontraŭ "kosmopolitismo" kaj la reago de UEA-SAT en la menciita Letero: "Okaze de tio solidariĝis - per unika faro - la Plenumkomitato de SAT kaj la Estraro de UEA por protesti en Nefermita Letero al Stalin kontraŭ ties lingvistikaj teorioj" (p. 655). Aliloke li skribis:

"La kernon de la problemaro rilata al la subpremo de Esperanto en USSR kaj en la landoj de ĝiaj aliancanoj trafis la Estraro de UEA kaj la Plenumkomitato de SAT, kiuj per komuna Nefermita Letero al Stalin (majo 1952) nete atribuis la kontraŭesperantan politikon de Soveta Unio al lingva imperiismo. Citante eldirojn de sovetaj lingvistoj, la Letero trafe atentigis pri la kontraŭdiro inter la profetaĵoj pri kunfandiĝo de lingvoj kaj nacioj, unuflanke, kaj la praktika utiligo de la rusa kiel sola internacia lingvo, aliflanke, kaj, krome, inter la neo de klasa karaktero de la lingvo kaj la implicita postulo, ke internacia lingvo devas atendi novan bazon aŭ superstrukturon por formiĝi kaj ekesti!" (p. 742); (la interesiĝantoj pri la persekutoj de Esperanto kaj de esperantistoj en Soveta Unio devus legi aŭ relegi la tutan ĉap. 21.4 de *EeP*).

En la nuna situacio en la Esperanto-Movado la Nefermita Letero bedaŭrinde plu estas aktuala, eble eĉ pli aktuala ol en la tempo, kiam ĝi estis verkita. Tial, por kompletigi miajn analizojn kaj komentojn pri *Socipolitikaj Aspektoj*, kiel ankaŭ pro la fakto, ke post 1952 la Letero laŭ nia scio estis nenie represita, ni sube publikigas ĝian kompletan tekston.

Ivo Lapenna

(*) Represita el *Horizonto*, n-ro 4/80.

Al J. V. Stalin, Moskvo

En la diskuto pri lingvistiko, meze de 1950, vi intervenis per unu artikolo kaj kelkaj leteroj, kiuj estis presitaj en "*Pravda*" kaj poste represitaj en "*Bolŝevik*".

La lastan el la leteroj, tiun de la 28-a de Julio 1950, vi dediĉis al la demando de internacia lingvo. En ĝi vi diris:

"Rilate la alian formulon de Stalin, prenitan el la parolado ĉe la XVI partia kongreso, en la parto, kiu koncernas la kunfandiĝon de la lingvoj en unu komunan lingvon, ĉi tie estis pensate al alia epoko, nome al epoko *post la venko de socialismo en mondaj kadroj* (substrekiis J.V.S.), kiam ne plu ekzistos mondimperialismo... kiam la egaleco de la nacioj realiĝos, kiam la politiko de subpremo kaj asimilado de la lingvoj estos likvidita... kaj la naciaj lingvoj havos la eblecon libere riĉiĝadi unu la alian sur la vojo de kunlaborado... Ĉi tie temos ne pri du lingvoj, el kiuj unu suferas malvenkon kaj la alia eliras el la batalo kiel venkinto, sed pri centoj da naciaj lingvoj, el kiuj, rezulte de longa ekonomia, politika kaj kultura kunlaborado de la nacioj, unue elstaros la plej riĉigitaj unuecaj zonaj (regionaj) lingvoj, kaj poste la zonaj lingvoj kunfandiĝos en unu komunan lingvon, kiu, kompreneble, estos nek la germana, nek la rusa, nek la angla, sed nova lingvo, kiu estos kolektinta en si la plej bonajn elementojn de la naciaj kaj zonaj lingvoj". (1)

Niaj asocioj ne deziras esprimi sian opinion pri la politika aspekto de viaj asertoj, precipe ne pri la "venko de socialismo en mondaj kadroj", pri la enhavo mem de la koncepto "socialismo" aŭ pri la formoj de internaciaj rilatoj en la du partoj de la hodiaŭa mondo. Nin ankaŭ ne koncernas via starpunkto pri diversaj lingvaj demandoj, kiujn vi tuŝis en la artikolo kaj en la leteroj. Sed koncerne vian starpunkton rilate al la Internacia Lingvo, ni konsideras kiel nian devon doni al vi kompetentan, koncizan respondon, des pli, ke en la lastaj monatoj ni havis la okazon konstati la negativan efikon de via letero por la plua disvastigo de Esperanto en kelkaj landoj:

(1) El via letero de la 28-a de Julio klare sekvas, ke vi ne nur neas la ekziston de la Internacia Lingvo, sed eĉ la nuran eblecon de ĝia ekzisto en la nuntempo.

Tiu via inkluzivita aserto estas kontraŭa al la realaĵo, ĉar la Internacia Lingvo Esperanto - kun centmiloj da personoj, kiuj ĝin uzis en la lastaj jardekoj kaj uzas hodiaŭ, kun sia riĉa originala kaj traduka literaturo, sia gazetaro, radioelsendoj, kongresoj, konferencoj, larĝa korespondado ktp. - ekzistas kaj funkcias praktike jam 65 jarojn, malgraŭ la fakto, ke ĝin malpermesis la cara registaro en Rusujo kaj Hitler en Germanujo, dum aliaj diktatorecaj, ŝovenismaj reĝimoj malfavoris kaj malfavoras ĝin.

(2) Teorie vi ligas la formiĝon kaj la ekeston de internacia lingvo kun la ekonomia, socia, politika, jura ordoj ("post la venko de socialismo..." k.t.p.), do kun tio, kion vi nomas "bazo" kaj "superstrukturo".

(1) "*Bolŝevik*" N-ro 14/1950, p. 5-6

Tiu via aserto estas, interalie, kontraŭa al via opinio, esprimita en la artikolo de la 20-a de Junio 1950, kie vi plurfoje akcentis, ke la lingvo estas socia fenomeno,

"naskita ne de tiu, aŭ alia bazo, de la nova aŭ malnova bazo..., sed de la tuta irado de la historio". (2)

Kaj vi precizigis tion en la letero al J. Kraŝeninnikova:

"Mallonge, la lingvon oni rajtas alnombri nek al kategorio de bazoj, nek al kategorio de superstrukturoj! (3)

Kial, do, laŭ via opinio, la Internacia Lingvo devus atendi *ad infinitum* ian "novan bazon" kaj ian "novan superstrukturon" por formiĝi kaj ekesti?

(3) En la menciita respondo al J. Kraŝeninnikova, kiu demandis pri la influo de la klasoj sur la lingvon, vi diris, ke la klasoj havas ian influon, ke ili alportas en la lingvon siajn specifajn vortojn kaj esprimojn. Kaj vi daŭrigis:

"Da tiaj specifaj vortoj kaj esprimoj, kiel ankaŭ da kazoj de diferencoj en la semantiko, estas tiel malmulte en la lingvo, ke ili eble-eble prezentas unu procenton de la tuta lingva materialo. Sekve, la tuta cetera grandega plimulto de vortoj kaj esprimoj, kiel ankaŭ ilia semantiko, estas *komuna* (substrekis J.V.S.) al ĉiuj klasoj de la socio". (4)

La realaĵo estas precize inversa. La plej evoluintaj lingvoj posedas hodiaŭ ĉirkaŭ 400.000 vortojn (5). Shakespeare - la verkisto la plej riĉa je vortoj - skribis ĉiujn siajn verkojn per iom pli ol 14.000 vortoj. Laŭ la lingvisto M. Müller ankoraŭ en la XIX-a jarcento troviĝis vilaĝoj en Anglujo, en kiuj la kamparanoj ne sciis pli ol 400 vortojn! Meze kleraj homoj posedas kutime 4000-5000 vortojn. Tio signifas, ke la meza individua vortoprovizo estas proksimume 1 procento de la tuta vortaro de iu lingvo. Tio plue pruvas, ke la vorta materialo, kiu estas *fakte komuna* al ĉiuj membroj de iu lingva komunaĵo, inkluzivante do ankaŭ la malklerajn tavolojn, estas eĉ multe pli malalta ol 1 procento de la tuta vortoprovizo de la koncerna lingvo. Ĉio alia apartenas al la apartaj ne nur klasoj, sed ankaŭ profesioj, fakoj kaj eĉ flankaj okupoj, kiaj estas la sporto, ludoj k.s.

Kun la evoluo kaj ĉiam pli granda specialiĝo de la scienco kaj de la tekniko en la lastaj jardekoj, ĝuste tiu "specifa" parto de la nacilingvaj vortaroj treege riĉiĝis. Sed pro la ĉiam pli vigla internacia rilatado, tiu riĉiĝo normale okazadis, ĉefe ne plu sur plano nacia, sed multe pli sur plano internacia. Oni povas facile observi tiun procezon de ĝenerala proksimiĝo aŭ - alivorte dirite - internaciigo ne nur de la vorta materialo de diversaj lingvoj, sed ankaŭ de la formoj de esprimado. Escepton faris la hitlera reĝimo kaj la reĝimoj, kiuj ĝin imitis: ili provis artefarite, per politikaj kaj juraj rimedoj, haltigi tiun normalan evoluon.

Tiamaniere okazas, ke eĉ vi mem, en la malgranda parteto, kiun ni ĵus citis, uzis 7 fojojn internaciajn radikojn en 4 linioj (ruse: *specifiĉeskij, semantika* (du fojojn), *procent, material, masa, klas*). En via tuta artikolo vi uzis de 10 procentoj ĝis 30 procentoj da internaciaj radikoj depende de la demando, kiun vi

(2) "Bolŝevik" N-ro 12/1950, p. 2

(3) "Bolŝevik" N-ro 12/1950, p. 15

(4) "Bolŝevik" N-ro 12/1950, p. 17

(5) La granda "Oxford Dictionary" de la angla lingvo enhavas 414.825 vortojn.

priparolis. Se oni malatentus la ofte ripetatajn konjunkciojn, prepoziciojn kaj la plej kutimajn verbojn, kiuj kompreneble ne povas havi internacian karakteron, tiu procento ankoraŭ tre altiĝus.

Ĉio ĉi signifas, ke:

a) La lingvoj jam plurajn jarcentojn internaciigis ĉiam pli kaj pli surbaze de la ĝenerala materia kaj spirita evoluo de la homaro. La diversaj politikaj reĝimoj povas por kelka tempo artefarite bremsi tiun evoluon, sed ne povas ĝin haltigi.

b) Kelkaj branĉoj de la vivo - precipe la scienco kaj tekniko - jam tiom internaciigis ankaŭ lingve, ke specialisto de kiu ajn branĉo povas kun malpli da malfacilaĵoj kompreni verkon el sia fako skribitan en fremda lingvo, ol tiun saman verkon povas kompreni nespecialisto samlingvano. Oni provu legigi ekzemple la parton pri semantiko el via letero al kiu ajn kolĥozano kaj oni facile baldaŭ konvinkiĝos pri la vereco de tiu fakto.

c) Tiu internacia lingvomaterialo prezentas sufiĉe larĝan kaj sufiĉe solidan bazon por konstrui sur ĝi vere internacian lingvon donante al ĝi simplan gramatikan formon. Esence ĝuste tion faris la genia aŭtoro de Esperanto, doktoro L.L. Zamenhof, kies verko malgraŭ la ĉiaspecaj malfacilaĵoj kaj kontraŭstaroj, disvastiĝis tra la tuta mondo.

(4) Kiam vi parolas pri "venko de socialismo", evidente sub "socialismo" vi komprenas la reĝimon, kiu nun ekzistas en Sovetunio kaj kiu - eble kun nuancaj diferencoj - realiĝas en vico da aliaj landoj.

Konsiderante, do, ke sur tiuj larĝaj spacoj - laŭ via aserto - jam devus esti realigita la "egaleco de la nacioj" kaj "likvidita la politiko de subpremo kaj asimilado de la lingvoj", kio estas unu el la manifestiĝoj de la "mondimperialismo", oni devus atendi - denove laŭ via opinio - almenaŭ la komenciĝon de kunfandiĝo de la lingvoj en unu novan "zonan" lingvon, komunan al la nacioj vivantaj sub tiu reĝimo.

Anstataŭ tio, ĉiu povas konstati, ke la rusa lingvo estas devige instruata al milionaj amasoj da nerusaj popoloj. Samtempe la sovetaj lingvistoj proklamas tiun lingvon "instrumento de la plej progresiva civilizacio... de la plej progresiva scienco... lingvo de paco kaj progreso... granda, riĉa kaj potenca" (Prof. Lomtjjev en "*Izvestija*" de la 24-a de Majo 1950). Eĉ la nuran eblecon de internacia lingvo en la nuntempo oni atakas kiel esprimon de "kosmopolitismo, ideologio reakcia de la imperialista burĝaro" (*Voprosi filozofiji*, N-ro 2/1949). Oni ne hezitas aparte deklari, ke la rusa lingvo "ne estas nur la lingvo de U.S.S.R., sed ankaŭ la Internacia Lingvo en la popolaj demokratioj" (Prof. Jakovljev en "*Vjestnik Akademiji Nauk SSSR*", N-ro 2/1950).

Tiuj faktoj - ŝajnas al ni - parolas sufiĉe klare per si mem. Multe pli konvinke ol viaj teoriaj eksplikoj, ili klarigas la verajn kaŭzojn de via negativa starpunkto rilate al la Internacia Lingvo.

Ni tre dubas, ke la faktoj, kiujn ni objektivis prezentis en tiu ĉi letero, igos vin ŝanĝi vian starpunkton. Ne por tiu celo ni skribis al vi. Ni nur deziras klare fiksi nian starpunkton. La plua evoluo de la historio montros kiu pravos.

Londono-Parizo, Majo 1952

Estraro
de
Universala Esperanto-Asocio

Plenumkomitato
de
Sennacieca Asocio Tutmonda

Okaze de la Politika Burleskaĵo kaj Lingvosciencia Ĉarlatanaĵo

de D-ro W. Solzbacher (*)

2.1 Ĉasado al Sorĉistinoj kaj Fantomoj

En majo A.D. 1956 D-ro William Solzbacher ekrajdis la jam laciĝintan ĉevalaĉon de sia amiko (**), kaj, armita per ĉiuj lancoj, glavoj kaj ponardoj de la metio akirita en la atlernejo por ĉasado al sorĉistinoj kaj fantomoj, esprimis ĝin trote en la mondon. Nia kavaliro unue iom ekzercis sian talenton sur la kampo de cirkuleroj. Kvankam la rezultoj ne tre kontentigis lin, ĉar la plejparto de la ĵetaĵoj revenis sur lian propran kapon, dum la cetero maltrafis eĉ la sapobalonojn, kiujn li mem ŝvelblovis, li tamen opiniis sin sufiĉe forta por ekmiliti sur la tereno de "objektiva kritiko", kiel li laŭte kriis por kuraĝigi sin mem kaj kredigi naivulojn.

Tiel, do, nia heroo jam plenajn 22 monatojn kuraĝe ĵetas siajn lancojn en vakuon, tranĉas kaj traboras per siaj ponardoj la aeron, glavsvinge draŝas la fojnon. Spektaklo eksterordinare amuza, se ĝi ne estus samtempe tragika, kiu per si mem meritis esti priskribita de talenta humoristo en la humora parto de belarta revuo.

Sed li tuŝis ankaŭ du-tri principajn demandojn, kies pritrakto povus helpi al pli bona kompreno de la pozicio de Esperanto el lingvistika kaj sociologia vidpunktoj. Tial, nur kaj precize tial, mi skribas tiun ĉi artikolon.

2.2 La Solaktoro de la Tragikomedio

D-ro Solzbacher komencis la novan serion de atakoj en "Amerika Esperantisto" de majo/junio 1956. La formo estas tiu de la iamaj kriminalaj filmoj (en 6,7 k.t.p. "epokoj") aŭ de la lastrangaj detektivromanoj en samkvalitaj vesperaj gazetoj: en daŭrigoj kun la "streĉa pinto" ĉe la fino de ĉiu parto. La tuta enhavo estas tia, ke oni tion povas nomi nek recenzo aŭ kritiko, nek diskuto aŭ polemiko, eĉ ne persona atako pro idea malkonsento, sed tute simple plej vulgara politika burleskaĵo de speciala speco kun elementoj tiom komikaj, kiom tragikaj: komikaj pro la nekredeble ridinda naiveco de la ruzo utiligata por renversi faktojn kaj falsi la veron; tragikaj pro tio, ke la esenco de tiu grandega fortostreĉo, daŭranta jam dudek monatojn, estas nenio alia ol false denunci. La kvintesenco mem resumiĝas en du solaj vortoj: de numero al numero kiel subtitolo de tiu ĉeno da fiaj absurdaĵoj aperas sur la kovrilpaĝo - kiel la plej fia kaj la plej absurda el ĉiuj - mia nomo apud tiu de Stalin. Kaj estas vere tragike vidi, ke homo kun doktora titolo, laŭdire aktiva katoliko, povas malleviĝi al tiel malaltaj fundoj ne de ordinara denunciado - kio, kvankam certe ne tre digna okupo, povas tamen esti almenaŭ iusence komprenebla - sed de falsa denunciado. Por tio mi ne trovas alian vorton ol tragedio.

(*) Represita el *Belarto*, n-ro 1, aprilo, 1958, tiutempe redaktata de William Auld. *Belarto* estis suplemento al la revuo *Esperanto*.

(**) G. A. Connor, tiutempe agente de makartismo en la Esperanto-Movado. Eksigita el UEA en 1956.

D-ro Solzbacher komencis la serion per drameca parto kun aparta subtitolo "*Dramatis Personae*", en kiu li donis kelkajn biografiajn notojn pri la sovetaj lingvistoj Marr kaj Ĉikobava, pri Stalin, Drezen kaj, kompreneble, pri mi mem. La celo estis tuj en la komenco bone miksi ĉion por povi pli efike konfuzi. Ne interesas min la ĝusteco aŭ malĝusteco de tiuj notoj koncerne la aliajn. Pri mi li donis tie la jaron kaj lokon de mia naskiĝo kaj tio estas du el la malmultaj veraj diroj pri mi en la tuta serio. Eĉ en la kelkaj linioj de la biografia noteto li skribis malĝustaĵojn - ekzemple, ke mi estas aŭtoro de la verko *La Internacia Lingvo*, kvankam sur la kovrilo klare estas skribite kaj en la enkonduko same klare dirite, ke mi nur redaktis ĝin - aŭ ellasis gravajn faktojn.

Estas necese rekoni, ke li ne donis informojn pri mia harkoloro, alteco, la mezuroj de la korp parto (*vital statistics*), nek li sciigis pri mia jara aŭ semajna enspezo, kiel tion kutime faras certa speco de gazetoj priskribante filmstelulinojn aŭ similajn gravajn personecojn. En tiu serio li uzis pri mi multajn insultajn vortojn. Li ankaŭ plurfoje, kun evidente ofenda intenco, parolas pri mi kiel pri "tiu eksprofesoro", "tia fakulo pri internaciaj rilatoj" aŭ simile, sed li, kompreneble, prisilentas du faktojn: (1) ke mi ĉesis instrui en la Universitato nur tial, ĉar mi propravole, pro principaj kaŭzoj, forlasis mian landon; (2) ke malgraŭ la lingva obstaklo mi estis invitita kunlabori - kaj efektive laboras ankaŭ nun - en samrangaj sciencaj institucioj de la Okcidento. Ankaŭ la prisilento de tiuj du faktoj - kaj de multaj aliaj - estis farita intence ne nur por insulti, sed ankaŭ por "apogi" la menciitan ĉefan celon. Cetere, D-ro Solzbacher ne povas kaj verŝajne neniam povos esti "estinta" profesoro, ĉar li neniam estis, nek verŝajne estos "estanta".

2.3 Misuzo de Preseraroj

Ne ekzistas libro, kiu ne povus esti plibonigita. Ĉiu plia eldono de grava verko kutime enhavas plibonigojn kaj kompletigojn. En ĉiuj lingvoj kaj en ĉiuj fakoj estas tiel. Verko kiel *La Internacia Lingvo* ne povis esti escepto. Des malpli, ke en ĝi estas amasigitaj faktoj kaj nomoj, tiel ke preskaŭ ĉiu linio enhavas almenaŭ po unu kaj kelkaj eĉ plurajn. Se oni konsideras la fakton, ke antaŭ la fondiĝo de CED en 1952 ne ekzistis en la Esperanto-Movado iu institucio, kiu sisteme okupiĝus pri esploroj kaj dokumentado kaj ke la verko aperis en 1954, estas surprize, ke ĝi ne entenas pli da korektindaj aŭ plibonigindaj punktoj. En la tempo de la redaktado CED funkciis iom pli ol unu jaron kaj, en tiaj kondiĉoj, estis necese apogi sin al diversaj verkoj publikigitaj pli frue de unuopuloj. Malgraŭ la kelkaj eraroj kaj mankoj - pri kiuj neniu pli bone konscias ol mi mem - ĝi plenumis kaj plenumas efike sian rolon kaj helpas al orientiĝo. Pluraj sinceraj kunlaborantoj atentigis pri dezirindaj aŭ necesaj plibonigoj, kaj iliaj atentigoj estis kaj estas akceptataj kun danko. Tiaspecaj rimarkoj, atentigoj, kritikoj, eĉ akraj kritikoj, se ili estas lojalaj kaj bonintencaj, estas ĉiam bonvenaj. Ili helpas al plibonigoj kaj sekve kontribuas al pli utila laboro.

D-ro Solzbacher ne agis tiel. Li unue laŭde diris, ke en la verko "preskaŭ tute mankas" preseraroj (A.E., 1956, p. 84) por povi sur la sekvantaj paĝoj utiligi ĉiun efektivan preseraron, eĉ la plej evidentan, kiel eraron pri fakto. Kaj tion li faris ne pro malatentemo, sed tute konscie.

Jen kelkaj ekzemploj:

En la verko *La Internacia Lingvo* estas dirite sur la p. 46, ke ekzistas lernolibroj de Esperanto en 84 lingvoj. Tio estas preseraro. En la manuskripto estis menciite 52 lingvoj. Kompreneble D-ro Solzbacher ne vidis la manuskripton, sed li certe vidis la dokumenton de CED CED/4, ĉar ĝi estis sendita al li. En tiu dokumento estas dirite, ke lernolibroj de Esperanto ekzistas en 52 lingvoj. Kaj tiu dokumento estis verkita proksimume samtempe kiel la koncerna ĉapitro de *La Internacia Lingvo*.

Plue, tuta parto sub aparta subtitolo estas dediĉita al "pruvado" ke mi ne scias - adicii! Li citas jenan parteton el la I.L.: "La Universala Vortaro de 1894 enhavis 2.599 vortradikojn. La ses oficialaj aldonoj de la Esperanta Akademio enhavas 1.758 vortradikojn plus la nova sufikso *-end*, entute 1.759. Sekve, la oficialaj vortradikoj en la komuna uzo estas 4.423."

Eĉ infanoj komprenus, ke tie devas temi pri ia eraro. Des pli, ke sur la sekvanta paĝo de la libro troviĝas jena frazo: "Estas rimarkinde, ke el la 7.866 radikoj en komuna uzo, la fundamentaj kaj oficialigitaj sumiĝas je nur 4.425". Tiun frazon D-ro Solzbacher bone vidis, ĉar li reproduktis ĝin. Li do devis supozi, ke sur paĝo 33, verŝajne post la dua korekto de la presprovaĵoj, elfalis tuta frazo, kiu tekstis: "La fundamentaj radikoj estas 2.666." Tion li ne povis ne vidi, ĉar sur la paĝo 34 estas klare dirite "fundamentaj kaj oficialigitaj". Mi opinias, ke en la tuta kultura historio de la homaro ne estis farita "recenzo", en kiu surbaze de tiaspeca evidenta preseraro oni asertus "D-ro Lapenna ne majstras la belan arton de elementa aritmetiko", kiel tion faras D-ro Solzbacher misuzante bedaŭrindan ellason de frazo kaj preseraron en cifero.

Plue, pro preseraro, sur la paĝo 85 de *La Internacia Lingvo* estas presite: ".....*Shintaro, Kawakita Susumo, Suzuki*....." La tuta eraro konsistas en tio, ke la komo devus troviĝi inter Kawakita kaj Susumo. D-ro Solzbacher povis tion rimarkigi per unu frazeto, se li vere opiniis tion epokfara eltrovo. Anstataŭe li skribis tutan alineon kaj plenigis ĝin per nekredeblaj akrobataĵoj. Evidente, li ekspluatis la nefamiliarecon de la japanaj nomoj por aranĝi tiun ludon.

Li pacience legis eĉ la kompletan indekson por trovi tie sur la paĝo 191 la nomon *Vrbax* kaj montri ĝin kiel gravan eraron, sed ne menciis, tute laŭ sia stilo, ke la sama nomo estas korekte skribita - *Vrba* - sur la paĝo 66. La preseraro *Kaŭzaka* (anstataŭ *Kaŭkaza*) estas ankaŭ tiaspeca "eraro de fakto". K.t.p., k.t.p. Oni povus longe daŭrigi, sed tio estus enuiga por mi same tiel, kiel por la legantoj.

Preskaŭ ĉiu preseraro aŭ, du fojojn, tajperaro, estas misuzita. Surbaze de tiaj eraroj - bedaŭrindaj, mi ripetas - li provis prui al la senpaga legantaro de sia gazeto, dissendata abunde tra la mondo, ke mi ne nur ne scias la elementan aritmetikon, geografion k.s., sed ankaŭ kaj eĉ - mian gepatran lingvon!! Mi vere dubas ĉu li sukcesis konvinki eĉ sin mem pri tio.

Mi deziras aldoni, ke tute certe la preseraroj, precipe en tiaspeca verko, estas vere ĝenaj. La situacio estas kutime tia, ke la kompostisto ne scias Esperanton. Sekve, troviĝas en la presprovaĵo relative multe pli da eraroj ol en samspeca teksto kompostita en lingvo konata de la kompostisto. La malfacilaĵo komplikiĝas pro la fakto, ke tre ofte, korektante iun eraron, la kompostisto faras alian aŭ eĉ plurajn en la rekompodata linio. La sola solvo de tiu problemo estas presigi en presejoj, en kiuj laboras kompostistoj kun la scio de la Internacia Lingvo.

2.4 Iom, sed Vere nur iom da Nova Logiko

La "recenzoj" kaj "kritikaj prijuĝoj" de D-ro Solzbacher ampleksas ĝis nun, laŭ mia scio, kvardekon da paĝoj. En la momento, kiam tiuj ĉi linioj estos legataj, ilia nombro certe estos konsiderinde pli granda. Oni devus skribi tutan libron por montri laŭvice ĉiujn malĝustaĵojn, miscitaĵojn, ellasojn, sofismojn, logikajn sinmortigojn kaj ĉiaspecajn aliajn absurdaĵojn, kiuj ornamas ĉiun alineon de tiu vere unika papermonumento al la intelekta marĉo de nia epoko. Sed mi ne intencas perdi mian tempon por verkado de tiaspeca libro. Tial, antaŭ ol pritrakti la du-tri principajn demandojn, mi ĉi tie limigos min al analizeto de nur unu el la plej elstaraj ekzemploj de "logiko", kiujn mi iam renkontis en mia vivo.

D-ro Solzbacher komencis la unuan daŭrigon de la dua sturmatako (A.E., 1957, p. 83) per citaĵoj el du sovetaj lingvistikaj verkoj kaj per paralelaj citaĵoj el mia verko *Retoriko* kaj el la libro *La Internacia Lingvo*, kiun mi redaktis. Sur la

maldekstra flanko de la paĝo troviĝas citaĵo el la verko de R.O. Ŝor kaj N.S. Ĉemodanov *Vvedeniĵe v Jazykovedeniĵe*, publikigita en Moskvo en 1945, kiu tekstas (mi citas laŭ Solzbacher):

"La aserto... ke la evoluo iras de unulingveco al multlingveco... ne respondas al la historiaj faktoj... La lingvo evoluas de primitiva multlingveco al unuecaj formoj respondantaj al la formoj de la homa socio estiĝantaj sur diversaj ŝtupoj de la historia evoluo (hordo, tribo, popolo, nacio)."

Sur la dekstra flanko estas presita jena citaĵo el *Retoriko* (p. 28) (*):

"Ĉar en larĝaj, grandaj linioj la homaro iras de la iama ĉiaspeca disrompiteco (hordoj, triboj, gentoj, popoloj, nacioj, unuflanke; okupoj, kasto, klasoj, aliflanke) al unueco, la lingvo ankaŭ evoluas de la iama tre granda multlingveco al baldaŭa unulingveco."

La libron de Ŝor kaj Ĉemodanov mi ne legis, ne posedas ĝin kaj ne iros en bibliotekon por kontroli la korektecon de la citaĵo. Mi akceptas, ke ĝi estas ĝuste represita.

Post la menciitaj du citaĵoj sekvas, denove maldekstre, mallonga frazo el la verko de A.S. Ĉikobava *Vvedeniĵe v Jazykoznanije*, kies dua eldono estas publikigita en Moskvo en 1953. Tiu citaĵo tekstas:

"Kio do estas la lingvo? - La lingvo estas socia fenomeno."

Dekstre troviĝas citaĵo el *Retoriko* kaj el *La Internacia Lingvo*, en kiu mi diris:

"La lingvo estas socia fenomeno."

Iom poste estos preparolita la socia karaktero de la lingvo kaj ĝia evolutendenco. Por la momento ni restu nur ĉe la formala logiko.

La tuta senco de tiu preskaŭ tutpaĝa citado kun komentario estas "logike" "pruvi" la pravecon de la denunco apudmeto de la du menciitaj nomoj. La rezonado laŭ tiu "logiko" estas proksimume jena: La libro de R.O. Ŝor kaj N.S. Ĉemodanov, kiel ankaŭ tiu de A.S. Ĉikobava, estas la ĉefaj lernolibroj de la "marksista-leninista-stalinista lingvo-scienca" (vortoj uzitaj de D-ro S., p. 83) - La citaĵoj el la verkoj de Lapenna respondas al la citaĵoj el la verkoj de Ŝor & Ĉemodanov kaj Ĉikobava - Sekve la konceptado de Lapenna respondas al "marksista-leninista-stalinista lingvoscienco".

Mi lasas flanke la stultecon de la formulo "marksismo-leninismo-stalinismo", kiu estis lanĉita en Soveta Unio sub la regado de Stalin kaj poste preskaŭ ĝenerale akceptita ankaŭ en la Okcidento (fakte, se Marx kaj Engels estus vivintaj sub la stalinisma reĝimo, ili certe estus "likviditaj" pro "devojiĝoj de marksismo!"), ĉar tio ne estas interesa el vidpunkto de la formala logiko de D-ro Solzbacher.

"Silogismojn" de lia supra speco faradas eĉ ne malgrandaj gimnazianoj, kiam ili lernas la unuajn rudimentojn de logiko. Kaj se hazarde ili tamen faras tian eraregon, ili ricevas malbonan noton. Kun la sama logiko, absolute sama, oni povus skribi: *Stalin skribis pri la teorio de Marr, ke ĝi estas stultaĵo - Solzbacher skribis pri la teorio de Marr, ke ĝi estas stultaĵo - Do, Solzbacher estas stalinisto!!!!*

Vere mi dubas, ke tiel profunde logika penso estis iam produktita de homa cerbo.

Sed ĉar supozeble D-ro Solzbacher intencas daŭrigi tiaspecan logikadon, mi tuj liveras al li novan bonegan materialon per parto de la subtitolo de tiu ĉi artikolo: *Lingvosciencan Ĉarlatanaĵon*, kiu objektivite karakterizas la adekvatan enhavon de lia serio *Ĉarlatana Lingvoscienco*. Mi eĉ helpas lin por ŝpari al li la

(*) Temas pri la 1-a eldono de *Retoriko*, Parizo, 1950.

tempon de serĉado. Marx skribis sian verkon *Mizero de la Filozofio* responde al tiu de Proudhon *Filozofio de la Mizero*. Do, principe sama vortludo, do k.t.p. laŭ la supra formulo. Per tiu sugesto mi eĉ donas al li la eblecon skribi kelkajn pliajn paĝojn "pruvante", ke mi neniam vidis la verkon de Proudhon, ĉar la plena titolo ne estas precize tia, k.t.p., k.t.p.

Pro la vero estas necese diri, ke D-ro Solzbacher ne asertis, ke mi kopiis la citaĵon de Ŝor kaj Ĉemodanov, nek ke mi transskribis el la libro de Ĉikobava, aperinta en 1953 (aŭ en 1952), en la verkon *Retoriko*, kiu estis publikigita en 1950.

2.5 Lingvo kiel Socia Fenomeno

Eĉ se ĉiuj lingvistoj de la mondo asertus, ke lingvo ne estas socia fenomeno, la realaĵo dementus ilin same tiel, kiel la realaĵo dementas tiujn treege multnombrajn el inter ili, kiuj eĉ hodiaŭ neas la efektivan ekziston de Esperanto kiel plena lingvo, samranga en tiu sia karaktero al ĉiuj aliaj.

Kio, do, povus esti la lingvo, se ĝi ne estas socia fenomeno en duobla senco: 1) ke ĝi ekestis paralele kun la formiĝo de la homo helpante en la sama tempo siavice tiun formiĝon, ke, do, ĝi estas *ekskluziva apartenaĵo* de la homa socio kaj 2) ke tiu ekesto, evoluo kaj ĉiuj pluj transformiĝoj okazis ne kiel rezulto de individua arbitra volo, sed kolektive, en la kadro de la socio, sub la influo de la fortoj agantaj en ĝi?

Se ni esceptas diversajn mistikajn kredojn (1), la respondo en tiu okazo povus nur esti, ke la lingvo estas ia natura, biologia aĵo. La unua kaj la plej ĝenerala sekvo de tiu starpunkto necese estus - por ne paroli pri la plujaj konsekvencoj - ke al la lingvo devus esti aplikataj la leĝoj de la naturo, leĝoj biologiaj kaj ne tiuj tute specialaj, agantaj en la homa socio.

Kompreneble, neniu neas la bezonon daŭre studi la naturleĝojn por kompreni ĉiam pli bone la mondon kaj la homon kiel parton de tiu mondo en lia alia kvalito, t.e. en tiu de natura vivanta estaĵo. Speciale la fiziologio de la voĉorganoj kaj de la cerbaj parolaj kaj aŭdaj centroj ĉe la homo, precipe se la studo etendiĝas al la tuta evoluo de tiuj organoj, estas tre utila. Sed tiuj studoj, kvankam ege helpaj por la kompreno de la meĥanismo de la parolkapablo kaj de ĝia evoluo, tamen ne klarigas la esencon mem de la lingvo. Multaj aliaj vivantaj estaĵoj laŭ sia propra naturo eligas diversajn tre variajn sonojn aŭ bruojn kaj tiamaniere *instinkte* esprimas kelkajn fundamentajn sentojn: malsaton, timon, pariĝemon k.s. Tamen tiuj sonoj kaj bruoj havas ian signifon ne per si mem, nome kiel konsciaj indikantoj de tiuj sentoj aŭ statoj, sed nur kiel *integra parto* de la konkreta konduto, laŭ la naturo mem de la koncerna animalo (2). Kelkaj animaloj, precipe pluraj hejmaj bestoj, povas esti "edukitaj" reagi al diversaj vortoj aŭ, escepte, eĉ al desegnitaj figuroj. Ili "lernas" ankaŭ postuli ion: ekzemple la hundoj per bojado aŭ la katoj per miaŭado. Papagoj ripetas frazojn en diversaj lingvoj. Iuj asertas, ke eĉ orangutango, hundo, ŝafo estis

(1) Nia epoko ne estas senigita de tia mistikismo. Laŭ *Evening Standard* (Londono), la Irlanda Eldona Kompanio publikigis en New York en 1943 libron, en kiu oni pruvas ke "la Biblio estas skribita de irlandanoj kaj ke la hebrea lingvo estas nur dialekto de la kelta". - Turka lingvista kongreso, okazinta en 1934, tute serioze diskutis la aserton, ke la turka lingvo troviĝas en la radikoj de ĉiuj lingvoj, ĉar ĉiuj vortoj estas derivitaj de *günes*, nome "suno" - la unua objekto, kiu postulis ian nomon. (Laŭ Mario Pei, *The Story of Language*, London, 1957, p. 18).

(2) Multaj bestoj produktas diversajn sonojn kaj bruojn ne nur per la buŝo, sed ankaŭ alimaniere. Ekzemple, la ĉevaloj, se ili estas incititaj, produktas pli aŭ malpli ritman bruon per eligado de gasoj el la anuso. Ŝajnas ke tiu bruo havas emocian signifon. Ĝi transportiĝas al aliaj ĉevaloj, kiuj siavice produktas la saman bruon.

"instruitaj" diri kelkajn vortojn (3). Tamen, ĉio ĉi ne estas lingvo en la vera senco, nome en la senco de aparta instrumento, organizita kiel sistemo de signoj, ĉefe sonaj, reprezentantaj ideojn kaj servanta por konscia komunikado kaj pensado. La animaloj povas boji, miaŭi, iai, heni, trili, kluki, ululi, bleki diversmaniere, sed ili ne povas paroli. Kiam ili eligas tiujn diversajn sonojn aŭ bruojn, tio okazas kiel *integra parto* de la konkreta sento - ĝojo, timo, doloro, malsato k.s. - kaj *ne kiel nomado* de tiu sento. Kvankam la fiziologia bazo de la lingvo estas la kapablo eligi sonojn - kaj ankaŭ tiu kapablo ĉiam pli perfektigis paralele kun la evoluo de la lingvo - tamen ĝi per si mem ne estas lingvo. Nur kiam difinita sono aŭ sonkomplekso ligiĝas al difinita objekto aŭ ideo, ricevante tiamaniere certan signifon, kiun aliaj homoj akceptas kiel tian, ekestas lingvo. *Tian lingvon posedas nur la homo kaj li akiris ĝin en la procezo de sia formiĝo kiel homo.*

Temas nun pri tio, ke precize tiun lingvon, do la lingvon, oni provis ekspliki kiel naturan, biologian aĵon, kaj ne kiel socian fenomenon.

Tiu "natureca" ideo servis kiel elirpunkto de multaj teorioj kun plej diversaj nuancoj. Malatentante la diferencojn en la detaloj, oni povas diri, ke ilia komuna trajto estas rigardado al la lingvo kiel al io, kio estas *ennaskita*, apartenanta laŭ la naturo mem al la homo, do *integra parto de li kiel biologia estulo*, tute adekvate al la krioj kaj bruoj produktataj de la bestoj. Tiuj teorioj fakte identigas la antaŭlingvan (kaj sekve, laŭ mi, antaŭhoman) stadion de la homaj antaŭuloj el la animala mondo al la lingva stadio de *Homo Sapiens*. Eble nenio pli bone ilustras la esencon de tiu starpunkto, ol la fakto, ke eĉ Skta Bazilo estis akuzita de Eŭnomio (Eunomius) pro ateismo tial, ĉar li opiniis, ke la infanoj "lernas paroli"! Tiel *ennaskita* estas, do, la lingvo (ne la voĉprodukta aparato), ke infanoj ne akiras ĝin de sia ĉirkaŭaĵo, sed ĝi ekzistas kiel konsista parto de ilia homa naturo mem, ĉe kio ne multe gravas en tiu ĉi kunteksto ĉu tiu naturo estas konsiderata kiel antaŭfiksita de supernaturaj fortoj aŭ ne.

Diference de tiu rigardado al la lingvo kiel natura aĵo en tiu ĉi aŭ tiu senco, aliaj jam delonge komencis observi ĝin kiel socian fenomenon. Oni komprenis, ke se la lingvo estas io ekzistanta sole en la homa socio, ĝi povas esti eksplikita nur kiel socia fenomeno. Ankaŭ tiu elirpunkto servis por multaj teorioj, malsamaj inter si kaj ofte kontraŭantaj unu la alian. Sed ili havas unu ĝeneralan trajton: ili rigardas la lingvon kiel socian fenomenon, kio ĝi ja objektive estas. Hodiaŭ ne troviĝos unu sola iom serioza filologo aŭ sociologo, kiu ne konsentos pri tiu fundamenta fakto. Alia afero estas, ke ekzistis kaj ekzistas diversaj interpretadoj de tiu fakto.

Mi ne estas unu el tiuj, kiuj juĝas la ekcepteblon aŭ malakcepteblon de iu teorio laŭ la naskiĝloko de ĝia aŭtoro aŭ laŭ la politika reĝimo de la lando, en kiu li agas, sed mia sola kriterio estas ĝia interna valoro, surbaze de pruvitaj faktoj kaj raciaj argumentoj. Sed ĉar D-ro Solzbacher evidente havas alian starpunkton, ni malleviĝu por momento al lia konceptado kaj ni donu kelkajn citaĵojn de rekonitaj aŭtoroj nur en la Okcidento, kiuj esprimis adekvatajn pensojn al tiuj entenataj en la supraj citaĵoj de Ŝor, Ĉemodanov kaj Ĉikobava.

Proksimume cent jarojn antaŭ ol aperis la libro de Ŝor kaj Ĉemodanov, la konata lingvisto Max Müller skribis en sia verko *Lekcioj pri la Scienco de la Lingvo*:

"Same kiel ekzistis pli frue familioj, klasoj, kuniĝoj, triboj antaŭ ol ekzistis nacio, tiel same ekzistis dialektoj antaŭ ol ekzistis lingvo." (4)

(3) Ekzistas raporto, laŭ kiu orangutangino estis instruita imiti la vorton "*papa*". Alia asertis, ke li povis dresi hundon nombri de unu ĝis tri kaj diri la vorton "*sukero*". Je informo el Usono, ke ŝafo estis instruita paroli, la humorista gazeto *Punch* (Londono) sprite rimarkigis: "*Says ewe!*" (Ĝi diras ŝafino", prononcata same kiel "*says yuo*", amerikanismo eldirata kiam oni ne kredas ion, proksimume kun la signifo "rakontu ĝin al iu alia").

(4) Max Müller, *Lecture sopra la Scienza del Linguaggio*, itala traduko el la 3-a angla eldono, Milano 1864, p. 179.

Kaj aliloke en la sama libro, pritraktinte la formiĝon de la latina, li konkludis:

"Se la plebanoj estus superregintaj anstataŭ la patricioj, la latina estus estinta tre diferenca de tiu, kiu troviĝas ĉe Cicerono." (5)

La fama A. Meillet diris en sia verko *Lingvistiko Historia kaj Lingvistiko Ĝenerala*:

"Fakte la lingvoj ne estas objektoj havantaj aŭtonoman materian ekziston kaj evoluantaj per si mem. Lingvo estas institucio apartenanta al socio kolektivo, kaj la modifoj, kiujn ĝi trapasas, estas ligitaj al la historio de tiu kolektivo." (6)

Nu, ni citu ankaŭ elstaran usonan lingviston. Parolante pri la influo de la ĉirkaŭaĵoj al la lingvo, E. Sapir distingas inter la fizika kaj socia ĉirkaŭaĵoj, kaj diris:

"Per aliaj vortoj, kiom la lingvo estas koncernata, la tuta ĉirkaŭaĵa influo reduktiĝas en la lasta analizo al la influo de la socia ĉirkaŭaĵo." (7)

Ĉu ankoraŭ daŭrigi? Ĉu menci i ankaŭ la Svison F. de Saussure, kiu fondis sian sociologian skolon sur la fakto, ripetita de li plurfoje, ke "*la lingvo estas socia fenomeno*"? Kaj ĉu alia Franco, J. Vendryès, ne akcentis en sia verko *Le Langage*, ke "*la lingvo kiel socia fenomeno povis ekesti nur tiam, kiam la cerbo de la homo estis sufiĉe evoluinta por utiligi la lingvon...*", ke, plue, "nur esplorante la *socian rolon* de la lingvo estas eble ricevi imagon kio estas lingvo", k.t.p., k.t.p.

Se iu amuziĝas fari "silogismojn" laŭ la nova "logiko" de D-ro Solzbacher, li apudmetu ĉi tiujn citaĵojn al tiuj de Ŝor & Ĉemodanov kaj Ĉikobava, aŭ al la miaj el *Retoriko*. Koncerne D-ron Solzbacher ekzistas nur du eblecoj: aŭ li ne sciis, ke la lingvo estas socia fenomeno kaj ke multaj elstaraj lingvistoj esploris ĝin kiel tian, aŭ li sciis tion, sed intence prisilentis. En la unua okazo li estas ignoranto, en la dua mallojala (plej milde dirite).

Estas utile aldoni, ke, kvankam hodiaŭ estas ĝenerale forĵetita la penso pri la lingvo kiel natura aĵo, tamen la ideo pri la "natureco" de la lingvo reaperas eĉ nuntempe en tiu aŭ alia formo, sub tiu aŭ alia preteksto, kun tiu aŭ alia celo. Se la uzo de tiuj terminoj havus la karakteron de ia poezia komparo, tio ne multe ĝenus. Sed ne estas tiel. Ili estas uzataj en sia vera senco kvazaŭ la naciaj lingvoj estus iaj *naturaj elkreskaĵoj* de *nature* vivanta organismo, la nacio, dum la Internacia Lingvo estus io "artefarita" en senco de *kontraŭnatura*, "elpensita" de unu homo kaj tial do sen eblecoj evolui, sen literaturo, sen karaktero de vivanteco... kun la fina blinkenberga rezulto, ke ĝi entute ne estas lingvo.

Se la starpunkto de Prof. Blinkenberg (*) en Montevideo estus izolita, lia nomo ne estus enkondukiĝinta en la lingvon kiel neologismo por difinita konata koncepto. Ne estas hazardo, ke en la grandega verko de A. Meillet kaj M.

(5) *Verko cit.* sub 4), p. 60.

(6) A. Meillet, *Linguistique Historique et Linguistique Générale*, Parizo 1926, Vol. 1, p. 79.

(7) *Selected Writings of Edward Sapir*, redaktita de David G. Mandelbaum, Londono 1949, p. 90.

(*) Prof. Blinkenberg, membro de la Dana Delegacio dum la Ĝenerala Konferenco de Unesko en Montevideo (1954), kontraŭscience atakis Esperanton en la Programkomisiono. Li kaŭzis grandan kulturalan skandalon. La 10-an de decembro 1954 la Pleno de la Ĝenerala Konferenco akceptis la jam faman Rezolucion favore al Esperanto. - Post la forpaso de Prof. Blinkenberg liaj "paperoj" estis deponitaj en la Ŝtata kaj Universitata Biblioteko de Århus. La afero pri Esperanto en Montevideo formas apartan, tre grandan dosieron. Analizo pri tiu dosiero troviĝas en *Horizonto* n-ro 1/85, p-oj 3-6.

Cohen *Les Langues du Monde*, en kiu estas prezentitaj ĉiuj, eĉ la plej malgravaj lingvoj de la mondo, Esperanto ne trovis lokon. Ankaŭ ne estas hazardo, ke, se fine oni tamen decidiĝas prezenti ankaŭ Esperanton, kiel tio okazis en la verko de Mario A. Pei *The World's Chief Languages*, la aŭtoro tuj protektas sin per rezervo, ke la enmeto de Esperanto "devas ne esti interpretita kiel signifanta pledon aŭ aprobon fare de la aŭtoro de ĝiaj principoj aŭ de ĝia konstrumetodo". Kion oni prave povas postuli de la lingvistoj, se ili vere deziras esti fidelaj al sia propra scienco, estas ne "pledi" aŭ "aprobi" la Internacian Lingvon - same kiel neniu postulas, ke ili "aprobu" kiun ajn lingvon - sed tute simple koni Esperanton kaj *rekoni ĝin kiel socian faktan kun ĉiuj sekvoj de tiu rekono.*

Kun la escepto de kelkaj honorindaj (mi eĉ kuraĝus diri ankaŭ aŭdacaj) filologoj, ĝenerale la lingvosciencaj specialistoj tion ne faras. Se oni malkovras ian forgesitan lingvon de iu tribo fortranĉita de la cetera mondo ie en Centra Afriko, oni formas ekspedicion, elspezas konsiderindajn sumojn, eldonas librojn pri tiu nova eltrovaĵo. Sed kiam la Internacia Lingvo estas alportata per sia literaturo, per siaj diversaj aplikoj en la vivo, per la kongresoj kaj konferencoj al la sojlo de la laborkabinetoj de la filologoj, tiam ili ne vidas aŭ ne volas vidi ĝin. Antaŭ iliaj propraj okuloj, fermitaj bedaŭrinde, ekestis, formiĝis kaj plu evoluas nova lingvo, ĉifoje tuthoma, kiel esprimo de tuthomaj tendencoj surbaze de la plej pura internaciismo, lingvo sur kiu ili povus - senkonsidere al la simpatio aŭ malsimpatio por ĝia idea fono - perfekte studi interalie ankaŭ la socian karakteron de la lingvo entute. La funkciado de la Internacia Lingvo en la praktiko prezentas per si mem - eĉ se oni flankelasas la kulturajn valorojn kreitajn en ĝi kaj ĝian socian rolon - tian unuarangan lingvan sperton, ke se pro nenio alia, do nur pro ĝi la lingvoscienco devus serioze ĝin studi. Tia studo de Esperanto *ne kiel teoria projekto, sed kiel socia fakto* povus, mi estas certa, multe kontribui al pli bona kompreno de tiuj sociaj fortoj en la plej larĝa senco de la vorto, kiuj ekestigas la lingvon, evoluigas ĝin, helpas aŭ malhelpas ĝian disfalon - ĉio demandoj, kiuj treege interesas la lingvosciencan.

Sed la lingvoscienco - kun kelkaj esceptoj, mi ripetas - ignoras tiun faktan kaj tial aŭ prisilentas ĝin, aŭ, se ĝi entute iel esprimas sin, faras tiajn apriorajn asertojn kaj diras tiajn absurdaĵojn, ke vere tiu tuta babilado havas nenion komunan kun la realaĵo nek kun la elementaj postuloj de scienca pritrakto. Tiel agas ne nur la kontraŭuloj de la ideo mem, sed ankaŭ filologoj, kiuj persone ne malsimpatias al ĝi kaj kiuj alie klopodas realece rigardi al la lingvo kiel al socia fenomeno, sed kiuj ne iras ĝis la lastaj konsekvencoj de tiu principe korekta elirpunkto. La ĝisnuna pozicio de la lingvoscienco rilate al la Internacia Lingvo estas la plej malbona atestilo, kiun ĝi povis doni ne al Esperanto, sed al si mem. La unua paŝo, kiun ĝi devus fari por forviŝi la malbonan noton, estus liberigi sin de la "natureca" fetiĉo ankaŭ kiam temas pri Esperanto, kiel ĝi ĝenerale liberiĝis de ĝi studante ĉiujn aliajn, ne nur la naciajn, lingvojn. Farinte tiun paŝon, ĝi normale marŝos antaŭen.

2.6 La Lingvoevoluo

D-ro Solzbacher skribis, ke laŭ la gazeto *Voprosy Yazykoznanija*,

"oni nun eĉ en Moskvo definitive forĵetis la fantaziajn lingvosciencajn tezojn de Stalin, samtempe kondamnante denove la absurdajn teoriojn de Marr, kiujn Lapenna reklamas en *Retoriko*". (A.E. 1957, p. 54).

Sur la sama paĝo denove:

"En Esperanto disvastigis la ĉarlatanaĵojn de Marr... la unua parto de la libro *Retoriko* de Ivo Lapenna."

Kaj tiel li daŭrigas de unu paĝo al la alia, de unu "epoko" al la alia, ĉiam kun la sama celo: "pruvadi" al siaj legantoj ne nur ke mi akceptis la *lingvistikan*

teorion de Marr (kio por lia efektiva celo havas absolute nenian signifon), sed ke mi akceptis ĝin *pro la politika forto*, kiu troviĝis malantaŭ ĝi (kaj tio precize estas la esenco mem de lia tuta fantomromano). Li skribis:

"La sola faktoro, kiu iam donis ian gravecon al la fantaziaĵoj de Marr, estis la potenco de Stalin... Nenio restas de tiu absurda kaj senkredigita eksteorio de la marksismo-leninismo-stalinismo escepte de la Unua Parto de la *Retoriko* de Lapenna kaj de la versoj en la *Infana Raso* de Auld." (p. 90)

Denove, do, la fama "logiko", sed ĉi-foje eĉ pli brila, kiel oni tuj vidos.

Pri la t.n. "lingvosciencaj" tezoj de Stalin ne meritas perdi unu solan vorton. Tiom, kiom tiu politika movo koncernis la Esperanto-Movadon, ĝi ricevis siatempe taŭgan respondon. (*)

Rilate al la teorio de Marr, same kiel rilate al teorio de kiu ajn alia, mia kriterio ne estas kaj ne povas esti la demando, ĉu ĝi ĝuas apogon de iu reĝimo, aŭ ne. Tio ne interesas min. Sekve, mi estus povinta ankaŭ plene akcepti tiun teorion, se mi estus opiniinta, ke ĝi meritas esti akceptita pro ĝia fakta valoro. Kaj tion mi estus farinta tute sendepende de tio, ĉu ĝi estas apogita de la reĝimo aŭ ne. Eĉ en tiu okazo la akcepto de teorio neniel povus esti interpretata kiel idea akcepto de la politika reĝimo.

Tiom, tute principe.

Konkrete la faktoj estas jenaj:

1) La Unua Parto de *Retoriko* ampleksas 59 paĝojn. Nur sur 5 estas treege koncize prezentitaj kelkaj punktoj de la teorio de Marr (pp. 20-25). Ĉu tio estas "la Unua Parto", kiel asertas D-ro Solzbacher?

2) Je la fino de tiu malgranda subĉapitro mi skribis: "ESTAS TUTE CERTE, KE MULTAJ PUNKTOJ DE LA TEORIO DE MARR NE POVAS ESTI AKCEPTITAJ" (p. 25) (8). Ĉu tio signifas akcepton, aŭ eĉ "reklamadon", de la teorio de Marr, kiel tion asertas D-ro Solzbacher?

3) En la momento, kiam mi skribis la verkon, Marr estis delonge mortinta (1934) kaj lia teorio jam atakita de Stalin. Ĉu tio, do, pravigas la hontindajn politikajn akuzojn de D-ro Solzbacher?

La vero estas, ke D-ro Solzbacher devis ne nur fari "silogismojn" laŭ la nova "logiko", sed ankaŭ falsi la "premisojn" eĉ de tiaspecaj "silogismoj" por povi atingi sian celon. Aginte tiel, li fakte kreis ian fantoman, reale neekzistantan estaĵon, produkton de sia propra fantazio kaj tial liaj lancoj trafas malplenan.

En *Retoriko* mi skribis - kaj tion mi rekonfirmas ĉi tie - ke al la teoriaj konkludoj de Marr pri la LINGVOEVOLUO donas apogon la malkovroj sur la aliaj sciencaj kampoj (p. 25). La demandon pri la evoluvojoj de la lingvo mi opiniis

(*) Aludo al la *Nefermita Letero al J. V. Stalin*.

(8) La fakto, ke mi opiniis kaj opinias multajn punktojn en la teorio de Marr neakcepteblaj, neniel signifas, ke mi en kiu ajn senco aprobas tiujn lingvosciencajn ĉarlatanaĵojn kaj insultajn esprimojn pri Marr kaj lia ĝenerala lingvistika agado, kiujn eldiris Stalin kaj liaj tiamaj sekvantoj kaj kiujn D-ro Solzbacher transportis en Esperanton el la rusa originalo. Marr havas sian lokon en la historio de la lingvoscienco (vidu, ekzemple, la grandegan verkon *Les Langues du Monde* de Meillet-Cohen, Paris 1952, p-oj 253-254). Se ĉiu filologo - kaj ne nur filologo - kiu faris erarojn en siaj teorioj estus pro tio tuj nomata "ĉarlatano", ne ekzistus filologoj, sed nur "ĉarlatanoj". La vera senco de la kampanjo de Stalin kontraŭ Marr estis politika. Stalin forĵetis lian doktrinon ne tiom pro tio, kio en ĝi estis efektive kontestebla, sed tial, ĉar ĝi ne respondis al la intereso de la stalinisma grandrusa imperialismo, kiu samtempe glorigis la rusan lingvon kiel "la internacian lingvon de socialismo". L. Laurat publikigis pri la tuta afero bonegan studon en la franca lingvo sub la titolo *Staline, la Linguistique et l'Impérialisme Russe* (Stalin, la Lingvistiko kaj la Rusa Imperialismo), Paris 1951.

gravega ĝenerale, sed tute speciale por la korekta kompreno de la pozicio de Esperanto. Tial mi pritraktis ĝin en du ĉapitroj de *Retoriko*. (9)

Ĉi tie estus bone aldoni kelkajn vortojn.

Fakto estas, ke ne ekzistas homgrupo sen lingvo, nek lingvo sen homgrupo kiel ĝia portanto. Estas ankaŭ facile kontrolebla fakto, ke ju pli malalta estas la nivelo de civilizo, des pli multnombraj estas la lingvoj. Male, kun la progreso de la civilizo formiĝas ĉiam pli grandaj lingvoj, parolataj sur ĉiam pli vastaj teritorioj fare de ĉiam pli ampleksaj sociaj grupoj.

La homo estas sociema estulo kaj tia tute certe estis ankaŭ lia praulo. La individuo ĉiam apartenis kaj apartenos al iu socia grupo. La karaktero de socia grupo dependas de multaj faktoroj kaj eksteraj (la ĉirkaŭanta naturo) kaj internaj (la sociaj institucioj kreitaj en la grupo mem en la daŭro de ĝia evoluo), sed la eksteraj ĉiam pli perdas sian gravecon paralele kun la subigo de la naturaj fortoj al la interesoj de la homo, dum la internaj samtempe plipeziĝas.

Tiuj faktoroj, kiuj influas la formiĝon de iu homgrupo kaj donas al ĝi ĝian apartan karakteron, influas ankaŭ ĝian lingvon. Kiam ajn iu homgrupo formiĝas kiel socia unuo kun distingaj trajtoj, ĝi kreas al si sian lingvon surbaze de la konkretaj bezonoj, dependantaj de la atingita evoluŝtupo kaj de ĉiuj elementoj, kiuj ĝin kaŭzis. La lingvo siavice helpas al kunteno de la socia grupo kaj ĉe la uzantoj plifirmigas la senton de aparteno al la grupo.

Rilate la lingvon kelkaj faktoroj influas diferencige (disige), dum la aliaj agas unuecige (kuntene). Superflue diri, ke ilia influo sur la lingvon ne estas simple mekanika, sed tre kompleksa. Ili interplektiĝas, influas unu la alian, estas pli gravaj en unu socia grupo, malpli gravaj en alia, pli efikaj sur unu evoluŝtupo, malpli sur alia, estas mem influataj de la lingvo aŭ per ĝi, agas sur la homan menson kaj estas ŝanĝataj de tiu menso k.t.p. Kun la rezervo de la ĵus esprimita penso, en la lasta analizo estas ili, kiuj kondiĉas la lingvon de la homgrupo. En tiu senco estas korekta la difino de Sapir pri la lingvo kiel "aro da simboloj reflektantaj la tutan fizikan kaj socian fonon, en kiu iu homgrupo estas lokita". (10)

Tiel eksplikiĝas la ekzisto kaj karaktero de lingvoj hordaj, gentaj, tribaj, popolaj, naciaj, internacia unuflanke; klasaj, kastaj, religiaj, eĉ virinaj (11) aliflanke. Tiuj lastaj, specialaj, lingvoj estas neniel neglekteblaj. Oni komprenos la gravecon de la specialaj lingvoj - diras A. Meillet - se oni konsideras, ke tribo en la Sudo de Hindio, kiu konsistas el nur ĉ. 800 personoj, "havas 3 specialajn religiajn lingvojn, unu slangon kaj unu dialektan dividon de socia origino". (12)

Ni ne faru ekskurson tiel malproksime en la historion por observi la klasan influon ĉe la formiĝo de la latina, nek ni veturu al tiel malproksimaj regionoj kiel Ameriko aŭ Hindio por konstati la influon de la geografia, klasa, religia, seksa k.a. faktoroj je la formiĝo de diversaj lingvoj. Ni vidu kio okazas ĉi tie, en tiu ĉi grandega kultura mondcentro, kie estas skribataj tiuj ĉi linioj. Jen kion diras profesoro de la angla lingvo en la Universitato de New York, kiu certe ne povas esti suspektata kiel adepto de Marr:

(9) *Retoriko*, p-oj 29 kaj sekv. En la dua eldono de *Retoriko* nun kompostata, la tuta Unua Parto (Lingvo) kaj precipe la ĉapitro pri la Faktoroj Influantaj la Lingvoevoluan estas konsiderinde kompletigita.

(10) E. Sapir, laŭ la *verko cit.* sub (7), p. 90.

(11) E. Sapir priskribis la grandegajn diferencojn de la vira kaj virina lingvoformoj de la *Yana*-lingvo. La vira formo estas uzata nur inter viroj, dum la virina aplikiĝas en la konversacio inter la virinoj aŭ inter la virinoj kaj la viroj. (Laŭ la *verko citita* sub (7), p-oj 206 kaj sekv.)

(12) A. Meillet, *verko cit.* sub (6), p. 115.

"En la kadro de la angle parolanta mondo verŝajne la plej akra kontrasto estas trovebla inter la *cockney* londona dialekto unuflanke kaj la lingvo de la "supra klaso" ("*upper-class*") aliflanke. La Londonanoj ne hontas rekoni tiun kontraston; ili estas tre sinceraj rilate la ekziston de klasaj niveloj en la lingvo." (13)

Marr certe eraris, kiam li troigis la influon de la klaso al la lingvo kaj eĉ konsideris ĝin la sola lingvokrea faktoro, sed estas same tiel erare nei ĝian pli aŭ malpli grandan rolon en la evoluo de la lingvo, depende de la konkreta strukturo de la koncerna socia grupo. Por citi ankaŭfoje Meillet: "Ĉiu socia diferencigo havas ŝancon esprimiĝi kiel lingva diferencigo".(14)

En sia longa historio la homo daŭre kreadis al si ĉiam pli efikajn rimedojn de produktado, larĝigadis la kontaktojn, pasadis al pli altaj formoj de socia kunvivado, formadis ĉiam pli ampleksajn superajn sociajn unuojn, dum la pli malsupraj formoj aŭ tute malaperadis aŭ perdadis sian antaŭan signifon. Paralele kreigadis laŭ diversaj manieroj ankaŭ komunaj lingvoj, kiuj servis por komunikado interne de la nova unuo (aŭ eĉ ekster ĝi, se ĝi estis sufiĉe forta por altrudi sian lingvon al aliaj), dum la antaŭaj lingvoj aŭ malaperadis aŭ konservadis kaj ofte ankoraŭ konservas sole regionan aŭ eĉ nur lokan karakteron.

La hodiaŭa lingva stato, plena de evolua dinamismo, donas bildon ne de lingvoj dividitaj inter si per akraj linioj, sed prefere prezentiĝas kiel multkolora eksterordinara kubforma spektro, en kiu la diversaj lingvoj (inkluzive la dialektojn, slangojn kaj aliajn lingvaj formojn) simile al koloroj transversiĝas unu en la alian, interpenetras sin reciproke, sed tamen ne nur malsamas horizontale de unu lingva regiono al alia, sed ankaŭ varias vertikale de unu klaso, profesio, okupo kaj simile al alia. Kaj tiel la lingvo en sia tuteco spegulas la aktualan kompleksan socian strukturon kiel la ĝis nun atingitan rezulton de la historia evoluo.

2.7 Individuo aŭ Kolektivo?

Kiu estas la rolo de la individuo en la kreado de la lingvo?

Certe la individuo kiel membro de la koncerna socia grupo kaj sekve ankaŭ de la lingva komunaĵo partoprenas en la kreado de la lingvo. Sed tiu lia kreado ne estas, nek povas esti, arbitra, tute laŭplaĉa. Individuo, kiu agas tiel, eksigus sin mem el la lingva komunaĵo. La lingvokrea agado de la individuo devas esti konforma al la bezonoj de la socia grupo por esti efika. Iom simple, fakte iom tro simple, Mario Pei diris tion en libro por la junularo per jenaj vortoj:

"La fina decido pri tio ĉu iu ŝanĝo eniras en la lingvon dependas ne de tiu, kiu faras la ŝanĝon, sed de la centoj kaj miloj kaj milionoj, kiuj estas vokitaj akcepti ĝin." (15)

Ne nur en tiu kvalito, sed ankaŭ kiel apartenanto de specialaj sociaj kungrupiĝoj en la kadro de la socia grupo la individuo kontribuas al evoluigado de la lingvo.

(13) Margaret Schlauch, *The Gift of Tongues*, London 1949, p-oj 261-262. Al la supra citaĵo oni povas nur aldoni, ke tiu "kontrasto" estas tia, ke neniu persono, kiu konas nur la literaturan anglan lingvon - eĉ ne Angloj mem - povas kompreni la londonan *cockney*.

(14) A. Meillet, *verko cit.* sub (6), p. 113. Meillet plu konstatas, ke ekzistas gravaj diferencoj en moderna granda urbo inter la "lingvo de la burĝaro" kaj la "lingvo de la laboristoj"; ke ekzistas "klasoj kaj subklasoj, ĉiu el ili kun siaj lingvaj apartaĵoj" (p. 113 kaj sekv.).

(15) Mario Pei, *All About Language*, London, 1956, p. 14.

Tiamaniere la lingvo estas la plej demokrata kreaĵo de la homa socio, ĉar ĝi estas produkto de ĉiuj, surbaze de la plej reale ekzistantaj fortoj en la socio kaj surbaze de la efektiva graveco, kiun en definitiva tempo havas unuopulo aŭ aparta socia kungrupiĝo en la socio. Tiu graveco - oni komprenu bone - ne estas iu graveco antaŭfiksita por ĉiuj tempoj kaj por ĉiuj sociaj grupoj: ekzemple fizika forto, nombro, ekonomia potenco, socia pozicio, intelektaj valoroj k.s., kvankam ĉiu el tiuj, aŭ pluraj el ili, aŭ ĉiuj en diversaj gradoj povas esti decidaj en tiu aŭ alia socia grupo depende de ĝia fakta karaktero kaj de la fortorilatoj en ĝi. La lingvokrea agado povas esti pli aŭ malpli spontana, pli aŭ malpli konscia, sed la "konscienco" certe ne faras ĝin "artefarita" en la senco de "kontraŭnatura", *se nur tiu agado estas konforma al la bezono de la kolektivo, kio estas esenca*. Tio rilatas al ĉiuj lingvoj inkluzive, kompreneble, Esperanton.

La fakta socia portanto de la lingvo, do, ne estas la individuo, sed la kolektivo. Tion perfekte komprenis la genio de D-ro Zamenhof. Tial li rezignis pri ĉiuj personaj rajtoj kaj lasis, ke Esperanto kresku kaj progresu "laŭ la samaj leĝoj, laŭ kiuj estis ellaborataj ĉiuj vivaj lingvoj". Kaj tio efektive okazis kaj plue okazas.

Sed je tiu ĉi punkto por multaj, ankaŭ por la grandega plimulto de filologoj, ekestas la demando, kiu kaŭzas tiom da konfuzo kaj tiom da miskonkludoj. Se vere la efektiva portanto de la lingvo estas ne individuo, sed iu socia grupo, do kiu socia grupo, estas la portanto de la Internacia Lingvo? Ekzistas triboj, ekzistas popoloj, ekzistas nacioj kaj ili havas siajn tribajn, popolajn, naciajn, lingvojn. Sed kie, do, estas - oni demandas - tiu "internacia popolo", kies lingvo estas la Internacia? Ĝi ne ekzistas kaj sekve ne povas ekzisti tia lingvo en la vera senco de la vorto. Esperanto povas, eble, taŭgi por esprimi en ĝi "la urugvajajn menuojn" (Prof. Blinkenberg en Montevideo), aŭ esti iu ekzercilo por la cerbo "pli taŭga ol estas la ŝakludado" (pluraj "amikaj" lingvistoj en diversaj verkoj), aŭ konveni kiel interesa "*hobio*" (flankokupo) simile al kolektado, ni diru, de paseroj (aŭ preseraroj, se vi preferas) tra la mondo, sed ĝi ne povas esti vera, vivanta lingvo!

Nu, la tuta konfuzo de tiu fundamente erara starpunkto estas, ke oni pretervidas tre simplan fakton, nome ke la samaj individuoj povas esti apartenantoj de diversaj sociaj grupoj kun propraj lingvaj esprimoj. Se oni ĵetas rigardon al la multnombraj dialektoj (kiuj nomiĝas "lingvoj", se super ili ne starus la komuna nacia lingvo), oni facile rimarkas, ke la samaj personoj, kiuj kiel aparta regiona socia grupo estas portantoj de la koncerna dialekto, samtempe formas parton de la nacia kolektivo kaj *en tiu kvalito* prezentas la socian fonon de la nacia lingvo. La samaj personoj povas, plue, aparteni al iu profesio, religio, okupo, flanka interesiĝo kaj *kiel tiaj* konsistigas la grundon, el kiu kreskas specialaj lingvoformoj.

La grandega evoluo de ĉiuj ekonomiaj fortoj en la moderna epoko kun la rapidega progresado de la scienco ne nur kaŭzis la kreon de abunda lingvomaterialo kun internacia karaktero, sed ankaŭ ĉiam pli impete puŝas la homaron al multe pli forta integriĝo. Tiu objektiva evoluprocezo *devis* interalie naski novan senton de efektiva (ne abstrakta, ekzemple nur en filozofia penso) aparteno al la plej vasta socia unuo, kiu samtempe konkretiĝas kiel tia: al la homaro. Kaj la plej pura esprimo de tiu vivanta sento estas la Internacia Lingvo, kiu siavice fortikiĝas ĝin.

Kaj tiel *la samaj personoj* - certe ankoraŭ ne multnombraj - kiuj pro tio *ne ĉesas* esti apartenantoj de sia nacia aŭ regiona lingva komunajo aŭ de kiu ajn alia lingva kungrupiĝo, manifestas *plian aspekton* de sia socia personeco: la apartenon al la homaro (kio, kompreneble, ne signifas ke ili, ekzemple, ĉesas esti friponoj, se ili estas fakte tiaj, kiel la grandega plimulto de esperantistoj en sia honesteco kaj idealismo emas kredi). En *tiu aspekto* ili reale formas tiun *monde* (ne "okcidente" aŭ "oriente", sed *monde*) internacian socian forton, sur

kiu kuŝas la Internacia Lingvo. El la ĵus prezentita vidpunkto Esperanto, do, ne estas paralela al la dialektoj aŭ al la naciaj lingvoj, nek adekvata al slangoj kaj al similaj lingvoformoj. Esperanto estas unu el la tri lingvoj, troviĝantaj vertikale *unu super la alia* ne el vidpunkto de "kareco" (ili estas same karaj), sed el vidpunkto de la *tri ĉefaj aspektoj*, en kiuj manifestiĝas la socia aparteno de la samaj personoj: al la regiono - la regiona dialekto; al la nacio - la nacia lingvo; al la homaro - la internacia Esperanto.

2.8 Helpa aŭ Universala Lingvo?

Ĉio dirita montras, ke la esprimoj "natura" aŭ "artefarita", kiam ili estas aplikataj al kiu ajn lingvo, estas absolute maltaŭgaj, science nepravigeblaj, konfuzaj kaj erarigaj.

Sed kio pri la esprimoj "helpa" kaj "universala"?

D-ro Solzbacher skribis:

"Komparu kun la fantaziaj ideoj de Lanti, Drezen kaj Lapenna - pri "batalo kontraŭ naciaj lingvoj", "formortado de la naciaj lingvoj" kaj evoluo "de multlingveco al unulingveco" - la klarajn, modestajn kaj inteligentajn vortojn de Zamenhof, kiu ... prezentis la argumentojn, ke la uzo de internacia lingvo ne malhelpos, sed helpos la naciajn lingvojn" (A.E., 1957, p-oj 56-57)... "La fakto, ke Lapenna radikale forĵetas la Zamenhofan ideon de internacia lingvo, kiu neniel kontraŭas la naciajn..." k.t.p. (A.E., 1957, p. 56).

Denove samspeca intermiksado, konfuzado, falsado, kreado de fantoma, neekzistanta personeco. Mi ne skribos ĉi tie pri Drezen kaj Lanti. Iliajn ideojn - cetere malsamajn inter si - mi certe ne akceptas, sed mi ja rilatas kun respekto al personoj, kiuj donis grandegan parton de sia vivo por Esperanto kaj el kiuj unu tre kredeble estis mortigita kaj la alia devis ĉesigi sian vivon en malfacilaj cirkonstancoj. Eĉ pli, mi havas sinceran admiron por Lanti kiel iniciatinto kaj partopreninto de la grandega laboro, kiu rezultigis el elstaran verkon Plena Vortaro, sen kiu Esperanto ne estus ankoraŭ atinginta la nunan stadion.

Sed ni vidu kiel aspektas tiu mia "radikala forĵeto" de la Zamenhofa ideo pri internacia lingvo. En 3o jaroj de mia praktika uzado de Esperanto kaj de mia laboro por ĝi mi ne nur **NENIAM ESPRIMIS MIN KONTRAŬ LA NACIAJN LINGVOJN, SED TUTE MALE ĈIAM AKCENTIS KAJ AKCENTAS, KE ĜUSTE LA AKCEPTO DE ESPERANTO KIEL KOMUNA INTERNACIA LINGVO PREZENTAS LA SOLAN EBLAN PROTEKTON POR LA NACIAJ LINGVOJ.** En miloj da paĝoj, kiujn mi ĝis nun skribis en Esperanto, en centoj da paroladoj mi tuŝis plurfoje tiun demandon kaj mia starpunkto ĉiam estis kaj plu estas, ke la homaro, sub la premo de la fortoj pritraktitaj supre, nepre devas havi lingvon por la ĉiam pli ampleksaj internaciaj rilatoj; ke tiu lingvo povas esti aŭ iu perforte alirudita nacia lingvo, resp. kelkaj tiaj lingvoj en diversaj "zonoj", kio signifus detruon de la aliaj naciaj kulturoj kaj naciaj lingvoj, *aŭ Esperanto kiel esprimo de integriĝo surbaze de egaleco de ĉiuj rasoj kaj nacioj, de ĉiuj naciaj lingvoj.* Analizante, ekzemple, la situacion en 1941 kaj skizante la perspektivojn por la postmilita periodo, mi skribis en la lasta numero de *La Suda Stelo*, senpere antaŭ la etendiĝo de la milito al Jugoslavio, artikolon (poste represitan en *Esperanto Internacia*, julio-aŭgusto 1941), en kiu mi diris konklude:

"Ni, do, vidas, ke la estonta mondo prezentos unu densan reton de ekonomia kaj kultura ligiteco, en kiu ĉiuokaze la popoloj konservos siajn naciajn lingvojn kaj kulturojn." (Kursivo en la artikolo).

En *Retoriko* (p. 52) mi skribis:

"Inter la naciaj kaj la Internacia Lingvo ekzistas nur unu gravega diferenco, nome diferenco de celo, al kiu ili servas: dum la naciaj lingvoj havas la taskon kontentigi la limigitajn bezonojn de pensado kaj de komunikado en naciaj kadroj, la Internacia Lingvo liberigas la penson de la nacilingvaj ĉenoj kaj flugigas ĝin libere de lando al lando, de nacio al nacio, tra la tuta mondo."

Ĉu tio, do, signifas "radikalan forĵeton" de la Zamenhofa ideo? Zamenhof skribis en la Antaŭparolo al sia verko en 1887 pri Esperanto:

"Ne kontentiĝante je *internacieco*, ĝi devas ankoraŭ fariĝi *tutmonda*, t.e. atingi tion, ke la plejparto de la mondo scianta legi kaj skribi povu libere paroli ĝin."

La ideo de Zamenhof estis, ke Esperanto estu uzata por ĉiuj internaciaj rilatoj kaj ke la naciaj lingvoj estu uzataj en la naciaj kadroj. Mia starpunkto identas al tiu. Ĝi estis kaj plu estos la gvidprincipo de mia tuta agado por la Internacia Lingvo.

Ĝuste tial mi nomis ĝin ĉiam kaj plue nomas aŭ "Esperanto" aŭ "La Internacia Lingvo". D-ro Solzbacher skribas kun aprobo pri la uzado de la epiteto "helpa" fare de Prof. Bokarev en prelego farita en Lingvosciencia Instituto de la Soveta Akademio de Sciencoj. Li eĉ konstatis, ke tiu adjektivo aperis "ne malpli ol sesfoje en la raporto". Mi nek nombris, nek nombros la "fojojn", sed mi scias ke Prof. Bokarev (kies laboron mi, cetere, alte aprezas) uzis tiun epiteton kaj ke ĝi estis uzita ankaŭ sur la titolpaĝo de la malgranda lernolibro de N.D. Andrejev, publikigita en Leningrado (1957) en 95.000 ekzempleroj. Tute egale ĉu tiun esprimon uzas Prof. Bokarev, aŭ D-ro Solzbacher (kiel belan "silogismon" oni denove povus fari!) aŭ kiu ajn alia, mi opinias ĝin absolute malkorekta, konfuza kaj erariga. Neniu venas al la ideo nomi la naciajn lingvojn "helpaj", kvankam ili esence havas la saman pozicion rilate la regionajn dialektojn, kian havas Esperanto rilate la naciajn lingvojn. Kaj se oni sub "helpa" komprenas, ke Esperanto devus esti ia plia, en tiu ĉi okazo fakte nur helpa, lingvo en la internaciaj rilatoj, aldone al la "veraj" "internaciaj" lingvoj, nome al la grandaj naciaj lingvoj uzataj ankaŭ en internaciaj rilatoj, tiam la esprimo estas des pli malakceptinda. La naciaj lingvoj restas naciaj el ĉiuj vidpunktoj eĉ kiam ili estas utiligataj por internacia komunikado kaj tial ili ne povas esti konsiderataj nek nomataj "internaciaj". Esperanto ne havas la taskon "helpi" al ili en tiu falsa rolo de "internaciaj" lingvoj, sed tute male ludi la solan rolon de efektive vera internacia lingvo: internacia laŭ la interna strukturo, laŭ la celo, laŭ la apliko kaj ĉefe laŭ la socia portanto. Tial Esperanto ne povas esti nomata "helpa", sed nur *La Internacia Lingvo*. Tamen, se la uzo de tiu maltaŭga kaj nepravigebla vorto estas *la kondiĉo* de agado por Esperanto en iu lando aŭ iu medio, se, do, la cirkonstancoj nepre devigas apliki ĝin, estas certe pli bone labori por la Internacia Lingvo prezentante ĝin kiel "helpan", ol entute nenion fari.

Por komplete konfuzi la legantojn, D-ro Solzbacher patose demandas la estintajn estraranojn de UEA: "Ĉu ili akceptis la marksistan-leninistan tezon pri universala lingvo anstataŭ la naciaj lingvoj?" Kompreneble, tiu esprimo "universala lingvo" devus denove esti mia kaj malantaŭ ĝi devus denove kaŝiĝi difinita politika koncepto. Mi ne opinias, ke la uzo de tiu esprimo "universala" estas en kiu ajn senco tragika, precipe ne, se el la kunteksto klare vidiĝas, ke oni pensas per tio al komuna lingvo por la internaciaj rilatoj. En tiu senco ĝi estas ofte uzata. Eĉ en la *Brita Enciklopedio*. Sed mi mem **NENIAM UZIS TIUN ESPRIMON** en mia tridekjara laboro por Esperanto krom se mi kritikis ĝin kiel netaŭgan ĝuste tial, ĉar ĝi povus krei la impreson ĉe la aŭskultantoj aŭ legantoj, ke la celo de la esperantismo estas forigi la naciajn lingvojn. D-ro Solzbacher, do, ne povis trovi tiun esprimon en miaj libroj, broŝuroj, artikoloj.

Sed kie li povas ĝin daŭre trovi, estas precize la kovrilpaĝo de lia gazeto, kie oni legas de numero al numero reklamon: "INTRODUCTION TO ESPERANTO THE UNIVERSAL LANGUAGE" (Enkonduko al Esperanto, la Universala Lingvo)!!! Kredu aŭ ne, estas precize tiel. Do, nia majstro de logiko bonvolu apliki sian brilan argumentadon kun ĉiuj variacioj pri tiu temo al Amerika Esperantisto kaj al ĝiaj redaktoroj, nome al si mem kaj al sia amiko.

2.9 La Geniaj Infanoj

D-ro Solzbacher citis el *Retoriko* kaj el *La Internacia Lingvo* kelkajn ciferojn pri la tre modesta individua vortprovizo kompare kun la ĝenerala vortotrezoro de iu lingvo. Kelkaj el tiuj ciferoj eniris siatempe en la *Nefermitan Leteron al Stalin* kun la celo montri, ke la individua vorta provizo, precize inverse al la aserto de Stalin, prezentas eble 1% de la tuta vortara riĉaĝo de iu lingvo. D-ro Solzbacher skribis pri tio:

"La *Nefermita Letero al Stalin* diras: 'Laŭ la lingvisto M. Müller ankoraŭ en la deknaŭa jarcento troviĝis vilaĝoj en Anglujo, en kiuj la kamparanoj ne sciis pli ol 400 vortojn. Meze kleraj homoj posedas kutime 4000-5000 vortojn'. Tiuj ciferoj estas ansolote idiotaj. La estraranoj de UEA ne devus havi la rajton ridindigi la Esperanto-movadon per subskribado de tiaj fuŝaĝoj." (A.E., 1957, p. 59)

Poste li citis parteton el verko de Mario Pei, laŭ kiu grupo da psikologoj venis al konkludo, ke 4-jara infano scias 5.000 vortojn, 6-jara 14.000, 8-jara 26.000, 10-jara 34.000. Laŭ alia kalkulo, 6-jara infano posedus 2.000 ĝis 3.000 vortojn, stulta plenkreskulo 10.000, mezklara 35.000 ĝis 70.000!

Unue ni rigardu iom tiujn fantaziajn ciferojn, tiel senkritike reproduktitajn! Komparu la vortprovizon de tiu abstrakta 10-jarulo (34.000) kun unu el la mezkleraj plenkreskuloj (35.000). Kion montras tiu komparo? Ke nia genia 10-jarulo ne plu devas studi por atingi la nivelon de meza klereco, ĉar li ja posedas ĝin! Poste komparu tiun belan diferencon inter 35.000 kaj 70.000 vortoj de mezkleruloj! Kiam oni donas unu pomon al knabeto kaj poste ankoraŭ unu, li komprenas ke li havas la *duoblon* kaj ke li povas fordoni unu al sia fratineteto. Sed ŝajnas ke la koncernaj psikologoj kaj D-ro Solzbacher kun ili ne komprenas, ke 70.000 estas la *duoblo* de 35.000, nome ke nia sepdek milvortulo povas facile forĵeti nek pli nek malpli ol 35.000 vortojn kaj tamen ankoraŭ resti en la kategorio de mezkleruloj! Sed kio, do, estas 35.000 vortoj. Komprenu bone: ne 35, ne 350, eĉ ne 1.000, sed 35 fojojn mil! Prenu kiun ajn dulingvan vortaron de sur via bretaro kaj vidu kiom da vortoj ĝi entenas, se tio estas indikita. Mi konstatas, ke la plej ampleksa je mia dispono en la nuna momento - la Rusa-Franca de Ŝĉerba kaj Matuseviĉ kun 842 grandformataj (23x18 cm) paĝoj - enhavas 50.000 vortojn. Vi povos konstati la samon. Vi plue konstatos, ke mezgrandaj bonaj vortaroj enhavas ĉ. 25.000 vortojn, dum multaj t.n. poŝvortaroj entenas ne pli ol 6.000 vortojn.

Kion, do, faros tiu nia genia 10-jarulo (por ne paroli pri la "supra" mezklara plenkreskulo) kun tiuj mizere malriĉaj vortaroj? - Nenion, ili estas preskaŭ neuzebaj! Kaj evidente: oni ne presigas vortarojn kun 25.000 vortoj en centmiloj da ekzempleroj por plenkreskuloj, eĉ ne por dekjaruloj, sed nur por infanoj sub la sesa jaro kaj por "stultaj plenkreskuloj"! Kaj eĉ ili certe ne trovas multajn vortojn en tiuj vortaroj, ĉar, nature, ankaŭ ilia vortprovizo ne estos samspeca ĉe ĉiu unuope: ekzemple, konkreta 6-jara genia infano kun 14.000 vortoj de, ni diru, franca verkisto certe ne havas precize la samkvalitan vortprovizon kiel konkreta 6-jara genia infano kun 14.000 vortoj de paŝtisto en la montoj de Bosnio. Estas vere bedaŭrinde, ke D-ro Solzbacher ne konis la libron de Usonanino Elizabeth B. Hurlock, *Child Development* (Infan-evoluo),

1956, laŭ kiu, mi ĵus informiĝis, lernanto en unuagrada lernejo disponas pri 20.000 ĝis 80.000 vortoj! Kompatinda Shakespeare, kiu skribis siajn verkojn nur per 16.000 vortoj! (16)

Parolante pri la scio de vortoj, estas necese interkonsenti pri la signifo de "vorto" kaj pri tiu de "scio". Komprenoble, se oni konsideras kiel *apartan vorton* ĉiun fleksion, tiam la nombro estas multe pli granda, tute speciale en forte fleksiaj lingvoj kiel la rusa, la kroata k.a. Sed en tiu okazo oni devas *adekvate* pligrandigi la tutan vortaran provizon de la koncerna lingvo kaj sekve la rilato inter la individua posedo kaj la ĝenerala vortprovizo restos proksimume la sama (ne tute precize, ĉar ne ĉiuj vortoj havas la saman nombron de fleksiaj modifoj). En tiu okazo, komprenoble, rusa aŭ kroata infano "sciis" pli da vortoj ol samaĝa, sammedia kaj same inteligenta angla aŭ usona. Tiu aspekto de la afero povus esti interesa, sed ĝi ne rilatas al la vortprovizo kiel efektiva reflektado de la scio. Por tiu celo kiel "vorto" povas esti konsiderata nur tio, kio kutime eniras en la vortarojn kiel aparta vorto.

Rilate la signifon de "scio" oni devus preni kiel kriterion minimume la difinojn donitajn en la samlingvaj vortaroj, ekzemple por Esperanto en la Plena Vortaro. Se oni tiel agus, oni tuj vidus kiel modestege estas la individua preciza kono de la signifo de la vortoj. Ĉiuj povas facile konstati tion por si mem. Sed estas eble kontentiĝi ankaŭ per multe pli malsevera kriterio, nome per la kriterio de la plej larĝa *socia identigo* de la vorto, resp. de la ideo, kiun ĝi signas: ke "suno" estas la plej granda objekto normale videbla sur la ĉielo, ke "pluvo" estas akvo falanta el la nuboj k.t.p. sen iaj pli detalaj aŭ pli profundaj konoj. Max Müller verŝajne prenis tiun larĝan kriterion, kiam li skribis, ke *kelkloke* angla kamparano ne uzis pli ol 300 vortojn en tiu tempo. Kaj li plue diris:

"Bone edukita Anglo... malofte uzas en la konversacio pli ol 3.000 ĝis 4.000 vortojn proksimume kaj elokventaj parolantoj povas atingi la kvanton de 10.000 vortoj je sia dispono." (17)

Anglo, nomata D'Orsay, prezentis antaŭ pluraj jaroj studon, en kiu li konkludis, ke "la uzvortaro de analfabetoj kaj duonalfabetoj ne transpasas 500

(16) Unu el la ne tre oftaj vere seriozaj verkoj, pritraktantaj la lingvoevoluojn ĉe la infanoj, estas tiu de Prof. C. W. Valentine, *The Psychology of Early Childhood* (La Psikologio de Frua Infanaĝo), publikigita en Londono en 1942. En tiu verko unu tuta ĉapitro estas dediĉita al la ekuzo kaj evoluo de la lingvo ĉe la infanoj (p-oj 392-448). Pro manko de spaco estas neeble pritrakti ĉi tie la tutan demandon kaj donante nur ciferojn, sen klarigoj kaj komentoj, oni riskus falsi la seriozecon de la laboro sur tiu kampo. Tamen estas bone rimarkigi, ke infano ofte nur ripetas vorton sen kompreno de la signifo. Kiam, ekzemple, dujara knabeto subite, sen ia ajn kunligo, diras "absolute paĉjo" (p. 447), tiam evidente li nur ripetas la plurfoje aŭditan esprimon "absolute", sed ne komprenas ĝin. Sekve, oni ne rajtas aserti, ke li "scias" la vorton "absolute", eĉ ne laŭ la plej larĝa kriterio de "socia identigo". Ĉar en tiu okazo oni povus paroli ankaŭ pri "scio" de vortoj ĉe papagoj, aŭ eĉ ĉe orangutangoj, hundoj kaj ŝafoj. Aliflanke, ekzemple la uzo de "sub", "sur" kaj "en" (infano de 2; 2½) montriĝis korekta, kiam temis pri meto de karto "sur, en aŭ sub skatolon", sed malkorekta kiam la infano mem estis instigata "iri en, sur aŭ sub la seĝon, otomanon aŭ liton" (p. 439). Ankaŭ en tiu ĉi kazo oni malfacile povus diri, ke la infano "sciis" la veran signifon de la tri propozicioj. Alia infano (6-jara), speciale talenta por la lingvo, aŭdinte la vortojn "elipsa frazo", volis scii kion ĝi signifas. Post kiam li ricevis la klarigon, li diris: "Mi komprenas. Se mi diras: 'Tio ĉi estas dimanĉo', ĝi estas 'lipsa frazo' ". Kiam oni klarigis al li, ke tio ne estas elipsa frazo, ĉar nenio estas ellasita, li respondis: "Jes, estas: 'ne' estas ellasita. Tio ĉi ne estas dimanĉo, estas lundo!" - Entute, estas necese treege atente trakti la infanan lingvon, prenante en konsideron la specialan karakteron de la infana psiko kaj multajn aliajn elementojn, el kiuj la socia ĉirkaŭaĵo havas unuarangan signifon. Elĵetadi multmilajn ciferojn estas, milde dirite, neserioze kaj senrespondece.

(17) M. Müller, *verko cit.* sub (4), p. 268.

vortojn".(18) La prezidanto de la *Linguaphone Institute* taksis antaŭ nelonge, ke ordinara (meza) persono utiligas ĉ. 1.000 uzeblajn vortojn en sia vivo kaj malofte transpasas 1.200 vortojn. (18)

Kvankam Mario Pei, ŝajne, opinias tiujn taksojn tro malaltaj, tamen li ne esprimas pri ili difinitan opinion. En ĉiu okazo tiuj taksoj estas multe pli realecaj ol la fantaziaĵoj pri la "geniaj infanoj".

En la plej grandaj nuntempaj vortaroj de la naciaj lingvoj estas kolektita la tuta vorta materialo. Tiuj vortaroj estis farataj dum jardekoj, kelkfoje dum multaj generacioj, fare de centoj da specialistoj, kaj estas daŭre kompletigataj. La plej evoluintaj lingvoj posedas ĉ. 400.000 vortojn. La grandega Oxford-Vortaro de la angla entenas - laŭ Mario Pei - ĉ. 500.000. Li ŝajnas al mi treege optimista, kiam li diras: "Estas dube ĉu iu individuo konas pli ol unu kvinonon de tiu nombro". Certe tia individuo ne ekzistas. La grandega nombro de vortoj spegulas la multflankan diversecon de la socia strukturo, priparolita supre, kaj tial M. Pei prave diras:

"Centmiloj da vortoj, kvankam ili aperas listigitaj en la grandaj vortaroj, apartenas al specialaj sciencaj, profesiaj aŭ fakaj parolmanieroj (*parlances*), kaj ne estas uzataj eĉ ne rekonataj de la meza parolanto. Ĉiu kampo de moderna aktiveco havas sian propran specialigitan vortaron, kiu estas familiara nur al tiuj, kiuj estas okupataj en la kampo. Ekzistas speciala vortaro de medicino, alia de psikologio, alia de botaniko, alia de muziko..." (19).

Kaj tio estas la efektiva starpunkto de Mario Pei pri tiu demando.

Senkonsidere al la opinio de Mario Pei, aŭ de kiu ajn alia, certe la vortoj vere *komunaj* al ĉiuj membroj de la lingva komunaĵo, inkluzivante, do, ankaŭ la plej malklerajn tavolojn de normalaj plenaĝuloj - kaj ĝuste la plej malkleraj tavoloj tiurilate ludas la decidan rolon - estas ne pli ol 1% de la tuta lingva vortprovizo. Tiu takso estas eĉ treege optimisma, ĉar ĝi signifas, ke eĉ la plej malkleraj personoj posedus ĉ. 4.000 vortojn, dum, laŭ mia opinio, 4.000 ĝis 5.000 vortoj reprezentas la mezan uzatan vortprovizon de mezklara individuo. "Ke oni povas efektive esprimi sin interne de vortaro de 1.400 ĝis 1.600 vortoj - skribis al mi nia eminenta lingvisto Prof. W.E. Collinson - pruvis Michael West per sia *Essential English Dictionary* en kiu la anglaj difinoj sonas al la Anglo tute nature, ne kiel la fuŝita esprimaro de *Basic English*".

Kiuj ciferoj, do, estas "absolute idiotaj", kiel ĝentile esprimas sin nia bonedukita kavaliro?

2.1o La Nefermita Letero

D-ro Solzbacher daŭre, dum la tuta serio, revenas al la *Nefermita Letero al Stalin*. Mi ne intencas skribi pri la praveco de tiu energia kontraŭstalinisma starpunkto de UEA kaj SAT en la defendo de Esperanto. Kiu interesiĝas, tralegu la leteron en la revuo *Esperanto Internacia*, junio 1952, p-oj 163-165. (*)

Ĉi tie nur tri citaĵoj de D-ro Solzbacher kaj tri faktoj:

1) En la Nefermita Letero estas dirite:

"Tio plue pruvas, ke la vorta materialo, kiu estas *fakte komuna* al ĉiuj membroj de iu lingva komunaĵo, inkluzivante do ankaŭ la plej malklerajn tavolojn, estas eĉ multe pli malalta ol 1 procento de la tuta vortprovizo de

(18) Mario Pei, *The Story of Language*, London, 1957, p. 112.

(19) Mario Pei, *verko cit.* sub (18), p. 112.

(*) Represita ankaŭ en tiu ĉi kolekto..

la koncerna lingvo. Ĉio alia apartenas al la apartaj *ne nur* klasoj, sed ankaŭ *profesioj, fakoj kaj eĉ flankaj okupoj*, kiaj estas la *sporto, ludoj k.s.*" (kursivo de I.L.).

Jen kiel Solzbacher "interpretas" tiun parteton de la letero:

"Ĉu do vere ekzistas 'klasoj' de kemiistoj, dentistoj, juristoj kaj eble eĉ de filatelistoj kaj ŝakludantoj en la socio?" (A.E. 1957, p. 156.)

Kiu, do, skribas tiajn arlekenaĵojn, ke kemiistoj, dentistoj, juristoj estas "klasoj"?

2) D-ro Solzbacher skribis (pri tiu letero):

"Fakte tamen - neeviteble - preskaŭ neniu ekster la Esperanto-movado donis al ĝi seriozan atenton" (A.E. 1957, p. 57).

La vero estas, ke la Nefermita Letero estis presita ĉu komplete, ĉu parte en multaj nacilingvaj gazetoj, aŭ favore komentariita en aliaj, ekzemple en la plej elstara franca gazeto '*Le Monde*' (26.06.1952). La vero estas, ke multaj radio-stacioj, inkluzive de la londona BBC, disaŭdigis ĝin en pluraj naciaj lingvoj. La vero estas, ke per tiu energia kaj serioza paŝo UEA la unuan fojon post multege da jaroj montriĝis en la mondo kiel atentinda kultura faktoro kaj socia forto.

3) D-ro Solzbacher daŭre asertas, ke mi estas "la aŭtoro" kaj ke la aliaj tiamaj estraranoj nur "blinde akceptis kaj subskribis tion, kion D-ro Lapenna prezentis al ili" (p. 58). Li eĉ ricevis leteron de "unu el la tiamaj estraranoj de UEA" (kial ne diri la nomon?), en kiu tiu sinjoro interalie skribis: "En tiaj diskutoj ne decidus la grado de inteligenteco aŭ de faka sperto. Mi mem estis kontraŭ la ideo de Nefermita Letero al... Stalin. Sed Profesoro Lapenna per sia konata volforto kaj parolkapablo decidigis la ceterajn anojn..." (Kia giganto de intelekta potenco kaj morala forto estas tiu "iama estrarano" kaj kia reklamo por mia "volforto kaj parolkapablo", kiu sukcesas, eĉ sen "inteligenteco aŭ faka sperto", konvinki tiun giganton agi kontraŭvole!!! Estus vere necese, ke li eliru el sia modesta anonimeco kaj publike malkovru sian nomon, por ke tiuj, kiuj ne rekonas lin laŭ tiu gesto, ne pensu, ke eble povus temi pri kiu ajn alia tiam estrarano).

La vero estas, ke post pluraj instigoj mi faris la unuan skizon de la letero; ke tiu skizo estis sendita la 25-an de marto 1952, do preskaŭ tri semajnojn antaŭ la Estrara Kunsido, al ĉiuj estraranoj por konsidero; ke ĝi estis pritraktata dum eble du horoj en la kunsido mem; ke post kelkaj ŝanĝetoj ĝi estis unuanime akceptita de la Estraro.

Tiu decido de la Estraro estis poste aprobita de la Komitato. Nek EANA - tiam ankoraŭ aliĝinta asocio - nek ĝia komitatano iam ajn faris kiun ajn rimarkon. Ankaŭ ne D-ro Solzbacher, al kiu siatempe, la 30-an de majo 1952, estis sendita la teksto kaj kiu persone ĉeestis la U.K. en Zagreb (1953) kaj en Kopenhago (1956). Se entute io estis kritikinda, la kritiko devis esti farita en la Komitato, kiu estas la sola organo kompetenta por juĝi pri la agado de la Estraro. Sed ŝajne nenio estis kritikinda. Male estis ricevitaj nur gratuloj, ekzemple tiu de s-ro Montagu C. Butler (nur por memorigo!) de la 11-a de junio 1952, en kiu li skribis: "Mi tre forte gratulas vin pri via "Statistiko" en la nuna "Esperanto", kaj ankaŭ pri la letero de UEA kaj SAT al Stalin. Ambaŭ ŝajnas al mi gravaj dokumentoj, kaj tre utilaj".

Sed D-ro Solzbacher trovis, ke por lia celo estas pli utile bone miksi ĉion, misciti kaj misinterpreti antaŭ nekonata nombro da neinformitaj personoj, anstataŭ diri klare kion li pensas tie, kie oni povas diskuti la aferon kaj, se li ne diras la veron, facile tion pruvi al li per dokumentoj, kiel tio okazis en Kopenhago, kiam li kaŝglitis el la salono de la komitata kunsido.

Superflue diri, ke mi hodiaŭ, same kiel en 1952, subskribas ĉion, kio troviĝas en tiu letero.

2.11 Lingvistiko kaj Biblio

Tenante en unu mano sian venenigan ponardon de fipolitikaj falsaĵoj, D-ro Solzbacher plurfoje sinŝirme levis per la alia la Biblion. Tion mi ne deziras tuŝi. Ne pro D-ro Solzbacher, sed pro la respekto, kiun mi havas por la religiaj sentoj de sinceraj kredantoj, inter kiuj mi fieras havi multajn personajn amikojn.

2.12 Konfeso

Fine, por tiuj, kiuj post mia publika kaj ne senrezulta laboro por Esperanto dum tri jardekoj ankoraŭ ne komprenas mian starpunkton, mi eksplicite rekonu mian "kulpon". Jen en kio ĝi konsistas:

Mi scias, ke la homaro iras kaj devas iri al sia unueco, se ĝi ne volas detruigi. Mi esperas, ke ĝi trovos la vojon al sia ĉiam pli alta integriĝo surbaze de egaleco kaj justeco, sen plua superflua sangado, sen rasa, nacia aŭ kiu ajn alia superregado de unuj kaj subigado de la aliaj. Mi estas certa, ke tia integriĝo ne estas ebla sen la Internacia Lingvo. Mi fidus je la homeco. Kaj tial mi estas esperantisto.

PRI SOCIPOLITIKAJ ASPEKTOJ DE LA ESPERANTO-MOVADO
AŬ PSEŬDOSCIENCA PARTIPOLITIKA KONCEPTO

PRI LA INTERNACIA LINGVO (*)

3.1 Enhavo

En 1978 Hungara Esperanto-Asocio eldonis libron, kiu meritas ne mallongan recenzon, sed iom pli ampleksan pritrakton. Temas pri *Socipolitikaj Aspektoj de la Esperanto-Movado*, redaktita de Detlev Blanke, la ĉefa "ideologo" de la unutendenca kaj unudirekta partipolitika alo de la nuntempa Esperanto-Movado, senreziste esprimiĝanta kaj aganta en la nuntempa UEA.

La 228-paĝa libro konsistas el Enkonduko, verkita de la redaktinto, kaj tri partoj: Historio, Ideaj Fontoj, Perspektivoj.

En la unua parto troviĝas artikoloj de A. Rátkai pri "Socialismaj Teorioj kaj la Internacia Laborista Asocio pri la Universala Lingvo", S.N. Podkaminer: "Lenin kaj Esperanto", D. Blanke: "La Internacio de Proleta Esperantistaro (IPE)" kaj "Pri la Kontribuo de la Laboristaj Esperantistoj por la Evoluo de la Germana-Soveta Amikeco en la Tempo de la Respubliko de Weimar", fine U. Lins: "Esperanto dum la Tria Regno". La dua parto enhavas artikolojn de E.K. Drezen: "Zamenhof", A. Rátkai: "La Internacilingva Movado kiel Kreinto de la Internacia Lingvo", kaj plian fojon D. Blanke: "Pri la 'Interna Ideo' de Esperanto". Du artikoloj - unu de M.I. Isajev "Pri Bazaj Metodologiaj Problemoj de Interlingvistiko", la alia de S.N. Podkaminer pri "Socialismo kaj Internacia Lingvo" - konsistigas la trian parton. Preskaŭ ĉiuj menciitaj tekstoj estis publikigitaj pli frue ĉu kun identa, ĉu kun simila enhavo. Sekve, la libro prezentiĝas pli kiel kolekto de jam aperintaj artikoloj, ol kiel unueca verko prilumanta diversajn aspektojn de la sama demando per kunordigitaj originalaj studoj, kiel kredigas la titolo.

En sia Enkonduko la redaktinto informas, ke "evidente la aŭtoroj de la studoj ĝenerale klopodis bazigi sin sur postmilitaj vidpunktoj de la historia materiismo, de marksismo-leninismo, sed ke "tio ne validas por la verkaĵo de Ulrich Lins" (p. 6). Evidente, almenaŭ Drezen ne povis sin bazi sur la "postmilitaj vidpunktoj de la historia materiismo" (cetere kiu el tiuj vidpunktoj?), ĉar li verkis sian artikolon longe antaŭ la milito kaj, krome, en tiu tempo la oficiala soveta doktrino ne estis nomata "marksismo-leninismo", sed marksismo-leninismo-stalinismo. Senkonsidere al tiu eraro, relative sensignifa kompare kun la abundo da multe pli gravaj, estas klare, ke la libro pretendas esti scienca verko bazita sur la soveta varianto de marksismo-leninismo. Leninisma ĝi eble estas, marksisma tre dubinde, scienca verko certe ne.

(*) Represita el *Horizonto*, n-roj 2/80 kaj 3/80.

3.2 Por ke Verko Estu Scienca ne Sufiĉas Nomi ĝin tia

Por science pritrakti kiun ajn demandon antaŭ ĉio estas necese akiri maksimuman scion pri la koncernaj faktoj kaj honeste prezenti ilin. Nur post tio povas sekvi analizoj kaj sintezoj, eltrovo de la leĝoj, kiuj regas la ekzamenatan fenomenon ĉu en la naturo, ĉu en la socio, en ligo kun aliaj fenomenoj kaj kiel parton de dinamisma evoluprocezo, ne kiel statikan staton. Siavice tio postulas grandan ĝeneralan erudicion kaj specialajn sciencajn kvalifikaĵojn. Grandega, fakte kontraŭscienca eraro estas agi inverse: unue arbitre formi propran opinion kaj poste aŭ inventi "faktojn", aŭ serĉi tiujn "faktojn", kiuj apogas ĝin ellasante aŭ ignorante ĉiujn aliajn. Por uzi la plej mildan esprimon, tion oni nomas prejudico. Eble neniu socia fenomeno renkontis kaj plu renkontas tiom da prejudicoj, kiel la Internacia Lingvo (Esperanto). Ne nur ekster la Esperanto-Movado, sed bedaŭrinde ankaŭ interne de ĝi, kiel evidentigas la pritraktata libro, malgraŭ bonegaj verkoj, el kiuj eĉ D. Blanke, sendube la plej inteligenta el la "ideologoj", sur p. 7 aparte mencias la "valoregan" *Esperanto en Perspektivo: Faktoj kaj Analizoj pri la Internacia Lingvo (Esperanto)*.

Rilate la faktojn ekzistas pluraj eblecoj. Se al aŭtoro mankas amaso da elementaj scioj, oni prave nomas lin ignoranto; se en lia verko troviĝas nur kelkaj eraroj pri faktoj, precipe se ili ne estas decidaj por la konkludoj (eĉ en la plej rigoran sciencan verkon tiaj povas enŝteliĝi), estas lojale paroli nur pri malĝustaĵoj; sed se iu intence ellasas konatajn faktojn aŭ konscie misprezentas ilin, la sola adekvata kvalifiko estas: falsaĵo. Kvankam en la analizata libro troviĝas ankaŭ kelkaj interesaj novaj informoj – ekzemple en la artikolo de Podkaminer pri la rilato de Lenin kaj de Krupskaja (edzino de Lenin) al Esperanto – tamen la tri kategorioj – ignoradoj, malĝustaĵoj, falsaĵoj – pli ol abundas kaj kompletigas unuj la aliajn. Jen nur kelkaj el ili por montri ilian karakteron:

Estas falsaĵo publikigi la artikolon de E.K. Drezen pri Zamenhof kaj ne diri unusolan vorton pri la fakto, ke li estis mortpafita en 1937 de la servopretaj ekzekutistoj de la soveta reĝimo kaj ke similan sorton havis tre multaj sovetaj esperantistoj malgraŭ ilia humila kliniĝado antaŭ la oficiala soveta linio, dum centoj, eble eĉ miloj da aliaj pereis pro la suferigaj punlaboroj en la siberiaj koncentrejoj. Laŭ U. Lins, eĉ en GDR oni "foje parolis pri 2.000 mortintoj" (*EeP*, p.723), kion D. Blanke ne povas ne scii. Ne estas surprize, ke U. Lins, kiu pli frue aŭdacis honeste prezenti la veron pri la persekutoj de esperantistoj en Soveta Unio, ne povas esti rigardata de D. Blanke kiel "marksisto-leninisto", kion, por ĉiu okazo, necesis eksplicite menci en la Enkonduko. Surprize estas, ke U. Lins konsentis pri la publikigo de sia studo rilatanta al la persekutoj en la nazia Tria Regno, sed permesis, ke en la libro estu komplete ellasita lia studo pri la persekutoj en Soveta Unio, tempe paralelaj, karaktere samspecaj kaj laŭ la sekvoj eĉ pli kruelaj kaj hontindaj koncerne la esperantistojn (mi intence tuŝas nur la "Esperanto-aspekton"), ol tiuj de la hitlera reĝimo. Tiu ellaso estas plia falsaĵo, kiun ne povas pravigi la noto en la fino, ke pliaj detaloj pri la sama temaro troviĝas en *EeP* p-oj 697-747.

Estas strange, ke U. Lins publikigis en la libro la koncizigitan version de sia artikolo, aperintan en n-ro 96 de *Sennacieca Revuo*, anstataŭ publikigi la kompletigitan, finan tekston pri la persekutoj sub naziismo, aperintan en 1974 kiel ĉap. 21.3 de *EeP*. Tial eĉ en lia artikolo troviĝas malĝustaĵoj. Ekzemple, li asertas, ke komence de la jaro 1940 en Jugoslavio oni skribis memkritikon pri la "ŝafa" neŭtraleco de la internacia movado rilate nacisocialismon kaj li citas parton de artikolo de J. Grandja en *La Suda Stelo* n-ro 9/1940. U. Lins komentas: "*Sed tiaj saĝaj vortoj venis malfrue, kiam la decidaj jaroj de la batalo inter faŝismo kaj Esperanto estis jam pasintaj* (p-oj 103-104)". Tio implicas, ke eĉ en Jugoslavio nur en 1940 oni komprenis la kontraŭhomecan kaj tial ankaŭ kontraŭ-esperantan karakteron de nacisocialismo. Efektive, jam antaŭ ol mi fariĝis prezidanto de Jugoslavia Esperanto-Ligo (JEL) en 1937 kaj samtempe, pro

diversaj kaŭzoj ne menciindaj ĉi tie, fakta redaktoro de *La Suda Stelo*, ni en Jugoslavio, same kiel sinceraj esperantistoj en Pollando, energie kontraustaris naziismon-faŝismon kiel ideologion malamikan al homeco kaj al Esperanto. En unu artikolo post la alia mi mem kaj la tiamaj kunlaborantoj "avertis en LSS kontraŭ la kliniĝo de la gvidantoj de la Esperanto-Movado en la faŝismaj landoj kaj kontraŭ la pasiveco de UEA kaj IEL antaŭ faŝismo" (U. Lins en *EeP*, p. 711, diference de U. Lins en la pritraktata libro). Dum la landa kongreso en Zagreb (1937) mi faris paroladon, en kiu mi plian fojon eksplikis la tuthoman valoron de Esperanto, emfazis ĝian internacie solidarigan rolon kaj levis mian voĉon kontraŭ ĉiuj diktatorecaj kaj totalecaj, naciismaj kaj faŝismaj reĝimoj. Kiel verŝajne rememoras almenaŭ iuj el la ankoraŭ vivantaj tiamaj 500 kongresanoj, preskaŭ ĉiun penson sekvis tondra aprobo. Kaj tio okazis ne en iu demokrata lando post la faligo de la naciismaj-rasismaj reĝimoj, sed en duonfaŝisma Jugoslavio en la tempo, kiam hitlerismo estis ĉe la pinto de potenco kaj al multaj ŝajnis nevenkebla. Same mi agis dum la UK en Londono (1938), kiam mi fariĝis estrarano de IEL, kaj dum la UK en Bern (1939). En ambaŭ okazoj la grandega plimulto de la kongresanoj forte apogis la esprimitajn kontraŭnaziajn ideojn.

Ne estas, do, ĝusta la aserto, ke la tuta antaŭmilita neŭtrala movado estis senkolora kaj indiferece neŭtrala (p-oj 116-117), t.e. *pasive* neŭtrala, ĉar almenaŭ Jugoslavia Esperanto-Ligo (aliĝinta asocio de IEL kaj, post la kunfandiĝo en 1948, de UEA) jam ekde la mezo de la tridekaj jaroj agis laŭ la principo de *aktiva* neŭtraleco, konforma al la humaneca neŭtrale-homa karaktero de Esperanto, dum mi mem kiel komitatano A kaj estrarano de IEL klare esprimis la saman starpunkton dum la inaŭguraj solenaĵoj de du universalaj kongresoj de Esperanto.

Estas vero, ke dum la postmilita UK en Bern (1947) la Komitato per 9:7 voĉoj rifuzis nomi la militon de hitlera Germanio "atakmlito" (p. 116), sed U. Lins prisilentas, ke temis pri mia propono kondamni la hitleran atakmliton. Ne estas ĝusta la aserto, ke la Tria Laborkunsido de tiu Kongreso "per *grandega plimulto* malakceptis projekton de rezolucio proponitan de la landaj asocioj en Bulgario, Jugoslavio, Rumanio, Aŭstrio, Ĉeĥoslovakio, Hungario, Palestino kaj Polio" (p. 116), ĉar la projekto estis rifuzita per proksimume du trionoj kontraŭ unu triono de la ĉeestantoj en la plenŝtopita salonego, kion oni ne povas nomi "grandega plimulto". Tiu projekto de rezolucio kondamnis "kun profunda indigno la sennombrajn terurajn naziajn kaj faŝistajn krimojn", kies viktimoj estis ankaŭ multaj esperantistoj inkluzive membrojn de la familio Zamenhof. Ĝi estis iniciatita kaj verkita de mi, kion plian fojon la aŭtoro de la artikolo aŭ ignoras aŭ prisilentas. Pretere dirite, ĝi estas la sola publika protesto farita en formo de rezolucio en la postmilita historio de la movado. Laŭ mia scio, eĉ ne GEA iam per klara decido kondamnis la naziajn krimojn. Fine, estas prisilentita la fakto, ke post tiuj du "malsukcesoj" - se hontindaj, do por la plimulto, certe ne por la malplimulto kaj la proponinto - la Komitato akceptis mian proponon pri kompletigo de art. 4 en la Statuto de la nova UEA per la klaŭzo pri la respekto de la homaj rajtoj kiel esenca kondiĉo por la laboro de la Asocio. Per tio UEA formale rekonis la decidan gravecon de la respekto de la homaj rajtoj ĉie en la mondo ne sole por efika poresperanta laboro ĝenerale, sed ankaŭ por sia ekzisto kiel sendependa internacia organizaĵo kun propraj personeco kaj fizionomio. Alivorte, tio transformis la antaŭan *pasivan* neŭtralecon en *aktivan*, strikte observatan ĝis la eventoj de Hamburgo meze de 1974. Tiu demando estas detale prilaborita en *Esperanto en Perspektivo*, p-oj 553-561.

Miaj elpaŝoj en Bern (1947) kaj post Bern troviĝis kaj plu troviĝas sur la sama principa linio daŭre manifestata, teorie prilaborata kaj senĉese praktikata ekde miaj plej fruaj jaroj de poresperantaj agadoj ĝis la nuna momento. Tiel estos ankaŭ en la estonteco.

3.3 Prisilentoj Lige kun Neŭtraleco

Kial necesis prisilenti tiujn kaj multajn aliajn koneksajn faktojn, se ne por provi "malfortigi" - per forigo de la "kontraŭpezo" - mian antaŭhamburgan kaj posthamburgan reziston al partipolitika ekkapero de UEA, kaj mian nuntempan "avertadon kontraŭ la kliniĝo de la gvidantoj de la Esperanto-Movado" en la landoj de la soveta bloko antaŭ la oficiala soveta doktrino, "kontraŭ la pasiveco de UEA" rilate la partipolitikajn agadojn de la blokaj oficialuloj en UEA kaj la persekutadoj de lojalaj esperantistoj en kelkaj el tiuj ŝtatoj. Mi intence uzis la esprimojn de U. Lins pri la "kliniĝo antaŭ faŝismo" kaj "pasiveco", ĉar mi fidis, ke iam, eble eĉ en la proksima estonteco, iu objektiva historiisto prave atakos la esence identan senvertebran kliniĝon de la nuna gvidantaro de UEA antaŭ sovetoismo, riproĉos la defetisman pasivecon de la nuna membraro de UEA kaj kun fiero notos la pravecon de nia nuna voĉo de rezisto kontraŭ tiu bedaŭrinda stato, same kiel U. Lins notis la "honorindan ekzemplon" de la Jugoslavia Esperanto-Movado kaj la pravecon de mia antaŭmilita sinteno rilate naziismon kaj faŝismon (*EeP*, p. 713).

En ligo kun tio ankoraŭ iom pri demando jam abunde pritraktita kaj en *EeP*, kaj en *Hamburgo en Retrospektivo* kaj en *Horizonto*: la neŭtraleco.

Estas konate, ke siatempe sufiĉe multaj esperantistoj rezignis partopreni la UK en Köln (1933) pro la nazia reĝimo. Apenaŭ necesas diri, ke ankaŭ mi ne ĉeestis. U. Lins nun memorigas, ke *Heroldo*, tiam redaktata de T. Jung, kuraĝigis la aliĝadon, ĉar "la situacio en Germanio estas plj trankvila kaj pli sekura ol antaŭe". Post la Kongreso la sama *Heroldo* skribis: "Parte ili sukcesis, la subfosantoj, ĉar venis ne tiom da kongresanoj kiom ni rajtis atendi" (p. 87). Kompreneble, "la subfosantoj" estis tiuj sinceraj esperantistoj, kiuj kontraŭis la okazigon de universala kongreso en nazia Germanio. Pretere dirite, oni komparu la tiaman sintenon de *Heroldo* redaktata de T. Jung kun la aktuala sinteno de *Heroldo* redaktata de A. Fighiera-Sikorska kaj oni facile konstatos frapajn paralelojn. Por esti justaj necesas diri, ke poste T. Jung ŝanĝis sian starpunkton kaj espereble la nuna redaktorino de *Heroldo* iam ŝanĝos la sian.

Pli grava ol la "kliniĝa" skribado de *Heroldo* estis la samdirektiĝo (*Gleichschaltung*) de Germana Esperanto-Asocio (GEA) kaj la fina likvido de tiu "meritplena asocio kun longa tradicio" la 15-an de julio 1936 malgraŭ ĉiuj hontindaj flatadoj al naziismo kaj ĉiuspecaj humiliĝoj, inkluzive la forigon de la principo de neŭtraleco el la Statuto. U. Lins skribas pri tio:

"En la Statuto, kiu ekvalidis la 20-an de aŭgusto /1933/, malaperis la indikoj pri neŭtraleco; Behrendt komunikis la novan devizon: 'Per Esperanto por Germanio!'. Konstatante, ke nova trankvileco kaj nova bonfarto 'nun regas en Germanujo dank' al la grandioza, admirinda laboro de nia kanceliero kaj gvidanto Adolf Hitler, kiun ĉiu nacie sentanta germano devas admiri, eĉ adori", la kongresraporto optimisme notis: 'Nun ĉiuj zorgoj foriĝis, ĉar Germana Esperanto-Asocio efektivigis sian Gleichschaltung'. Sed tre baldaŭ montriĝis, ke tiaj revoj estis malpravaj..."

Aliloke en la sama artikolo li konstatas, ke GEA fine "perfidis preskaŭ ĉion, kion oni ĝenerale konsideris idea enhavo de la Internacia Lingvo" (p. 94) kaj li aprobe eĉ citas miajn vortojn: "unu el la plej malhelaj makuloj en la tuta historio de la Esperanto-Movado" (p. 89). Lins starigas la demandon: "Kiel povis okazi, ke GEA, La Neŭtrala GEA lemfazite en la originalo/ iris tiun vojon - la vojon de kunlaboro kun profunde malhumana reĝimo?" (p. 94). Unu el la respondoj estas, ke la tiama, pasiva "neŭtraleco ne distingis klare tiujn movadojn politikajn, kiuj portis en si trajtojn parencajn kun la t.n. Esperanto-spirito, disde tiuj, kies ideo estis kontraŭa al internacia pensmaniero kaj kies venko signifus malaperon de la bazaj premisoj por fruktodona poresperanta agado" (p. 95).

Konsentite. Absolute ĝuste en rilato al tiu relative malproksima pasinteco, facile kaj sendanĝere kritikebla kelkajn jardekojn post la faligo de hitlerismo. Sed kio pri la alia el inter "la plej malhelaj makuloj": la persekutoj kaj mortigoj de esperantistoj en "socialisma" Soveta Unio, kies unupartia totaleca sistemo restis esence sama? Kio pri la *nuntempaj* genufleksadoj antaŭ la oficiala sovetisma "marksisma-leninisma" doktrino? Estas korekte indigniĝi - eĉ se tro malfrue - pro la siatempa forigo de "la indikoj pri neŭtraleco" el la Statuto de la antaŭe neŭtrala GEA, sed kio pri la *nuntempa* forigo de la principo de neŭtraleco kaj pri la ne nur neneŭtralecaj, sed *kontraŭneŭtralecaj* agadoj de la iam fakte "meritplenaj asocioj kun longaj tradicioj" en Ĉeĥoslovakio, Pollando, Bulgario, Hungario kaj tiu parto de Germanio, kiu nun estas GDR kaj en kiu, ekde la tempo antaŭ Hitler, neniam plu povis esti organizita neŭtrala, sendependa Esperanto-Organizaĵo? Kial ne indigniĝi pro la fakto, ke en Sovetio tia organizaĵo neniam ekzistis? Fine kaj ĉefe, kial ne sole profunde indigniĝi, sed ankaŭ firme kaj laŭte protesti, kiel ni faras, aŭ almenaŭ silente plori, kiel, espereble, multaj faras, pro la *forigo de la principo de neŭtraleco el la nova Statuto de UEA* sub la premo de la partie fidindaj kaj nomitaj "gvidantoj" en la malneŭtralaj Esperanto-organizaĵoj kaj instancoj, aliĝintaj asocioj de UEA, kun la helpo de la "kunvojaĝantoj" kaj la "sukcesa pilotado" de la nuna prezidanto de UEA, kiel montrite en *Horizonto*, n-ro 1/80, p-oj 1-7. Per tio UEA, same kiel siatempe GEA, "perfidas preskaŭ ĉion, kion oni ĝenerale konsideris idea enhavo de la Internacia Lingvo" por uzi ankoraŭfoje la ĝustajn vortojn de U. Lins (p. 94). La granda diferenco estas, ke tiam temis nur pri unu landa organizaĵo, dum nun temas pri tuta aro da asocioj *aliĝintaj al UEA* kaj, eĉ multe pli grave, pri *Universala Esperanto-Asocio mem*.

Se la antaŭmilita *pasiva* neŭtraleco ne distingis inter ideologioj kaj politikaj sistemoj parencaj al idearo ligita al Esperanto, disde ideologioj kaj politikaj sistemoj kontraŭaj al internacia pensmaniero (v. supre), kio certgrade povas pravigi la siatempan perfidon de GEA, la teorie prilaborita kaj longe praktikata *aktiva* neŭtraleco ja klare distingas inter la du, kaj tial *senigas la nunan perfidon de kia ajn pravigo*. Ĝi estas tutsimple senrezista kapitulaco antaŭ "profunde malhumana reĝimo", kiu ekzekutis kaj mortigis minimume 25 milionojn de siaj civitanoj, inkluzive esperantistojn, kaj amason da komunistoj kaj diverstendencaj socialistoj, kaj kies prizonoj, karceroj kaj gulagoj (koncentrejoj) plu plenas je liberecamaj homoj. Al la "plej malhelaj makuloj en la tuta historio de la Esperanto-Movado" aldoniĝas plia, la plej nigra, ĉar ĝi etendiĝas al la tuta UEA.

Kompatindaj Zamenhof, Hodler, Privat kaj centoj da aliaj! Se ili reviviĝus, ili bruligus ĉion, kion ili kontribuis al la grandioza verko de la tuta esperantistaro kaj revenus en siajn tombojn por ripozi en paco. Mi mem iam postsekvos ilin, sed espereble ne antaŭ ol mi sukcesos en ilia nomo kaj en mia propra fini la senmaskigadon de la perfido, veki la dormantojn kaj eble atingi la revenon de UEA al si mem.

3.4 Kion Fakte Instruas la Historio?

Por kompletigi la bildon estu menciite, ke D. Blanke donas jenan instruon, kiu, laŭ li, sekvas el la historio de la Internacio de Proleta Esperantistaro (IPE):

"Se la koncepto de politika neŭtraleco estas sterile komprenata, ĝi ne povas savi siajn defendantojn antaŭ pereco aŭ kompromitiĝo" (p. 60).

Tiu aserto estas falsa konkludo de falsaj premisoj en lia artikolo kaj aliloke en la libro: kvankam IPE kaj ĝiaj gvidantoj komprenis la politikan neŭtralecon nek

"sterile", nek nesterile, sed tute forĵetis ĝin kaj komplete submetiĝis al la tiama soveta "marksisma-leninisma-stalinisma" linio (soveta *Gleichschaltung*), tio savis ilin nek "antaŭ kompromitiĝo", nek, malfeliĉe, "antaŭ pere" en la vera senco de la vorto, kion la libro prisilentas. Kontraŭe al tiu kredigo de Blanke, je kiu kredeble li mem ne kredas, la historio de IPE - same kiel la historio de Esperanto sub naziismo - instruas ion tute alian, nome ke nenia forĵeto de politika neŭtraleco kaj perfido de la idea aspekto de Esperanto, nenia, eĉ ne la plej sklaveca samdirektiĝo kaj la plej humiliga adorsterniĝo antaŭ la totalismaj potenculoj, povas "savi" kion ajn. Male, ĉio ĉi kun certeco kondukas en etikan, intelektan, tre ofte ankaŭ fizikan pereon. Mi nur sincere esperas, ke D. Blanke kaj la aliaj "ideologoj" de "marksismo-leninismo" en la nuna UEA (kaj, pli vaste, en la movado ĝenerale) ne havos la saman sorton, kiun havis Drezon, Demidjuk, Sneĵko, Nekrasov, Varankin, Spiridoviĉ, Kuzmiĉ kaj centoj da aliaj. Se tamen ili fariĝos viktimoj - kaj tiaj ili povas fariĝi nur pro la objekte solidariga funkcio de la Internacia Lingvo - ili verŝajne rememoros tiujn ĉi vortojn. En ĉiu okazo ili sciu anticipe, ke mi mem (kaj verŝajne multaj aliaj) tutcerte ne nur indigniĝos, sed ankaŭ publike montros mian indignon pro iliaj suferoj kaj klopodos ilin helpi, ĉar mi ĉiam solidariĝas kun nekrimaj viktimoj de nehumanaj politikaj sistemoj, piedpremantaj la homajn rajtojn kaj fundamentajn liberecojn, precipe se temas pri esperantistoj, inkluzive tiujn, kiuj sincere esperis utili al Esperanto en siaj landoj eĉ per falsaj kaj personaj atakoj kontraŭ la oponantojn de politika samdirektiĝo aŭ "enŝaltiĝo". Ili ankaŭ povas esti certaj, ke, kontraste, multaj el la hodiaŭaj aplaudantoj tuj fariĝos laŭtaj renegatoj aŭ kaŝiĝos en siajn musotruojn por malsolidariĝi kaj tiel eviti ilian sorton.

Plue, estas evidente, ke per la citita falsa konkludo D. Blanke admonas, fakte minacas la esperantistaron en la landoj de la soveta bloko ne fali en la retojn de "sterila neŭtraleco", t.e. eĉ ne de la plej milda formo de politika neŭtraleco, ĉar ĝi kontraŭas al la nuna "marksisma-leninisma" koncepto de senideigita Esperanto (pri tio alian fojon). Oni, do, povus atendi, ke tiaj ĝisostaj kontraŭneŭtralistoj etendos sian kamaradecan manon al neneŭtrala laborista SAT kaj vaste malfermos la pordon por ĝia aktivado en la "socialismaj" landoj, des pli ke, laŭ la preskaŭ nekredeble absurdaj fantaziaĵoj de "marksisto-leninisto" A. Rátkai, la historio de Esperanto "*Post 1905 pli kaj pli koneksiĝis kun la historio de la laborista movado*" (p. 28) kaj en la "*postaj periodoj ... la laborista esperantista movado definitive likvidis la etburĝajn iluziojn*" (p. 171), distinge, verŝajne, de la "grandburĝaj" fantaziaĵoj de la novaj ideologoj. Kontraŭe al la atendo, la laborista, neneŭtrala, sed demokrata SAT, kies celoj kaj rolo estas plurfoje misprezentitaj en la libro (espereble SAT reagos), ne taŭgas por la nunaj ideologoj, ĉar ĝia programo estas "*kontraŭa al la historia neceso aŭ nereala kaj fantazia*" kaj tial SAT "*devas degeneri*" (p. 60). Fakte, malgraŭ siaj sendubaj meritoj por Esperanto ekde la fondiĝo en 1921, SAT ne taŭgas kaj ĝi ne rajtas libere agi en la landoj de la bloko, ĉar ĝi estas plurtendenca laborista asocio, demokrate organizita, kaj ĝiaj membraro kaj gvidantaro, precipe post la spertoj kun IPE, ne lasas sin facile trompi. Ankaŭ la revivigo de IPE "fariĝis anakronismo" en la "nunaj historiaj kondiĉoj", ĉar "*multaj idealoj de IPE eniris en la agadon de MEM, fariĝis elementoj en la politiko de la Esperanto-asocioj en socialismaj landoj*" (p. 58) kaj - ni aldonas - en UEA mem kiel aliĝintaj asocioj. Tial D. Blanke plian fojon rekomendas sekvi la saman politikan linion kaj konsilas al "*ne-SAT-emaj laboristaj asocioj aŭ komunistaj grupoj en nesocialismaj landoj*", t.e. en landoj ekster la soveta bloko, "aktivadi lige kun la komunistaj partioj" (p. 59) kaj samtempe "kunlabori" kun la neŭtralaj landaj asocioj kaj kun la neŭtrala internacia movado (p. 60). Alivorte, eĉ pli intensa penetrado en la lokajn grupojn kaj landajn asociojn por propagandi la nunan ideologion kaj por malebligi reziston al plua kaj plia unudirekta politikigo de Universala Esperanto-Asocio sur ĉiuj niveloj. Apenaŭ oni povas imagi pli apertan rekonon de la politika konspiro en UEA, iniciatita antaŭ Hamburgo, unue malkovrita en la Aprila Artikolo de *Esperanto* (1974) kaj nun vaste realigata. La forigo de la principo de neŭtraleco el la nova Statuto de UEA ankaŭ formale faciligas la lastan obstaklon kaj plian fojon konfirmas nian prognozon.

Tio estas la vera kompromitiĝo, kiu kondukas al pereco, sed pri tia kompromitiĝo D. Blanke ne pensis. Aŭ, eble, li tamen konsciis pri ĝi kaj en tiu kazo ankaŭ volis ĝin. Kaj la "pacama" esperantistaro plu silentu kaj pasivu! ()*

* * *

Sufiĉas por hodiaŭ. En la sekvanta artikolo ni pritraktos la atakojn kontraŭ la zamenhofan internan ideon kaj kontraŭ mian evoluigon de tiu ideo en la ĝenerala kadro de humaneca internaciismo. Ĉar la soveta "interlingvistiko" plu distingas inter "naturaj" kaj "artefaritaj" lingvoj (eĉ en pluralo), ni iom ekzamenos ankaŭ la sufiĉe amuzan demandon, ĉu la naciaj kaj aliaj lingvoj estas piroj, karotoj, musoj ks., dum la Internacia Lingvo troviĝas en societo de telefono, telegrafo ks. (p. 216), aŭ tamen ĉiuj lingvoj estas sociaj fenomenoj kun specifaj trajtoj, kiuj havas malmultan aŭ nenion komunan kun la vegetala kaj nehoma animala mondoj, aŭ kun la mekanikaj rimedoj de komunikado.

3.5 Lingvistika Fetiĉismo

La prilingvajn partojn de tiu ĉi "marksisma-leninisma" libro markas kontraŭscienca fetiĉismo, laŭ kiu unuflanke troviĝas la "naturaj" lingvoj kaj aliflanke la "artefaritaj" nomataj plurloke ankaŭ "planlingvoj", ĉiam en pluralo. La esprimoj "naturaj" kaj/aŭ "artefaritaj" ("planlingvoj") estas abunde uzataj en diversaj kuntekstoj, ofte nebulaj kaj konfuzaj, kun tia aplombo, kvazaŭ tiu distingo estus ĝenerale akceptita kiel senapelacia scienca vero. Tiuj eraroj kaj erarigaj terminoj aperas, ekzemple, sur p-oj 37, 166, 206, 213-214, 219, 225 ktp., ktp. D. Blanke eĉ asertas, ke *"ĉiu esperantisto, malgraŭ diversideologiaj konceptoj, adaptas /adoptas?/ minimume la idealon, ke tiu /la idealo?/ estu planlingvo kaj ke ĝi, pro diversaj kaŭzoj, estu ĝuste la lingvo Esperanto, iniciatita de L. L.*

(*) En 1986 okazis plia konfirmo de tiu aperta sovetsisma ekkapero de la Esperanto-Movado: la gvidaj instancoj de Pola Esperanto-Asocio (PEA), demokrate elektitaj en la periodo de parta liberaliĝo sub la premo de "Solidarność", estis eksigitaj de la ŝtataj/partiaj aŭtoritatoj de Pollando, kaj anstataŭigitaj per komisaroj; tiuj siavice eksigis la tutan redaktan komitaton de *Pola Esperantisto*; rezulte, la Loka Kongresa Komitato (LKK) de la Jubilea Esperanto-Kongreso de UEA en Varsovio eksigis, kaj alia LKK estis nomumita; la nomumitaj estraranoj (komisaroj) de PEA nuligis la antaŭan inviton al Sennacieca Asocio Tutmonda (SAT) okazigi sian Jubilean Kongreson en 1987 en Pollando kaj malpermesis al ĝi kongresi tie. Detaloj pri tiuj hontindaj eventoj, konfirmantaj preskaŭ kun precizeco de naturaj sciencoj la antaŭvidojn en la verko *Hamburgo en Retrospektivo*, aperis en *Horizonto* n-roj 2-6/86. Dokumentoj kaj artikoloj aperis ankaŭ en *Sennaciulo*, organo de SAT, en *La Gazeto* kaj iomete en *Monato*. *Esperanto* de UEA kaj tiuj organoj de ĝiaj aliĝintaj organizaĵoj, kiujn mi ricevis, plene prisilentis la politikan puĉon en PEA kaj la malpermeson al SAT. La penetradon eĉ en la lokajn Esperanto-societojn ilustras la sekvanta okazaĵo. Komence de majo 1986 mi prezentis al La Londona Esperanto-Klubo (LEK) projekton de Rezolucio, en kiu la Klubo kondamnas la puĉon en PEA kaj la malpermeson al SAT kongresi en 1987 en Pollando. La Konsilantaro de LEK - laŭ mi evidente por ne "ofendi" la kelkajn simpatiantojn de la aktuala reĝimo en Pollando kaj "por ke estu paco" - rifuzis prezenti la proponon al kunveno de la membraro kaj tiel malebligis al la membroj ne nur diskuti pri la propono kaj decidi, sed eĉ sciiĝi pri tiu nova partipolitika ago en la kadro de la ĝenerala ekregio de UEA fare de partipolitikaj fortoj.

Zamenhof" (p. 182). Tio, kompreneble, estas malĝusta, ĉar amaso da esperantistoj, inkluzive min mem, ellernis kaj ekuzis la Internacian Lingvon kiel *lingvan* instrumenton de internacia komunikado longe antaŭ ol estis inventitaj la esprimoj "planlingvoj", "interlingvistiko" k.s., dum la granda plimulto, feliĉe, ankoraŭ ne infektiĝis de tiu plia malsano en la nuntempa Esperanto-Movado.

La kulminon de absurdeco en tiu tuta kontraŭscienca babilado atingas S. N. Podkaminer, por kiu Esperanto estas fakte egala al "poŝto, telegrafo, telefono, radio aŭ televido" (p. 216), do al mekanikaj rimedoj de komunikado, distinge de la "naturaj lingvoj", kiuj, do, verŝajne devus aparteni al animala aŭ vegetala mondo!

La demando pri "natureco" kaj "artefariteco" en ligo kun la Internacia Lingvo estas amplekse pritraktita en la Unua Parto de *Retoriko*, precipe en ĉap. III-VII (p-oj 60-111), en *Esperanto en Perspektivo* (p-oj 28-45), multloke en la libro *Elektitaj Paroladoj* kaj en pluraj artikoloj publikigitaj en diversaj periodaĵoj. La kunveno de la reprezentantoj de la Informaj Fakoj de UEA, okazinta en Frostavallen (Svedio) en 1956, funde ekzamenis ankaŭ tiun aspekton de poresperantaj agadoj kaj en la finaj konkludoj, formulitaj en la *Fundamenta Principaro de Informado pri la Internacia Lingvo*, listigis la ĉefajn erarojn, inter kiuj unuavice: "(a) nomi la lingvon artefarita, helpa, verda k.s.; (b) superflue menciadi diversajn projektojn de komuna lingvo; (c) ne distingi nete inter Esperanto kiel vivanta lingvo kaj tiuj projektoj, se la cirkonstancoj devigas paroli pri ili". Siavice, tiuj principoj estas prilaboritaj en la broŝuro *Por pli Efika Informado*, eldonita de UEA en 1974, senpere antaŭ la hamburgaj eventoj.

La pritraktita libro komplete malatentas ĉion-ĉi. En la koncernaj partoj ĝi estas precize la malo de la pozitivaj rezultoj atingitaj en la kadro de la ĝishamburga CED - kaj ekster ĝi - post multjaraj lingvistikaj, socipolitikaj, psikologiaj kaj alispecaj sciencaj studoj. Ankaŭ rilate tiun principan starpunkton, same kiel rilate preskaŭ ĉiujn aliajn demandojn kaj agadojn, la nunaj "marksismaj-leninismaj" ideologoj retroiras al la periodo de la Internacio de Proleta Esperantistaro (IPE) en la tridekaj jaroj, sed kun la esence grava diferenco, ke tiam IPE kaj ĝiaj "marksismaj-leninismaj-stalinismaj" ideologoj troviĝis ekster UEA (kaj ankaŭ ekster SAT), dum la nunaj ideologoj agas en UEA kaj tiel metas plian politikan stampon sur ĝian aktualan karakteron. Interalie, D. Blanke estas komitatano de UEA kaj unu el la tri membroj de la Estraro de la nuna CED, kiu, se oni esceptas la nomon, havas nenion komunan kun la antaŭhamburga CED, likvidita fine de 1974.

Post la detala pritrakto de la afero en *Retoriko* kaj en la aliaj supre indikitaj fontoj, estas nenecese - kaj ankaŭ maleble pro la limigita spaco en *Horizonto* - reveni ĉi tie al tiu tuta multfaceta problemaro. La interesigantoj facile povas legi aŭ relegi la menciitajn verkojn. Tamen, estas utile tuŝi, almenaŭ plej koncize, la ege malbonajn sekvojn de la science malakceptebla distingo inter la kvazaŭe "naturaj" lingvoj kaj la "artefaritaj", kies pluralo signifas plian science malakcepteblan implicitan aserton.

3.6 Fundamente Erara Koncepto

Ĉu, do, ekzistas iaj "naturaj" lingvoj kaj, distinge de ili, tute alia grupo da "artefaritaj" lingvoj?

En ĉiuj seriozaj lingvosciencaj medioj la koncepto pri lingvo kiel ia natura fenomeno - koncepto flegata precipe de la skolo de la t.n. "junaj gramatikistoj" antaŭ cent jaroj - estas delonge forĵetita ne nur en la Okcidenta mondo, sed ankaŭ en Soveta Unio. Tion mi prezentis kaj analizis jam en la unua eldono de

Retoriko, publikigita en 1950, apogante la asertojn kaj tezojn per multnombraj citaĵoj el verkoj de konataj lingvoscienculoj, inkluzive sovetajn. Nun kelkajn pliajn vortojn.

Sub aŭspicio de la Lingvistika Instituto de la Akademio de Sciencoj de USSR en 1976 aperis en Moskvo libro sub la titolo *Problemy Interlingvistiki: Tipologija i Evolucija Meĝdunarodnyh Iskustvennyh Jazykov* (Problemoj de Interlingvistiko: Tipologio kaj Evoluo de Internaciaj Artefaritaj Lingvoj), kolektiva verko sub ĉefredaktoreco de M. I. Isaev, dediĉita al "la brila memoro de E. A. Bokarev", konata soveta lingvisto kaj esperantisto. En la Antaŭparolo estas dirite:

"E. A. Bokarev devis elteni ne malmultajn disputojn pri la demando de la t.n. 'naturaj' kaj 'artefaritaj' lingvoj. Multaj scienculoj kontraŭstarigas ilin donante avantaĝon al la 'naturaj' lingvoj. Evgenij Aleksejeviĉ rigardis tiun vidpunkton erara, ĉar, laŭ lia opinio, ĉiuj lingvoj estas 'artefaritaj', t.e. ili formiĝas en la socio kaj estas subigataj al ĝia aktiva influo. Tio precipe koncernas la literaturajn lingvojn, kiuj estas subigataj al aktiva influo fare de scienculoj kaj literaturistoj. Temas, eksplikadis E. A. Bokarev, pri LA GRADO DE ARTEFARITECO de tiu aŭ alia lingvo" (p. 9, emfazo en la originalo).

Absolute korekte. Esence la samon, cetere, diris la konata lingvisto Max Müller antaŭ pli ol cent jaroj, kaj mi mem iom detale prilaboris ankaŭ tiun aspekton en *Retoriko* (p-oj 73-90) kaj aliloke. Tamen - ĉiam necesas iu "tamen" en la diskutoj kun tiaj nekonsekvencaj "ideologoj" - eĉ la titolo mem, por ne paroli pri la enhavo de tiu verko dediĉita al Bokarev, per la vortoj "artefaritaj lingvoj" kontraŭdiras lian starpunkton sur p. 9, same kiel la nun ekzamenata libro kontraŭdiras ĝin.

Hodiaŭ verŝajne ne ekzistas unusola filologo aŭ sociologo, kiu ne konsentus, ke lingvo - kiu ajn lingvo, inkluzive, kompreneble la lingvon Esperanto - estas socia fenomeno, regata ne de biologiaj, sed de tute specifaj leĝoj agantaj en la homa socio.

Kvankam la penso pri lingvo kiel natura aperaĵo estas forĵetita, tamen la ideo pri la "natureco" de la lingvo reaperas eĉ nuntempe en tiu aŭ alia formo, sub tiu aŭ alia preteksto, kun tiu aŭ alia celo. Kiam en la pritraktata libro oni denove skribas pri "naturaj" kaj "artefaritaj" lingvoj (eĉ en pluralo), tiam jen plian fojon la "natureca" fetiĉo reaperas. Se la uzo de tiuj terminoj havus karakteron de ia poezia metaforo, tio ne multe ĝenus. Sed ne estas tiel. Ili estas uzataj en sia vera senco, kvazaŭ la naciaj lingvoj estus iaj *naturaj* elkreskaĵoj de *nature* vivanta organismo, la nacio, dum la Internacia Lingvo estus io "artefarita" en senco de *kontraŭnatureca*, "elpensita" de unu homo kiel ekstersocia abstraktaĵo, tial sen eblecoj evolui, sen literaturo, sen poezio, sen karaktero de vivanteco ... kun la fina blinkenberga rezulto, ke ĝi entute ne estas lingvo. Tiu kontraŭscienca distingo faris al la Internacia Lingvo multege da malbono, kiel ilustras du el miloj da ekzemploj: tiu de Blinkenberg en Montevideo kaj tiu de Krupskaja en la tempo de Lenin.

3.7 Blinkenberg kaj Krupskaja Samopinias

Kiel konate almenaŭ al tiuj, kiuj legis la raportojn kaj informojn ligitajn al la fina akcepto de la Rezolucio de Unesko de la 10-a de decembro 1954 favore al Esperanto, Prof. Blinkenberg lanĉis senprecedencan atakon en la Programkomisiono kun la celo malebligi la akcepton de rezolucipropono, prezentita de la meksikia delegacio. Li riproĉis, ke Esperanto estas "artefarita" kaj akcentis, ke li entute estas kontraŭ tiaj "artefaritaĵoj", en kiuj oni eble

povas "esprimi la urugvajajn menuojn", sed ne literaturajn valorojn, sciencajn pensojn, amsentojn, entute emociojn. Li diris, ke Esperanto havas mizeran aspekton, povran vortaron, primitivan sintakson, en kiu oni nenion povas diri kaj ankoraŭ malpli esprimi la grandajn sentojn de amo (v. pli detale en *Horizonto* n-ro 7/1977, p. 8). Nur dank' al grandega kontraŭagado en la urugvajaj gazetaro kaj radio, kiel ankaŭ en la sino de la Konferenco mem, estis eble renversi la negativan decidon de la Program-komisiono kaj venkigi nian aferon dum la lasta plenkunsido de la Konferenco.

Nun oni sciiĝas el la priparolata libro pri la starpunkto de la edzino de Lenin al Esperanto. Jen la koncerna parto:

"La edzino de Lenin, N. K. Krupskaja, kvankam nenion skribinta pri la rilato de Lenin al Esperanto, tamen mem esprimis malfavoran opinion pri iu artefarita lingvo ĝenerale. Laŭ ŝia vidpunkto artefarita lingvo ĉiam estos malriĉa, malviva, malvarma kaj mizera. Tamen ŝi ne neis, ke Esperanto povas esti utila por la interhomaj ligoj, sed ne povis imagi, ke juna homo diros amvortojn en Esperanto al sia amatino kaj ke patrino kantas esperantlingve lulkanton al sia infano" (p. 37).

Do, samaj falsaj konkludoj de falsaj premisoj, esprimitaj per preskaŭ identaj vortoj. Ne kulpas nur Krupskaja, Blinkenberg kaj miloj da aliaj blinkenbergoj, okupantaj ofte decidajn poziciojn en la politika, kultura kaj ĝenerale socia vivo, kaj tial povantaj per tiaj falsaj "argumentoj" negative influi la publikan opinion, kelkfoje ankaŭ malrapidigi aŭ eĉ provizore haltigi la disvastiĝon de Esperanto. Grandparte kulpas tiuj esperantistoj, inkluzive la nunajn "marksismajn-leninismajn" ideologojn, kiuj faras la samajn erarojn kaj per ili liveras municion por la kanonoj de prejudicita kontraŭuloj aŭ de apertaj, konsciaj malamikoj de "internacia pensmaniero", sekve ankaŭ de Esperanto, kiaj estis kaj plu estas diversaj stalinoj, hitleroj, salazaroj k. s.

Se la nunaj ideologoj ne kapablas science ekspliki la radikojn kaj esencon de la novepoka internaciismo, al kiu estas ligita la formiĝo, ekesto kaj plua evoluo de la Internacia Lingvo laŭ *principe* samaj sociaj leĝoj, kiuj regas ne nur la naciajn, sed ankaŭ la klasajn, kastajn, religiajn kaj ĉiujn aliajn lingvojn, ili prefere devus silenti por ne malutili al afero, kiun ili verŝajne deziras progresigi. Kvankam laŭ Bokarev kaj laŭ ĉiuj kompetentaj lingvistoj kaj sociologoj, ĉiu lingvo estas "artefarita" en la supre difinita senco (mi mem trovas la esprimon neadekvata eĉ en tiu senco), tamen oni neniam povas legi aŭ aŭdi pri "artefarita" angla, "artefarita" rusa ktp. Estus vere tempo, ke oni ĉesu alglui tiun epiteton al Esperanto, precipe se oni kontraŭstarigas ĝin al la kvazaŭe "naturaj" lingvoj.

3.8 Science Malĝusta kaj Taktike Malutila Pluralo

En la kadro de tiu science kaj tial ankaŭ taktike erara formulo, plia neallasebla malvero estas paroli pri "artefaritaj lingvoj", "konstruitaj lingvoj", "planlingvoj", aŭ eĉ senepitete "internaciaj lingvoj" k. s. *en pluralo*.

La naciaj lingvoj restas naciaj laŭ siaj strukturo, socia portanto, intelekta proprietulo kaj praktikaj aplikoj eĉ se iuj el ili estas pli aŭ malpli vaste uzataj kiel *helpaj* lingvoj en internaciaj rilatoj. Evidente, pri ili tute ne temas ĉi tie, ĉar ili tutsimple ne estas internaciaj. Restas, do, la *projektoj* de komuna lingvo por internacia komunikado: kvincento ĝis sescento da ili depende de la kriterioj, laŭ kiuj oni juĝas la "prilaboritecon" de tiuj projektoj.

Ne povas esti kia ajn dubo, ke sole la lingvoprojekto iniciatita de Zamenhof sukcesis transformiĝi en vivantan lingvon de monde internacia lingva kolektivo, uzanta ĝin por ĉiaspecaj internaciaj rilatoj praktike en ĉiuj vivosferoj. Unu el la fundamentaj aspektoj de la evoluprocezoj en la naturo kaj en la socio estas la transformiĝo (dialektita salto) de unu kvalito en esence novan kvaliton rezulte de daŭraj, ofte nerimarkeblaj kvantaj ŝanĝiĝoj rilate nombron, mezuron, volumenon, temperaturon, ktp. depende de la ekzamenata fenomeno. Tiun dialektikan principon ne elpensis Marx, kvankam niaj "marksistoj-leninistoj" devus iom scii pri ĝi kaj eble ankaŭ kompreni ĝin. Ĝi, kune kun la aliaj dialektikaj principoj eĉ ne mencioblaj ĉi tie pro spacomanko, *objektive* konsistigas la evoluprocezojn. Longe, tre longe antaŭ Marx kaj Engels eĉ infanoj distingis inter akvo, glacio kaj vapore! Kaj ekde la lingvaj pratempoj ĉiuj sociaj grupoj, kiuj spertis tiun aŭ kiun ajn alian aspekton de la realaĵo *kaj socie ekkonsciis pri ĝi*, kreis adekvatajn distingajn *lingvajn* esprimojn, necesajn por komunikado interne de la grupo. Tio, siavice, evoluigis la penson kaj kontribuis al plua kompletigado de la bildo pri la naturo kaj pri la socio kun pliaj paralelaj reflektiĝoj en la lingvo.

La "dialektika salto" de unu kvalito en alian povas daŭri de unu momento ĝis multaj dekmiloj da jaroj aŭ, rilate kelkajn fenomenojn, eĉ milionojn da lumjaroj. En la kazo de Esperanto ĝi estas klare konstatebla kun preskaŭ naturscienca precizeco. En la periodo inter 1887 kaj 1905 la kvantaj ŝanĝiĝoj - interalie rilate la nombron de Esperanto-parolantoj, teritorian etendiĝon, praktikajn aplikojn en internacia rilatado, ĉefe skriba, kreskon de la originala kaj traduka literaturo - ricevis tian amplekson kaj jam tiel evoluigis la projekton, ke en Bulonjo-ĉe-Marzo konsiderinde granda *multnacia kolektivo* povis ekuzi ĝin ankaŭ parole kiel *sian neŭtrale homan lingvon* de internacia komunikado. En tiu momento la projekto fariĝis vivanta lingvo kun klare difinita internacikarakterata socia portanto. Samtempe la internaciismo - historie kondiĉita de tuta aro da teknologiaj, ekonomiaj, ideologiaj, lingvaj kaj aliaj faktoroj, kaj de iliaj reciprokaj interagoj - ricevis ankaŭ sian lingvan esprimiĝon, kio per si mem necese fortikigis ĝin. En la unua frazo de sia inaŭgura parolado Zamenhof direktis sin al "fratoj kaj fratinoj el la granda *tuthoma familio*" kaj iom poste emfazis "la tutan gravecon" de tiu tago, ĉar tie, en Bulonjo-ĉe-Marzo, "kunvenis ne francoj kun angloj, ne rusoj kun poloj, sed homoj kun homoj". Per tio Zamenhof ne "kreis", sed resumis la kvintesencan de la *tuthoma*, humaneca internaciismo diference, ekzemple, de la originala marksisma klaskarakterata "proleta internaciismo" kaj kontraste al la nuna soveta "socialisma internaciismo" kiel unu el la subigaj instrumentoj de la "pli aĝa frato" en la rilatoj de USSR kun la landoj de la soveta bloko. Per tio Zamenhof jam en 1905 ankaŭ donis anticipan respondon al la iom infanece naiva retorika demando de D. Blanke en 1978 sur p. 198 "ĉu ekzistas malhumaneca internaciismo?" (pli detale pri tio en la dua aldono de *Hamburgo en Retrospektivo*, p-oj 26-29 kaj aliloke).

La nova lingvo montriĝis tiel sana kaj vivkapabla, ke ĝi povis plu ĉiurilate progresi kaj atingi la nunan stadion de interna riĉeco kaj de ekstera disvastigiteco malgraŭ la oftaj reviviĝoj de ekstremaj naciismoj, malpermesoj, persekutoj, enkarcerigoj kaj ekzekutadoj de esperantistoj, prejudicioj kaj aliaj obstakloj. Neniu el la 500-600 projektoj atingis tion. Neniu el ili transformiĝis en lingvon evolukapablan. Ili ĉiuj malaperis senpostsigne. Fakte, apenaŭ iu sciuis kion ajn pri ili, se en la skribaĵoj de la nunaj "interlingvistikistoj", "planlingvistoj", "senĉapeligaj reformistoj" kaj similaj istoj la nenaskitaj aŭ mortnaskitaj *projektoj* (indulgon pro la metaforo!) ne reaperus kiel principe samvaloraj al la vivanta kaj alte nuancita *lingvo* Esperanto tra la kontraŭscienca egaliga pluralo.

Estas vero, ke en noto sur p. 206 D. Blanke skribis, ke "*la nocio planlingvo en pluralo nur havas scienctaktikan signifon*", ĉar "*en la realeco nur funkcias unu planlingvo, Esperanto*".

Do, eĉ D. Blanke grandanime konsentas pri la nekontestebla vero, ke ekzistas nur unu internacia lingvo. Se tiel, do kial mensogadi per la pluralo? Kiun "sciencstrategian" celon oni fakte esperas aŭ deziras atingi per tiu kontraŭscienca "scienctaktika signifo"? Ĉu trompe allogi la lingvosciencistojn, por ke ili ekinteresiĝu pri tiuj diversaj "planlingvoj" kaj post abstraktaj kabinetaj studoj ĉiu el ili "decidu" laŭ sia gusto, ke tiu aŭ alia "plano" ne taŭgas, ellaboru novan "planon" kaj, rezulte, aperu pliaj projektoj de "planlingvoj", kiel tio jam okazis en la pasinteco? Kaj ĉu la vero, la objektiva konstato de faktoj ne estas la plej fundamenta postulato en kiu ajn scienca branĉo kiel antaŭkondiĉo de korektaj sciencaj analizoj kaj konkludoj? Aŭ, eble, la "scienco" de niaj "marksismaj-leninismaj" ideologoj estas escepto ankaŭ tiurilate?

Se la lingvosciencistoj interesiĝas pri la Internacia Lingvo, kiel ili ja devus - tiaj sendube ekzistas - ili facile povas bone elferni ĝin kaj poste studi ĉiujn ĝiajn lingvosciencajn aspektojn, inkluzive la surprize multajn lingvajn erarojn en tiu ĉi libro kun la escepto de la artikolo de U. Lins. Se ne, do Esperanto funkciis kaj certe plu funkcios ankaŭ sen ilia interesiĝo. Ĝin povos detrui nur la esperantistoj mem. Neniu alia.

En ĉiu okazo la pluralo estas science falsa, dum la "taktiko" bazita sur tiu falsaĵo estas senlime malutila el ĉiuj vidpunktoj: ekde sciencaj pritraktoj, tra psikologiaj efikoj kaj flankefikoj ĝis praktikaj aktivadoj.

3.9 Senideigo de Esperanto: Kial?

Kiel oni vidas el ĉio ĝis nun dirita, trae en la libro Esperanto estas traktata kiel simpla mekanika instrumento de komunikado, sed du artikoloj rekte celas senigi la lingvon de kia ajn idea valoro aŭ, kiel mi mem prefere esprimus min, de kia ajn socie solidariga funkcio.

En sia longa artikolo, verkita en la tempo antaŭ la likvido de kia ajn Esperanto-Movado en Soveta Unio, E. Drezen analizis la personecon de Zamenhof kaj liajn filozofiajn, religiajn kaj prilingvajn konceptojn. Tion li faris konforme al la tiama "marksisma-leninisma-stalinisma" doktrino kaj konkludis: *"Malakceptante kaj eĉ kontraŭ-batalante la tutan politike-filozofian idearon de Zamenhof, ni devas kliniĝi antaŭ liaj lingvoideoj, kiuj unuiĝintaj en lia menso, estiĝis potenca forto"* (p. 161).

La artikolo de D. Blanke estas komplete dediĉita al la pritrakto de la "interna ideo de Esperanto", unue laŭ la koncepto de Zamenhof kaj poste, sub aparta titolo "La 'interna ideo' hodiaŭ" kaj aliloke, laŭ mia koncepto, fakte prilaboro kaj evoluigo de la Zamenhofa penso diversloke en miaj verkoj, paroladoj kaj prelegoj, kvankam mi mem neniam uzis la esprimon "interna ideo".

Blanke starigas la absurdan demandon "ĉu lingvo enhavas ideologion?" (p. 200) por povi sur pluraj paĝoj "pruvadi" ke "identigo de lingvo kaj ideologio" (p. 201) estas erara, kvazaŭ Zamenhof, mi mem aŭ kiu ajn alia estus kiam ajn asertintaj tian stultaĵon. Tia kontraŭscienca polemikado kun vakuo, karakteriza por niaj "ideologoj" (kaj ne nur por ili), ne estas tiel naiva, kiel unuavide oni povus pensi. La skemo estas tre simpla: (i) atribui al la kontraŭuloj iun koncepton, kiel eble plej absurdan, kiun ili nek havas, nek iam havis; (ii) "pruvi", ke tiu koncepto, fakte neekzistanta, estas absurda; (iii) dedukti, ke la faktaj konceptoj de la kontraŭuloj estas "absurdaj": en nia kazo, ke la science korekta *koncepto* de Zamenhof, nomata iom neadekvate "interna ideo", kaj miaj

analizoj pri la solidariga funkcio de lingvo estas eraraj. Tiucele Blanke misuzas la *neadekvatecon* de la esprimo "interna ideo" kaj eĉ evidentajn metaforojn - li estas sufiĉe klera por ne vidi, ke ili estas metaforoj - el miaj verkoj kaj precipe el miaj paroladoj, sed verŝajne forgesas, ke en la verkoj de Marx kaj Engels, eĉ en tia "seka" dokumento, kia estas la *Komunista Manifesto* (por citi nur tiujn, kies senerarecon li ne rajtas kontesti), tiaj figuroj pli ol abundas. Tamen, nek li, nek kiu ajn laŭ mia scio kiam ajn venis al ideo interpreti ilin laŭlitere, nemetafore.

Estu kiel ajn, por nia "ideologo" la enhavo de la esprimoj *tuthoma sento, monda pensmaniero, solidariga funkcio, universale homa konceptado, humaneca internaciismo, vivanta sento de aparteno al la homaro* (p. 198), prenitaj diversloke el miaj verkoj, estas nenio alia ol "mistikismo" (p-oj 197, 198). Malgraŭ tiu eksplicita aserto, mi inklinas dubi, ĉu eĉ por li tio estas "mistikismo", sed mi estas certa, ke por mi kaj por miloj kaj miloj da Esperanto-parolantoj ĉie tra la mondo, inkluzive la landojn de la aŭtoroj de la libro, la *tuthoma sento, monda pensmaniero, vivanta sento de aparteno al la homaro, do humaneca internaciismo* estas nenia "mistikismo", sed *idea realaĵo*. Ĝi plu formiĝas en la sino de la monda socio (homaro) spitante la nuntempajn sporadajn reeksplodojn de ekstremaj naciismoj - parte eĉ pro ili en formo de reago - kiel idea reflektiĝo de objektive funkciantaj materiaj kondiĉoj kaj evoluprocezoj, kiuj ĉiam pli forte interdependigas kaj tial ankaŭ kunligas ĉiujn mondopartojn. Kiel almenaŭ D. Blanke el la "ideologo" devus scii, la ideoj ne estas nur iaj pasivaj kaj mekanikaj reflektiĝoj de la materiaj kondiĉoj, sed siavice influas la evoluprocezojn. Nur tiu interago eksplikas la socion kaj ĉiujn sociajn fenomenojn, inkluzive la lingvon.

Esperanto ne estas "ideo". Ankoraŭ malpli "ideologio". Sed ĝi certe estas *lingva esprimo* de la novepokaj internaciismaj ideoj, ekestintaj pro la menciitaj kaŭzoj kaj kondukantaj al la estonta unueca homaro, same kiel la naciaj kaj ĉiuj aliaj lingvoj estis aŭ estas lingvaj esprimoj de aliaj materiaj kondiĉoj kaj aliaj ideoj, kondukintaj al la formiĝo de nacioj kaj aliaj sociaj kungrupiĝoj. Kaj same kiel ĉiu nacia aŭ alia lingvo efikas kuntene kaj solidarige - ĉiu el ili en la rilato al sia socia portanto - tiel same la Internacia Lingvo efikas kuntene kaj solidarige en la rilato al sia socia portanto, nome al tiu *monde internacia kolektivo*, kiu akceptis kaj evoluigis ĝin por sia internacia komunikado en la plej vasta senco de la vorto. Plue, same kiel ĉiu nacia, etna aŭ alia lingvo fortikigas la senton pri aparteno al la koncernaj nacio, etno aŭ alia socia unuo, tiel same la Internacia Lingvo fortikigas la senton pri aparteno al la homaro. Mi povus daŭrigi per pliaj "same kiel ... tiel same", sed espereble tio sufiĉas. Se ne estus tiel, la lingva problemo ne ekzistus kaj ankaŭ Esperanto neniam estus ekestinta.

Tio - nek pli, sed ankaŭ nek malpli - estas la kvintesenco de la "interna ideo", kiun mi prefere nomas *solidariga rolo de la lingvo*, ĉar lingvo *interne* de si ne havas ideon, sed certe en sia funkcio de lingvo servas ne sole por pensado kaj komunikado, sed ankaŭ efikas "ekstere", solidarige.

Krome, se la Internacia Lingvo ne efikus tuthome solidarige, la malpermesoj de Esperanto, la malebligadoj de liberaj internaciaj kontaktoj pere de ĝi kaj la persekutadoj de esperantistoj en la ekstreme naciismaj totalecaj sistemoj neniam estus okazintaj. Kaj ankaŭ la antaŭaj kaj nunaj "ideologoj" ne devus malŝparadi tiom da tempo kaj papero por provi konvinki la politikajn decidajn faktorojn en siaj landoj, ke Esperanto ne havas pli da socia signifo, ol posedas - telegrafo, alivorte, ke ĝi ne estas *la "danĝera lingvo"* povanta, eble, minaci eĉ detaleton de la senerara totaleca ideologio, sur kiu baziĝas la soveta regadsistemo, precipe la dogmon pri la "proleta" internaciismo laŭ la *soveta* misinterpreto de tiu esprimo.

Drezen provis senigi la Internacian Lingvon ĝuste de tiu *tuthoma* solidariga rolo por plaĉi al la tiamaj mastroj. D. Blanke faras la samon por plaĉi al la nunaj.

En ambaŭ kazoj temas verŝajne pri sincera kredo, ke tia "senideigita" Esperanto estos pli facile akceptebla por la reganta tavolo ("scienctaktika" movo?). Drezen ne sukcesis kaj estis ekzekutita. Multaj aliaj same. Se Blanke kaj liaj amikoj sukcesos eĉ per tia "taktiko", science falsa, ne nur utiligi la lingvon por partipolitikaj celoj, kiel ili nun faras, sed ankaŭ amase disvastigi Esperanton en siaj landoj, precipe en la ŝlosila USSR, por libera translima komunikado pere de ĝi, ili havos la okazon mem konstati la efikon de la tuthome solidariga rolo de Esperanto. Eble eĉ la reĝimo fariĝos malpli ekskluziva kaj la dogmo pli elasta. Se ne, la ekskluziveco de la sistemo ekskludos la Internacian Lingvon. Plian fojon provizore. Kiu vivos, vidos.

* * *

En Strasburgo, dum la 6-a Internacia Konferenco de N.E.M., mi iom pli detale pritraktos en la inaŭgura prelego la tutan demandon. D. Blanke kaj liaj kunlaborantoj estos bonvenaj, se ili povos ricevi elirvizojn por ĉeesti kaj partopreni la diskuton. Tie, en demokrata atmosfero, ili povos libere esprimi siajn opiniojn kaj defendi siajn starpunktojn. Kaj ankaŭ iom al kutimiĝi al aŭskultado - kaj aŭdado - de alies opinioj kaj starpunktoj, se tio entute ankoraŭ eblas. (*)

(*) Apenaŭ necesas aldoni, ke nek D. Blanke, nek kiu ajn alia el la "ideologoj" partoprenis la Konferencon en Strasburgo.

EN "THE ESPERANTO MOVEMENT" (LA ESPERANTO-MOVADO)

DE PETER G. FORSTER (*)

4.1 Pri la Verko Ĝenerale

La aŭtoro informas en la Antaŭparolo, ke la verko estas reviziita kaj ĝisdatigita versio de lia tezo "A Sociological Study of the Esperanto-Movement" (Sociologia Studo pri la Esperanto-Movado), kiun la Universitato de Hull (Britio) akceptis en 1977 por la grado de Doktoro pri Filozofio. La libron eldonis la konata *Mouton Publishers - The Hague, Paris, New York* en 1982, do kvin jarojn post la doktoriĝo de la aŭtoro kaj ok jarojn post la eventoj de Hamburgo en 1974. Necesas tion diri por atentigi, ke la aŭtoro havis sufiĉe da tempo por trastudi kaj science analizi la partipolitikan intrigon de 1974 kaj ĝiajn sekvojn, kion li ne faris, kiel montriĝos poste.

La 413-paĝa libro konsistas el Antaŭparolo, Enkonduko, du ĉefaj partoj, Konkludo, ses apendicoj, Glosaro kaj Bibliografio. Estas strange, ke en tia verko mankas tema kaj persona indeksoj, kio grave malhelpas orientiĝon. En Parto I estas pritraktita la monda Esperanto-Movado, en Parto II Esperanto en Britio. *Horizonto* ne ricevis la libron por recenzo. Tial recenzo ne aperos. Sed la redaktoro de tiu ĉi rubriko ricevis la verkon donace de amiko kaj, tra leginte ĝin antaŭ nelonge, trovis, ke necesas iom pritrakti ĝin ĉi tie.

Kvankam la reviziita tezo de Forster enhavas valorajn sekciojn, precipe en la parto pri Esperanto en Britio, tamen en ĝi troviĝas ankaŭ tre multaj malĝustaĵoj, malzorge ellasitaj aŭ manke prezentitaj faktoj, kaj tial eraraj interpretoj kaj konkludoj. Mi notis centon da ili ekde la unua paĝo de la Antaŭparolo ĝis la lastaj paĝoj de la Bibliografio, sed limigos min sube al unu fundamenta kaj nur al kelkaj el la multnombraj rilatantaj aŭ rekte al mi persone aŭ al laboroj ligitaj al mia nomo en la Esperanto-Movado. Kaj tion mi faros sole por eviti, ke mia silento estu komprenata kiel konsento. Ĝi estas des pli necesa, ĉar en la Antaŭparolo la aŭtoro esprimas dankon al pluraj personoj, "unuavice" al mi, "pro iliaj interesiĝo kaj helpo" (en la plua teksto ĉiuj citaĵoj estos en Esperanto-traduko, farita de mi mem), kio povus kredi la legantojn, ke mi almenaŭ certagrade kunrespondekas. Pretere dirite, Forster mencias mian nomon en societo de kelkaj aliaj esperantistoj en unu alineo, sed en nova alineo li dankas al personoj "en la akademia mondo", inter kiuj troviĝas ankaŭ nomoj de esperantistoj, ekz. tiuj de Bernard Golden, D-ro R. Wood kaj D-ro U. Lins.

(*) Represita el *Horizonto* (ED), n-roj 4/84 kaj 5/84.

Tiamaniere la nova doktoro pri filozofio, kiu sur p. 232 objekte prezentas miajn akademian karieron kaj jursciencajn atingojn, en la Antaŭparolo de la sama libro eligas min el "la akademia mondo"! Sekvas la kutima formulo, ke danka mencio de iu nomo "ne necese implicas konsenton aŭ aprobon de la enhavo" fare de la koncernato. Estas vero, ke plurajn jarojn antaŭ la doktoriĝo kaj multajn jarojn antaŭ la publikigo de sia verko, la aŭtoro iom korespondis kun mi kaj petis de mi kelkajn konsilojn, sed li neniam konsultis min pri esence gravaj historiaj faktoj en la Esperanto-Movado aŭ pri eventoj ligitaj al mia nomo. Tial mi plene distancigas min de lia verko.

4.2 Iom pri la Fontmaterialoj

Necesas fari almenaŭ du pliajn ĝeneralajn rimarkojn, ĉar ili rilatas al foresto de la necesa konscienca studado de fontmaterialoj en preparado de doktoreca tezo.

La unua koncernas la liston de la konsultitaj periodaĵoj (p. 405). En ĝi mankas la jugoslavia *La Suda Stelo*, unu el la plej elstaraj antaŭmilitaj periodaĵoj, redaktata tiutempe en la spirito de humaneca internaciismo kaj tial senkompromise kontraŭa al submetiĝo de Esperanto en kia ajn formo al naziismo/faŝismo. Malatenti tiun periodaĵon, vaste apogatan ankaŭ ekster Jugoslavio, necese kondukas al nekompreno de la reala situacio en la Esperanto-Movado en la periodo antaŭ la Dua Mondmilito. En la listo mankas ankaŭ *Horizonto*, kvankam en septembro 1980, kiam la aŭtoro kompletigis la manuskripton, ĝi estis regule aperanta jam la trian jaron. Sen *Horizonto*, la laŭtparolilo de la sendependa, humaneca esperantismo, ne eblas korekte pritaksi la staton en la posthamburga UEA kaj, pli vaste, en la Esperanto-Movado.

La dua rimarko rilatas al la sesa sekcio de la Bibliografio sub la titolo "Internacilingva Movado: Libroj, Broŝuroj kaj Raportoj (Ĝenerala Dokumentado)" (p-oj 406-412). Tie estas menciita nur unu dokumento de la iama Centro de Esploro kaj Dokumentado (CED): tiu entenanta la liston de la lokaj Esperanto-societoj (1964). Tamen, inter 1952 kaj la fino de 1974 CED publikigis, aldone al kelkaj libroj, 325 dokumentojn en la serioj A-J, CED kaj CED/INT. Sen trastudo de tiu dokumentaro kaj de la tuta arkivo de CED oni povas nek objekte sciiĝi pri faktoj, nek kompreni la dinamismon en la periodo 1950-1975. Plue, en tiu sama sekcio estas menciita la 1-a eldono de mia *Retoriko* (1950). Fakte, la aŭtoro estus devinta trastudi la 3-an, reviziitan kaj kompletigitan eldonon de 1971. Se li estus almenaŭ leginta tiun verkon, en kiu la tuta Unua Parto de 116 paĝoj rilatas al lingvo, li estus listiginta ĝin en la trian sekcion "Verkoj pri Lingvo" kaj, pli grave, eble evitinta bazajn konceptajn erarojn. Fine, en la sesa sekcio troviĝas tri el miaj fakaj-sciencaj nacilingvaj verkoj - *Conceptions Soviétiques de Droit International Public* (Sovetiaj Konceptoj de Internacia Publika Juro), *State and Law: Soviet and Yugoslav Theory* (Ŝtato kaj Juro: Sovetia kaj Jugoslavia Teorioj), kaj *Soviet Penal Policy* (Sovetia Punjura Politiko) - kiuj havas absolute nenian ligon, escepte de mia nomo, kun la "internacilingva movado: libroj, broŝuroj kaj raportoj (ĝenerala dokumentado)". Tio estas preskaŭ nekredible malzorga aliro al fontaj studmaterialoj.

4.3 Fundamenta Eraro kaj Ĝiaj Sekvoj

Ĉiuj principaj-konceptaj eraroj en la verko sekvas el unu fundamenta: la kompleta nekompreneo de la socia karaktero de lingvo, kiu ajn lingvo, fare de la aŭtoro. Tial li ankaŭ neniel komprenas la rilaton inter homkolektivo formiĝinta kiel klare distingebla aparta socia grupo (gento, hordo, klaso, nacio, k.a., inkluzive internacian homkolektivon), unuflanke, kaj ĝia respektiva lingvo, aliflanke. Estas vero, ke sur p. 105 Forster citas la faman lingviston E. Sapir, kiu prave skribis, ke "la nura fakto de komuna lingvo servas kiel siaspeca potenca simbolo de socia solidareco inter la parolantoj de tiu lingvo", sed la tuta libro, eĉ la teksto sub la menciita citaĵo montras, ke li malatentas la solidarigan rolon de la lingvo, ĉar li tutsimple ne komprenas la daŭran interagan procezon inter socio kaj lingvo. Alie li ne skribus sur la sama p. 105 plurajn absurdaĵojn, ekzemple, ke Zamenhof en siaj paroladoj evoluigis la ideon pri "Esperanto kiel dua nacieco por la membroj de la Movado"! En tiu unusola konfuza frazeto troviĝas tri eraroj: (i) Zamenhof neniam evoluigis tiun ideon, sed ion tute alian; (ii) Esperanto estas lingvo kaj neniel povas esti "nacieco" en kiu ajn senco de la angla "*nationality*"; (iii) en tia kunteksto povus temi, se la tezo estus ĝusta, ne pri "membroj de la Movado", sed nur pri apartenantoj al la esperantlingva komunuaĵo. Similaj malĝustaĵoj kaj kontraŭdiroj abundas en la libro.

Tiu fundamenta eraro kaŭzas nombron da principaj-konceptaj. Tri el ili estu menciitaj:

La aŭtoro aplikas al Esperanto la epiteton "*artefarita*" distinge de la naciaj lingvoj, kiuj kvazaŭe estas "*naturaj*". Jam sur la 1-a paĝo de la Enkonduko li senkritike transskribas la kontraŭsciencan difinon donitan al Esperanto en *Shorter English Dictionary*, t.e. "nomo de artefarita lingvo inventita por universala uzo". Li, same senkritike, uzas tra la tuta verko la esprimojn "artefarita" por Esperanto, "inventinto" (*inventor*) por la iniciatinto de Esperanto, kaj "naturaj" por ĉiuj aliaj lingvoj (ekz. p-oj 3, 53, 54, 59, 60, 147, 177, 348, ktp., ktp.). Fakte, la diversaj naturismaj-biologiaj lingvistikaj skoloj estas jam delonge forlasitaj, kaj neniu serioza lingvisto aŭ sociologo rigardas la lingvon ia natura fenomeno. Kvankam nuntempe ekzistas diversaj lingvosciencaj fluoj, tamen ĉiuj konsentas pri la nekonstatebla fakto, ke lingvo estas socia fenomeno, kies ekeston, evoluon kaj malaperon regas ne iaj biologiaj, naturaj aŭ mekanikaj leĝoj, sed ekskluzive sociaj en la vasta senco de la vorto. Tial estas grava kaj misgvida eraro nomi kiun ajn lingvon "natura" aŭ "artefarita". Se tiajn erarojn ripete faras jam dum jardekoj iuj vortaroj (ne ĉiuj) pro nescio aŭ intence, aŭtoro de doktoriĝa tezo devus ne fari ilin. Anstataŭ lerni eraran difinon el vortaro, li devus kritiki ĝin kaj doni science ĝustan difinon, atentigante pri tio la eldoniston. Finfine, Zamenhof, kiu ĉiam prave rigardis sin nur "iniciatoro" de la Internacia Lingvo, principe-koncepte ne estas pli "inventinto", ol estas Dante por la itala, Lj. Gaj por la kroata, V. Karadžić por la serba kaj multaj aliaj iniciatintoj por aliaj literaturaj (normaj) lingvoj. Tamen, neniam kiu ajn venis al la ideo nomi ilin "inventintoj", aŭ atribui al la normaj lingvoj iniciatitaj de ili la epiteton "artefaritaj". Kaj en kio, do, konsistas la "natureco" de kiu ajn norma lingvo, se ni devas lerni tiujn niajn proprajn naciajn lingvojn dum multaj jaroj por iel kontentige ellerni ilin kaj poste daŭre konsultadi gramatikojn kaj vortarojn por eviti erarojn? Kie, ekzemple, estas la "natureco" de la norma, literatura itala lingvo, se nur en tiu ĉi 1984-a jaro, do sep jarcentojn post la iniciato de Dante, oni atingis, ke nur 50% de la itala popolo kapablu paroli ĝin? Simile statas ĉiuj naciaj normaj lingvoj en rilato al siaj respektivaj popoloj malgraŭ la nacilingvaj literaturoj, lernejoj, gazetaro, radio, televido kaj aliaj unuecigaj faktoroj. (Pretere kaj parenteze dirite, la naivuloj, kiuj senpacientiĝas, ĉar Esperanto ankoraŭ ne konkeris la mondon, aŭ

la maliculoj-ignorantoj, kiuj riproĉe al la lingvo asertas la samon, fariĝus pli paciencaj aŭ malpli malicaj-ignorantaj, se ili iom pripensus la staton de siaj propraj naciaj lingvoj en rilato al la regionaj dialektoj kaj lokaj parolformoj).

Aliflanke, se la vorton "natura" oni komprenas en la senco "konforma kiel lingva instrumento al la bezonoj de logikaj pensado kaj esprimiĝo", oni povas nur konstati, ke Esperanto estas konsiderinde pli konforma al la racio, tial pli facile akirebla, do en tiu senco pli "natura", ol kiu ajn norma nacia lingvo, inkluzive la propran. Sed eĉ en tiu senco ne estas konsilinde uzi la vorton "natura" sen eksplikoj pri la funkciado de normala homa cerbo kaj la kompleksa rilato inter lingvo kaj penso.

La nekompreneo de tiu *idearo*, kiu estas ligita al la Internacia Lingvo kaj kiun Zamenhof nomis *interna ideo*, estas plia sekvo de la fundamenta eraro. En la Glosaro la aŭtoro difinas la internan ideon ("*inner idea*") jene: "la nebula valororientiĝo implicanta pacon, solidarecon, amikecon kaj justecon, kiu estas tradicie asociiĝinta kun Esperanto". Tiu "*inner idea*" (en la angla la esprimo estas eĉ pli maltaŭga ol "interna ideo" en Esperanto) treniĝas tra la tuta libro (p-oj 70, 96-97, 230-231, 254, 258 krp.), kelkloke en ridinde absurda formo. Ekzemple, sur p. 230 estas asertite, ke "en la postmilita periodo la historion de la Esperanto-Movado markas tendenco al instituciigo de la 'interna ideo' kaj burokratigo de la strukturo". Mi estas tre aktiva en la Esperanto-Movado jam 55 jarojn, sed neniam mi aŭdis kion ajn pri la tendenco "instituciigi la internan ideon" aŭ pri "burokratigo de strukturo"!

Lasante flanke tiun kaj aliajn absurdaĵojn lige kun la "interna ideo" en la pritraktata doktoreca tezo, mi ne povas ne diri plej firme, ke la idearo de Zamenhof en rilato al Esperanto tute ne estas "nebula", sed perfekte klara kaj esence ĝusta el scienca vidpunkto. Nebula ĝi estas nur por tiuj, kiuj mem havas tre nebulajn ideojn pri la socia funkcio de lingvo. La fakto, ke Zamenhof uzis neadekvatan esprimon neniel senigas la idearon de ĝia sociologia valoro. Mi mem ĉiam uzis la science adekvatan esprimon "humaneca internaciismo", kaj prilaboris ĝin en multnombraj studoj, artikoloj, prelegoj kaj paroladoj. Se Forster estus nur iom trastudinta tiun abundan materialon - kaj verkanto de doktoreca tezo pri la Esperanto-Movado devus studi tion ne iom, sed tre atente - li ja estus menciinta la Zamenhofan internan ideon, sed li ankaŭ estus devinta ekspliki ĝian veran sencan konforme al la science prilaborita koncepto de humaneca internaciismo. Bedaŭrinde, li tion ne faris. Tial neinformita leganto de lia libro necese ricevas la eraran impreson, ke la "valororientita" Esperanto-Movado estas ia stranga sekto bazita sur ia "nebula" kaj mistika "*inner idea*", kies adeptoj nomas sin "*fellow-idealists*" (fratuloj-idealistoj), kiel la aŭtoro komplete erare kaj misgvide tradukis la vorton "samideano(j)".

Tiu erara impresio pri sekteco estas fortigita per la tria sekvo de la fundamenta eraro: *la amasa aplikado de la vorto "crank"* (en la angla ne nur "strangulo", sed ankaŭ "maniulo") al esperantistoj plurloke en la libro. Sur unusola paĝo (371) *crank* kaj derivaĵoj aperas dekon da fojoj!

Estas vero, ke inter esperantistoj troviĝis kaj parte plu troviĝas ankaŭ diversspecaj straguloj, sed estas ankaŭ vero, ke (i) antaŭ ol fariĝi esperantistoj ili jam estis stranguloj, pro kio iliaj respektivaj naciaj lingvoj certe neniom perdis de sia valoro; (ii) ilia nombro en la Esperanto-Movado tre verŝajne estas proporcie malpli granda, ol la nombro de stranguloj en iliaj naciaj lingvokomunaj, kaj (iii) en iuj landoj stranguloj relative abundas inter Esperanto-parolantoj, en aliaj ili estas malmultaj aŭ eĉ komplete forestas.

La aŭtoro objekte mencias mian sukcesan kontraŭbataladon de malutilaj strangaĵoj kompromitantaj la seriozecon de nia afero kaj malhelpantaj la disvastiĝadon de Esperanto. Sur p-oj 233-234 li eĉ aperigis en angla traduko longajn partojn de mia kritika artikolo pri la strangaĵoj dum la Berna Kongreso (1947), publikigita siatempe en *Internacia Kulturo*, kaj la esencajn erojn de la *Principaro de Frostavallen* (p. 241), sed tio ne sufiĉas. En tiaspeca verko devis

esti profunde ekzamenitaj la specifaj formoj kaj kaŭzoj de strangaĵoj ĝenerale en diversaj sociaj medioj de diversaj landoj por komprenigi la aspektojn de kelkaj strangaĵoj en *parteto* de la Esperanto-Movado en *iuj* landoj. Kaj tio ne estas farita. Tial ankaŭ tiurilate la bildo estas falsa.

La demandoj tuŝitaj en tiu ĉi sekcio estas tiel ĉiuflanke jam pritrakitaj en Esperanto, ke por mi estis pli ol tede skribi la suprajn liniojn. Se P. G. Forster ne sciis tion, li povis kaj devis informiĝi ĉe mi. Se li sciis, pri kio mi dubas, sed ne emis trastudi ĉion, li devis atenti almenaŭ al la minimumo entenata en *Retoriko* (tria eldono), *Esperanto en Perspektivo*, ĉap. 18 (precipe 18.2 Bazaj Konceptoj), *Por Pli Bona Informado*, kaj en la longa artikolo "Kelkaj Lingvistikaj Demandoj", publikigita en *Belarto*, aprilo 1958, p-oj 51-63. (*)

4.4 Kelkaj el Multaj Aliaj Malĝustaĵoj

Jen nur kelkaj el tre multaj aliaj malĝustaĵoj kaj eraroj pri faktoj: P. G. Forster asertas, ke "*en ĉiu okazo Esperanto ne estas neakordigebla kun iuj versioj de marksisma filozofio, kiel montras ĝia vivoforto en multaj komunismaj landoj*" (p. 7). Fakte, la vivoforto de Esperanto en tiuj landoj estis rimarkinda longe antaŭ ol en ili ekregis iliaj respektivaj komunistaj (sovetiistaj) partioj, kies ideologio, cetere, havas nenion komunan kun la originala marksismo, escepte de la nomo. Krome necesas distingi la vastajn tavolojn de la esperantistaro, por kiuj Esperanto donas almenaŭ iujn eblecojn de komunikado kun la ekstera mondo, disde la politikaj gvidantoj, por kiuj Esperanto valoras nur tiom, kiom ĝi servas kiel instrumento de partipolitika propagando. Tiu "kompromiso" povas ĉiumomente rompiĝi, kiel montras la spertoj sub stalinismo antaŭ la Dua Mondmilito kaj post ĝi.

La aŭtoro skribas, ke "*aliaj grupoj, kiuj ricevis specialan apogon de esperantistoj, estas la kvakeroj kaj Oomoto*" (p. 107). Fakte, "la esperantistoj" donis nek specialan, nek nespecialan "apogon" al tiuj "grupoj", sed ja troviĝis ankaŭ kvakeroj kaj oomotanoj, kiuj, same kiel centmiloj da aliaj personoj, ellernis la lingvon kaj fariĝis esperantistoj, t.e. Esperanto-parolantoj.

Laŭ Forster, "*la Ligo /de Nacioj/ povus almenaŭ esti rigardata kiel malgranda paŝo antaŭen al internacia respektindeco de la esperantista ideologio*" (p. 171). Tiu "esperantista ideologio", kiu aperas multloke en la libro, neniam ekzistis nek povas ekzisti kiel *ideologio* en kiu ajn senco de tiu vorto, inkluzive la anglan *ideology*. Tute alia afero estas la idea aspekto aŭ solidariga rolo de kiu ajn lingvo, inkluzive de Esperanto, en rilato al la socia-lingva komunaĵo, al kiu ĝi apartenas. En ĉiu okazo la respektindeco de Esperanto ne dependis de la Ligo, nek povas dependi de tiaspecaj organizaĵoj, kiuj eventuale povas nur rekoni la *ekzistantan respektindecon* de la Internacia Lingvo, kiel tion faris la konata Rezolucio de Unesko de la 10-a de decembro 1954. Plue: "*La franca perdis sian monopolon en diplomatia komunikado en la Traktato de Versailles pro la limigita scio de la franca fare de Lloyd George kaj Wilson*" (p. 171) kaj "*la Ligo de Nacioj estis oficiale dulingva*" (p. 175). Fakte, la monopolon de la franca

(*) Nun represita en tiu ĉi kolekto.

ĉesis ne tial, ĉar Lloyd George kaj Wilson ne sciis ĝin, sed pro tute aliaj kaŭzoj, kaj la Ligo de Nacioj ne estis *oficiale* dulingva: kaj en la Pakto kaj en la Interna Regularo la esprimo "oficialaj lingvoj" estis intence evitata. Tion mi iom detale eksplikis en *La Lingva Problemo en Internaciaj Rilatoj* (CED/Dok. A/II5), kiun la aŭtoro, evidente, neniam vidis, sed kiun li estus devinta ne nur vidi, sed ankaŭ studi.

En tiu doktoreca tezo estas ankaŭ skribite, ke "*UEA diskutas ĉefe aferojn de la Esperanto-Movado, dum SAT donas la okazon paroli en Esperanto pri io alia*" (p. 21o). Oni ricevas la impreson, ke paroli en Esperanto oni povas nur en UEA (ĉefe pri Esperanto-aferoj) kaj en SAT (pri io alia)! Kompatindaj tiuj centmiloj da Esperanto-parolantoj, kiuj troviĝas ekster SAT kaj al kiuj tial ne estas donita la okazo paroli pri "io alia". Preskaŭ nekredeble, ke tiaj sensencaĵoj povas troviĝi en verko pretendanta sciencecon.

Forster asertas, ke "*la komunisma ideologio akceptas la fundamentajn principojn de la interna ideo (inner idea, denove) de Esperanto: paco, justeco kaj tutmonda frateco*" (p. 227). Do, la komunisma ideologio akceptas ian "nebulan valororientiĝon" (v. supre). Fakte, plurfoje, sed precipe en la *Kritiko de la Programo de Gotha* Marx plej forte kaj eksplicite atakis la parton pri interpopola frateco kaj insiste kontraŭstarigis al ĝi la internacian solidarecon de la laboristaro. Sub Stalin kaj nuntempe la originala marksisma koncepto de proleta internaciismo ricevis la sencon de absoluta submetiĝo al la interesoj de Moskvo, dum internaciismo en la ordinara senco de la vorto estas nomata "burĝa kosmopolitismo" kaj rigardata kiel grava devojiĝo. La sovetiisma ideologio ne nur malakceptas, sed kontraŭbatalas per siaj jam konataj metodoj ĉion, kio ne estas strikte konforma al la linio de la Komunista Partio de Soveta Unio, interalie ĝuste tiun idearon, kiun Zamenhof nomis "interna ideo" kaj por kiu, kiel dirite supre, la esprimo humaneca internaciismo estas science adekvata. En la Esperanto-Movado tion klare montras la partipolitika kampanjo kondukinta al Hamburgo kaj daŭrigata post ĝi per ĉiuj eblaj rimedoj: ekde pseŭdosciencaj studoj sub masko de scienceco, tra pamfletoj kaj artikoloj en sovetiismaj gazetoj kaj periodaĵoj (inkluzive la organon de la Brita Komunista Partio *Daily Worker* dum la Universala Kongreso de Esperanto en Londono, 1971), ĝis la vulgara ridindigado de "La Espero" dum la kongresoj de TEJO kaj nun ankaŭ de UEA. El la supre cititaj vortoj kaj el aliaj partoj de la libro vidiĝas, ke la aŭtoro komprenas nek la humanecan internaciismon, nek la originalan marksismon, eĉ malpli la sovetiismon kiel komplete deformitan marksismon. Por iom kompreni tion, li estus devinta atente trastudi almenaŭ la verkon *Hamburgo en Retrospektivo: Dokumentoj kaj Materialoj pri la Kontraŭneŭtraleca Konspiro en UEA*.

Forster skribas, ke post Montevideo (1954) "*UEA estis, fakte, rigardata en iuj rondoj kiel progresiganta ne nur siajn proprajn celojn, sed la ideologion de Unesko (uneskismo)*" (p. 245). Tiu konkluda parteto sekvas post la epokfaraj rezultoj de "sciencaj" esploroj de la nova doktoro, laŭ kiu "la ofico de ĝenerala sekretario, enkondukita /en UEA/ en 1955 memorigas pri tia pozicio en UN", kvankam (i) ĝeneralan sekretarion aŭ sekretarion havas ĉiu bone organizita asocio, (ii) la Ĝenerala Sekretario de UN estas altege salajrata ĉefo de la administra aparato de UN (simile al la malbonege salajrata ĝenerala sekretario de UEA *antaŭ* 1955), kaj (iii) ekde 1955 la ĝenerala sekretario de UEA estas nesalajrata membro de la Estraro. Do, eĉ se ekzistus ia simileco, ĝi dirus nenion, sed, fakte, nenia simileco! Plia "sciencia" malkovro de la aŭtoro: la dokumentoj de CED estis "laŭ aspekto similaj al la dokumentoj de Unesko" kaj "la periodaĵo *Esperanto* komencis kreskante similaj al *Unesco Courier*"!!! Vere, sen komento.

Sed kie, do, li trovis tiajn geniaĵojn, kiuj kvazaŭe kondukis al "uneskismo"? Li respondas per "ekzemple", kvankam temas pri *sole*, en la artikoletoj, en kiuj John Leslie sub pseŭdonimo Verdiro de unu n-ro al alia de la semajna gazeto *The Socialist Leader* atakadis min per siaj fantaziaj inventaĵoj, ofte uzante alian

pseŭdonimon por aprobi antaŭan atakon, kaj je protestoj respondadis, ke li havas nenion komunan kun la du pseŭdonimaj personoj. Forster mem informas, ke tiu J. Leslie estis rigardata "*cranky*", verŝajne en la senco "mania" (p. 280), sed tamen amplekse kaj senkritike resumas liajn maniaĵojn kaj la maniaĵojn de alia maniulo pri mi ("diktatoro", "kulto de personeco", "centralizismo" ktp.) plurloke en la libro (p-oj 247-250). Oni verkas eĉ ne parteton de doktoreca tezo laŭ nekontrolitaj onidiroj, klaĉadoj kaj inventaĵoj de maniuloj. Certe ne en la universitatoj, en kiuj mi instruis kaj instruas.

Cetere, ankaŭ Unesko ne havas "ideologion", sed estas organizaĵo de UN por edukado, scienco kaj kulturo, intertempe degenerinta, pri kio mi atentigis jam en 1970 en artikolo "Kien Unesko?", publikigita en *Esperanto*, n-ro 12/1970. Tiun artikolon kaj kelkajn aliajn pri la temo la aŭtoro estus devinta konsideri anstataŭ ripeti, ankoraŭfoje *senkritike*, stultaĵojn de maniuloj kaj primitivaĵojn de senkulturuloj, ekz. tiun sur p. 249, ke komercaj reklamoj en *Esperanto* (ekz. de Fiat kaj Philips) pli impresas, ol la tradukoj de *La Nobla Korano* kaj (kion P. G. F. ellasis) *La Dia Komedio*. Kvazaŭ entute povus temi pri dilemo: aŭ komercaj reklamoj aŭ literaturo kaj kulturo. Pretere dirite, kvankam li menciis en piednoto mian reason en *Esperanto* n-ro 3/72 je tiu primitivaĵo publikigita en *Esperanto* n-ro 1/72 (plia "ekzemplo" de mia "malebligado de kontraŭaj opinioj!"), tamen li ne skribis unusolan frazeton pri la esenco de la reago.

4.5 Aparte lom pri Hamburgo (1974)

Se mi dezirus pritrakti nur duonon de la malĝustaĵoj, kontraŭdiroj kaj eĉ misprezentoj, pluraj n-roj de *Horizonto* ne sufiĉus. Pri tio mi rezignas. Sed la partoj de la libro rilatantaj al Hamburgo kaj ĝiaj sekvoj estas tiel komplete, de la komenco ĝis la fino, plenaj de misprezentoj, ke mi ne rajtas ne menci i almenaŭ 2-3 el ili.

Forster asertas, ke MEM "*inklinas apogi sovetian starpunkton*" (p. 399) kaj ke ĝi "nun ĉesis esti aliĝinta membro de UEA" (p. 258). Fakte, MEM estas parto de la Monda Packonsilio kaj kiel tia ne "inklinas", sed devas senkondiĉe apogadi kaj propagandadi la oficialan sovetian linion, kion ĝi ja faras. MEM neniam estis "aliĝinta membro" de UEA kaj tial ne povis "ĉesi esti"(*). Alia afero estas, ke ĝiaj gvidantoj kiel funkciuloj de la Esperanto-organizaĵoj en la sovetiismaj landoj formas, kune kun la kunvojaĝantoj, la decide influan blokon en la Komitato de UEA. Tion la aŭtoro ne komprenas aŭ ne volas kompreni. Alie li ne ripetus, plian fojon *senkritike*, la asertojn de konata mensogofonto, ke ne ekzistas "pruvoj" pri la partipolitika "puĉo" de Hamburgo, nek li skribus en piednoto 55 sur p. 359, ke mia "*versio*" pri la hamburgaj eventoj troviĝas en *Hamburgo en Retrospektivo*, sed ne diras unusolan vorton en kio konsistas tiu mia "*versio*". Se li trovis tempon por veturi en Bulgarion kaj viziti tie S-ron N. Aleksiev, la ĉefan organizinton de la konspiro, li povis kaj devis trovi tempon por fari salteton de Hull en Wembley. Al doktorigonto mi volonte estus montrinta la multkilograman dosieregon, sur kiu baziĝis *Hamburgo en Retrospektivo*, kaj ankaŭ multajn aliajn originalajn dokumentojn pri la postmilita periodo. Ĉar mi plu fidas je lia intelekta honesteco, mi ankaŭ fidas, ke, trastudinte tion, li ne skribus, ke ne ekzistas "pruvoj" kaj ke temas nur pri mia "*versio*".

(*) Intertempe, en 1984, UEA kaj MEM subskribis Kontrakton pri Kunlaboro, per kio nur formaligis la jam delonge ekzistanta fakta ligiteco de UEA al MEM.

Ĉerpante el la sama konate misinforma fonto, la aŭtoro asertas, ke mi "formis mallongvivan movadon disiĝintan de UEA" (p. 251). En tiu mallonga frazo troviĝas tiom da malĝustaĵoj, kiom da vortoj: (i) mi neniam "formis" movadon disiĝintan de UEA, sed, kune kun multaj aliaj, apogis kaj plu apogas la partipolitike neŭtralan kaj sendependan esperantismon, ekzistantan ekde la apero de Esperanto; (ii) tio, kion li nomas "disiĝinta movado", plu vivas kaj fortikiĝas, kiel, interalie, montras la konferencoj de N.E.M., la ekzisto de ICNEM kaj la revuo *Horizonto*; (iii) tre multaj apogantoj de la neŭtrala Esperanto-Movado neniam ekziĝis el UEA kaj tial ne povis "reveni" al la Asocio; (iv) pro Hamburgo UEA perdis en la unua jaro 1177 individuajn membrojn, do preskaŭ unu kvinonon de la tuta individua membraro; (v) en 1983, do dek jarojn post la lasta antaŭhamburga jaro, UEA plu havis nur 6439 individuajn membrojn(*) kompare kun 7302 en 1973. Oni ne prezentas tiel false la faktojn en doktoreca disertacio. Io almenaŭ parte vera iel elglitis el la menso de Forster, kiam li diris en la lasta frazo de tiu sekcio rilatanta al Hamburgo: "Tiele, la specifa punkto de la konflikto leviĝis inter la "cranks" (stranguloj aŭ maniuloj) kaj tiuj celantaj internacian respektindecon /de Esperanto/" (p. 254). Parte vera tial, ĉar, kvankam kelkaj stranguloj/maniuloj sendube partoprenis en tiu tuta bedaŭrinda kaj hontinda afero, tamen la konspiro esence estis kaj restas partipolitika.

4.6 Konkluda Rimarko

Mi ne scias laŭ kiuj kriterioj la Universitato de Hull donas doktorecon. En la Universitato de Londono doktoreca tezo devas esti "distinga kontribuado al la scioj pri la temo" kaj "originala kontribuado" al la koncerna scienca branĉo. La tezo de Forster estas tre malproksima de tiuj kriterioj. En la Londona Universitato ĝi troviĝus en la antaŭĉambro de doktoreco, kaj tie ĝi devus resti almenaŭ unu plian jaron por esti kompletigita, korektita kaj ĉiuflanke prilaborita, antaŭ ol esti prezentita por doktoreca ekzameno. Se Forster estus petinta mian helpon, pro la temo mi estus helpinta lin eĉ pli volonte, ol mi helpas la studentojn, kiuj doktoriĝas ĉe mi sub miaj gvidado kaj kontrolo. Mi fidas, ke en tiu okazo li estus verkinta disertacion sur la necesa scienca nivelo. Tre bedaŭrinde el akademia kaj aliaj vidpunktoj - ankaŭ el tiu de la Esperanto-Movado - li tion ne faris.

(*) En 1984 la nombro de individuaj membroj malaltiĝis al 6256.


PERSONA INDEKSO

- Andrejev, N. D. 28
Auld, W. 15, 23
Bazilo, Skta 2o
Blanke, D. 9, 35-36, 39-43, 45-48
Blinkenberg, prof. 21, 26, 43-44
Bokarev, E. A. 28, 43-44
Butler, M. C. 32
Canuto, G. 1o
Cohen, M. 21-23
Collinson, W. E. 31
Connor, G. A. 1o, 15
Ĉemodanov, N. S. 18-21
Ĉikobava, A. S. 16, 18-21
Dante 51
Demidjuk, G. P. 4o
D'Orsay 3o
Drezen, E. K. 16, 27, 35-36, 4o, 46, 48
Engels, F. 1o, 45
Eūnomio (Eunomius) 2o
Fighieria-Sikorska, A. 38
Forster, P. G. 1o, 49, 52-54, 56
Gaj, Lj. 51
Golden, B. 49
Grandja, J. 36
Herrmann, W. 1o
Hitler, A. 12, 38
Hodler, H. 39
Holmes, H. 1o
Hurlock, B. 29
Isajev (Isaev), M. I. 35, 43
Jakovljević, prof. 14
Jung, T. 38
Karadžić, V. 51
Kawakita 17
Krašeninnikova, J. 13
Krupskaja, N. K. 36, 43-44
Kuzmić, V. 4o
Lanti, E. 27
Lapenna, I. 11, 17-18, 22-23, 27, 32
Laurat, L. 23
Lenin, V. I. 35-36, 43-44
Leslie, J. (Verdiro) 54
Lins, U. 11, 35-39, 43, 46, 49
Lloyd George 53
Lomtijević, prof. 14
Mandelbaum, D. G. 21
Marr, N. J. 16, 18, 22-25
Marx, K. 1o, 19, 45, 54
Motusević 29
Meillet, A. 21, 23-25
Müller, M. 2o, 3o, 43
Nekrasov, N. V. 4o
Orsay D' 3o
Pei, M. A. 19, 22, 25, 29, 31
Podkaminer, S. N. 35-36, 42
Privat, E. 39
Proudhon 19
Rátkai, A. 35, 4o
Sapir, E. 21, 24, 51
Saussure de, F. 21
Schlauch, M. 25
Shakespeare, W. 13, 3o
Shintaro 17
Snežko, D. S. 4o
Solzbacher, W. 1o, 15-21, 23, 27-29, 32-33
Spiridović, E. F. 4o
Stalin, J. V. 9, 11-12, 16, 18, 22-23, 29, 54
Susumo 17
Suzuki 17
Šćerba 29
Šor, R. O. 18-21
Valentine, C. W. 3o
Vandryès, J. 21
Varankin 4o
Verdiro (John Leslie) 54
Vrba 17
West, M. 31
Wilson 53
Wood, R. 49
Zamenhof, L. L. 14, 27, 36-37, 39, 42, 45-46, 51-52, 54

VERKOJ DE IVO LAPENNA

en la Internacia Lingvo

Ĉiuj inspiritaj de humaneca
internaciismo



Ĉiuj verkitaj en *modela* Esperanto

RETORIKO, "la plej legata verko en la postmilita periodo", 3-a eldono, 294 p., bindita, prezo 15 anglaj pundoj, 165 danaj kronoj, aŭ egalvaloro.

RETORIKO, 2-a eldono, praktike identa al la 3-a eldono, bindita, prezo 10 anglaj pundoj, 110 danaj kronoj, aŭ egalvaloro (restas nur kelkaj ekz.).

ELEKTITAJ PAROLADOJ KAJ PRELEGOJ, komplemento de "Retoriko", 152 p., fortike broŝurita, prezo 10 anglaj pundoj, 110 danaj kronoj, aŭ egalvaloro.

AKTUALAJ PROBLEMOJ DE LA NUNTEMPA INTERNACIA VIVO, popularscienca kaj interesa por ĉiu klera persono, 144 p., broŝurita, prezo 10 anglaj pundoj, 110 danaj kronoj, aŭ egalvaloro.

HAMBURGO EN RETROSPEKTIVO, dokumentoj kaj materialoj pri la kontraŭneŭtraleca konspiro kaj puĉo de 1974, 2-a konsiderinde kompletigita eldono, 152 p., broŝurita, prezo 8½ anglaj pundoj, 95 danaj kronoj, aŭ egalvaloro.

Ĉiuj supraj libroj estas mendeblaj ĉe la Libroservo de N.E.M., Nørregårdsvej 91, DK-2610 Rødovre, Kopenhago, Danio, poŝta ĉekkonto 9 32 95 95. La librojn oni povas mendi ankaŭ ĉe la aŭtoro: 77, Grasmere Avenue, Wembley, Middlesex, HA9 8TF, Britio, laŭ la prezoj indikitaj en anglaj pundoj per ĉeko je lia nomo.

AL ĈIUJ PREZOJ BV. ALDONI 15% POR LA SENDOKOSTOJ.



RETORIKO

Tria eldono

Tole bindita

294 paĝoj

Prezo: 15 anglaj pundoj

165 danaj kronoj

plus sendokostoj 15%



”La aŭtoro lerte frakasas multajn pseŭdosciencajn stultajojn, kiujn laikoj kaj lingvistoj kutimis kaj ankorau kutimas elbuŝigi kaj surpaperigi kvazaŭ argumentojn kontraŭ la Lingvo Internacia”. (*Scienca Revuo*).

”Ĉiu plene konvinkiĝas pri tio, ke la mondfama elokventa oratoreco de Ivo Lapenna estas nutrita ne nur per lia genio de la naturo donacita, sed ankaŭ per lia profunda kono pri retorikaj principoj kaj reguloj, kaj multaj lingvistikaj fakoj”. (*Oomoto*).

”La enhavo evidentigas profundajn esplorojn ne nur pri la retoriko mem, sed ankaŭ pri multaj fakoj de la lingvistiko”. (*The British Esperantist*).

”La Retoriko de Lapenna estas vera trezoro de nia literaturo. Kaj ĝi estas pli valora ol similaj verkoj en naciaj lingvoj, ĉar ĝi, starante ekster kaj super la naciaj lingvoj, havas panoramon pli vastan kaj aparte konsideras la Esperantan parolarton”. (*Norvega Esperantisto*).

Prof. G. Waringhien, antaŭa prezidanto de la Akademio de Esperanto, skribas en la antaŭparolo:

"En ne multaj naciaj literaturoj estas trovebla libro tiel science redaktita, tiel oportune utiligebla, tiel pense riĉiga, kiel ĉi tiu verko".